

eLIBRO

OMAGĜE AL JOHN LUNDGREN

*Jannes sidis sur la pordoŝtupo de sia malnova domaĉo apud Idlago. Estis somermezo, kvieta bela somermezo, unu el tiuj, kiujn oni ne forgesas. Pri la somermeza festo oni ĉiam ĝojas, sed oni ŝatas ĝin duoble kiam ĝi estas kvieta, solena kaj brila. **Uzino 2***



INKO



UZINO 2
OMÂGE AL JOHN LUNDGREN

*Elektronika revuo de originala
kaj tradukita beletro*
Redaktis Franko Luin

eLIBRO

Aranĝis: Franko Luin

ISBN 91-7303-175-5

inko@omnibus.se

<http://www.omnibus.se/inko>

OKTOBRO 2002

Enhavo

John Lundgren	4
La somermeza festo (<i>Paul Lundh</i>)	6
La senpaculoj (<i>Selma Lagerlöf</i>)	16
La gigantino (<i>Werner von Heidenstam</i>)	45
La latuna sitelo de panjo (<i>August Bondesson</i>)	51
Transdono de saluto (<i>Henning Berger</i>)	57
Fraŭlino Alice (<i>Martin Kock</i>)	67
Trans la rozkrado (<i>Fanny Alving</i>)	74
Majstra pafo (<i>Erik Hedberg</i>)	90
Mazepo kaj lia ambasadoro (<i>Werner von Heidenstam</i>)	93
El "Taglibro de la koro" (<i>Oscar Levertin</i>)	105
La magistroj el Österås (<i>Oscar Levertin</i>)	109
Kalonymos (<i>Oscar Levertin</i>)	116
La fremdlanda vojaĝo de Mathias Waldius (<i>Oscar Levertin</i>)	119
La trezoro de la imperiestrino (<i>Selma Lagerlöf</i>)	126
La falĉistoj de Polhem (<i>Elsbeth Funch</i>)	139

John Lundgren

*L*a nomo de John Lundgren apartenas al la pionira periodo de la esperanto-movado. Konata estas lia decida starpunkto en 1909 favore al la internacia lingvo kiel Zamenhof prezentis ĝin, kiam la ido-skismo minacis detruiri la ĝermantan esperanto-movadon en Svedio. Li tiam ekeldonis kaj elpropra poŝo pagis la presadon de monata gazeto, Sveda Esperantisto, anstataŭ la ĝistiam movada organo Esperantisten, kiun la redaktoro P. Ahlberg idigis. Li metis sin en servon de la esperanto-movado kiel ĝia prezidanto (1913 – 1918) kaj ankaŭ per tio helpis venki la krizon.

Sed lia intereso estis literaturo. Ne pro profesio li interesiĝis pri ĝi, ĉar li estis ordinara oficisto en malgranda fervoja stacio en la sveda kamparo, sed pro vera amo. Tiun amon al libroj li montris ankaŭ en esperanto, tradukante en ĝin dum jardekoj rakontojn kaj romanerojn el la sveda literaturo, plej ofte verkistojn de sia samtempo. Oni trovas liajn tradukaĵojn dise en la tiama gazetaro. Tio meritigis al li membrecon en la Lingva Komitato, la antaŭulo de Akademio de Esperanto.

John Lundgren estis modesta homo. En 1930, kiam li festis sian 60-jariĝon, li skribis por la sveda gazeto La Espero

(kies redaktoro li estis dum kelkaj jaroj) la jenan limerikon pri si mem:

*En la urbeto Hedemora
sidas sesdekjara sinjoro.
Antaŭ pli ol dudeko da jaroj
okazis de li kelkaj faroj.
Nun restas nur la memoro.*

En ĉi tiu Uzino 2 mi kolektis kelkajn el liaj tradukaĵoj, kiel malfrua omaĝo al tre signifa homo en la frua esperanto-movado.

Franko Luin

La somermeza festo

Jannes sidis sur la pordoŝtupo de sia malnova domaĉo ĵapud Idlago. Estis somermezo, kvieta bela somermezo, unu el tiuj, kiujn oni ne forgesas. Pri la somermeza festo oni ĉiam ĝojas, sed oni ŝatas ĝin duoble kiam ĝi estas kvieta, solena kaj brila. Tia estis ĉi tiu. — Jannes suĉis kun ĝuo la osttuban feran pipon, kiu odoris freŝan, fortan, nigran plattabakon. Ĝi estis perfekte fumbrunigita, ĉeestis dudek somermezajn festojn. Al Jannes la sepdekunua tiam pasis en la sunbrilo sur la montaro.

Ŝmac, ŝmac! Sonis kvazaŭ malgrandaj krakoj kiam li eksuĉis por konservi la ardon en la pipo. Multfoje li forgesis, Jannes; forgesis tiun konstantan suĉadon, kiu daŭras senĉese, dum oni ne pensas pri io.

Estis bela tago. La du foliaj branĉoj, per kiuj li ornamis la enirejon, ombris agrable kaj estis plenaj de zumado de flugaj vivaĵoj. Ili volonte restis ĉe la maljunulo ĉe Idlago. Homoj ĝenerale ne amas flugulojn. Mankas la ĝusta sentharmonio.

En tiu ĉi tago la pensoj vagis malproksimen, kaj la pipo estis dormiĝema. Sed tuj kiam ĝi ronketis, li per rapidaj eksuĉoj revigligis ĝin. Estas strange, kiel vaste pen-

soj povas atingi. Ne troviĝas baroj por ili. Muroj ne enfermas ilin, la tempo ne malhelpas ilian flugon, ciferoj ne povas montri ilian rapidon. Li bone memoris tiun tempon, kiam li estis kvinjara kaj staris tie apud la rivero, kun salika vergo, apenaŭ metrolonga; — li havis hokon el butonpinglo, kaj la vermo sidis transverse. Sed malgraŭ tio li kaptis truton; granda ĝi estis, tre granda, kaj ĝi vostobatis terure. Li estis metinta la vergon sur la ŝultron kaj portis hejmen la truton. Li apenaŭ kuraĝis malfirmigi ĝin de la hoko; la patro ridis preskaŭ raŭkiĝe, karesbatis lin sur la ŝultro kaj diris: vi fariĝos brava fiŝkaptisto, Jannes. Ĝi pezis 2 hektojn, sed Jannes certe kredis, ke estas iom tromalmulte pesita.

Li memoris la okazon, kiam li metis formikojn en la flartabakujon de Tajlor-Lars. Bruldolorigaj formikoj ili estis, malgrandaj, ruĝaj kaj koleraĵaj. Li estis miopulo, la tajlor-mastro, tiel miopa, ke la kurbnazo kuŝis sur la papero, kiam li estis leganta ion. Sed monerojn li povis vidi tre bone. Homoj diris ke li estas avara, sed tio estis ja eble nur malico. Verŝajne li havis des pli bonan palp-senton, ĉar li vidis malbone, kaj moneroj pezas malsame. Kutime se unu povo mankas, alia estas des pli evoluinta. La kleruloj diras tion. Sed certe necesas bona palp-sento por diferencigi 50-oerajn kaj 2-oerajn monerojn. La flartabakujo staris sur la tablo. Li ekprenis ĝin, kaj plenigis ĝin. Troviĝis brulformikoj sub la ŝtonoj ĉe Tajl-

ordomo — jes, troviĝis! Lars prenis pinĉaĵon, almenaŭ dek formikoj sur la dikfingra pinto, tirspiris kaj faris la kutiman ekskuon, kiu suprenŝarĝis ilin ĝis sub la nazradiko. — Ekkuru plej internen en la infero! li ekkriis, kaj Jannes kuris.

Jannes surprizis sin mem per duonlaŭta rido. Li rigardis ĉirkaŭen por scii, ĉu iu vidas lin. Ne estus grave, sed homoj povus konkludi, ke li ne estas ĝustprudenta, se oni ekvidus ke li tutsole sidas tie ridante.

Plaŭdis en la lago. Ezoko do havigis al si matenmanĝon laŭ sia aparta maniero. Simple kaj bele. Nur ĵetiĝo antaŭen. En ordinara tago li estus tuj ironta tien kaj provonta ĵethokon. Certe ankaŭ li estus kaptonta fiŝon.

Sed estas somermezo, solena, varma, kvieta somermezo.

La ezoko restu en kvieto.

Plaŭd, plaŭd, plaŭd, sonis tie. Haha! Estis plotaro preterdancanta. Ili amuziĝas, ankaŭ la fiŝoj. Kaj certe ili devas tion, certe. Fiŝoj kiel homoj estas infanoj de la naturo kaj havas samajn sentojn. Se li mem estus fiŝo, certe li petole ĵetiĝus, ankaŭ li. Estas plezuro petoli en tia tago; oni bezonas fari tion, tion kaŭzas la sango. Estas kvazaŭ necese por akiri malvarmetiĝon.

Se la naĝiloj ne estus tiel tremantaj. Jannes ekridis, releviĝs kaj rigardis ĉirkaŭ si. Ne, ja ne estas iu observanto. Ho Dio, kiel stulta oni estas! Malvarmetiĝo —

fiŝo. Estas tro simpla spritaĵo. La fiŝoj ja banas sin konstante.

—Ne malmulte vi estas stulta, vi Jannes, li diris duonlaŭte.

Ŝmac, ŝmac! Ne! La pipo ree dormas. Ŝmac, ŝmac! Jes, nun! Ĝi pepas kvazaŭ ĵus vekiĝinta garolideto, sed kvietiĝas baldaŭ.

Jannes fermis la maldekstran okulon kaj netrigardis. La fumo, blua kaj bela, leviĝis kviete, malrapide. La pipkapo kvazaŭ kreskis kaj forvadis malrapide, pli kaj pli malproksimen, velveturis super la Sörsjö-ebenaĵo, super Fuluboren, al Hem-monto, fariĝis kvazaŭ mola, malhela monto leviĝanta el la bluo — ĝi estas la blua maro — monto ĝi estas en la blua, vasta maro — kviete, kviete nebuleto en la maro malrapide moviĝis supren ĉe la vidlimo — kviete, malrapide, leviĝis pli kaj pli malaperis — ho, ĝi estis Pacifiko — li bone memoris — la Pacifika Maro. Highland albordiĝis ĉe nova, longa rodo — la arbaro balanciĝis kun oranĝoj, kokosoj kaj bananoj — jen ŝi — bruna, nuda, juna — ŝi ridetis, tiel ŝi ridetis — neniam li vidis pli blankajn dentojn, ŝi estis evidente bela — bela kiel Pacifiko ŝi estis, li prenis ŝian brakon — ŝi nur ridis — ili sidis tie provante paroli unu kun la alia — ”vi estas bela,” li diris, evidente ŝi ja ne komprenis ion — ”bona knabino,” li diris — ŝi ankaŭ ne komprenis tion — tiam li ekkisis ŝin, tion ŝi komprenis — kaj —

Jannes ree rektigis sin. Estis bonŝance, ke neniu observis lin. Pli malmulte homoj povus supozi, ke li estas senprudenta. Li sidis ja babilante laŭte. Li forviŝis per la dekstra mano ian malsekaĵon, kiu rulis malsupren al la hirta barbo. Sidi tiel songante ne estas bone. La okuloj fartas malbone pro tio.

Jes ja! La pipo ree ekdormis, kaj la pipkapo ŝajnis kvazaŭ brila blanka helaĵo meze antaŭ la Horrmunt-monto, kiu kuŝis kvieta, larĝa kaj potenca super Okcidentvalo, banante sin en la somermeza sunlumo.

—Vi estas ja tre sola, Jannes, li aŭdis diron de iu. Estis konata voĉo. Ĝi venis el interne. Li metis supren la latunan tabakskatoleton kaj depremis duoncolon kontraŭ la rando, tiris la tranĉilon el la ingo kaj distranĉis tabakpeceton, poste frotis inter la manplatoj kaj enŝtopis novan dozon.

Bone ekbruliĝis. La pipkapa kovrilo krake fermiĝis de la fingropremo, rapide, certe kaj decide. La alumeto ĵetiĝis je malgranda arko sur la korton. Ruĝa larvo venis rampante sur la sedimentŝtona plato, kie Jannes tenis la piedojn, puŝiĝis al la dika betulŝela plando, retiris sin rapide kaj ekkuŝis tute senmove. Estis kvazaŭ ĝi kredus, ke ĝi kaŝus sin por io insida kaj danĝera, kion oni plejbone devus eviti. — Kompatinda bestaĉo! Jannes flustris, vi certe ne bezonas timi.

Li prenis ĝin gardeme en la manon, provis fari ion, kio similis kareson, kaj metis ĝin en la mallarĝan kavaĵon pro la detegmenta gutado, kie estis agrable, malvarmete kaj malsekete.

—Bonvolu akcepti! li diris kun voĉnuanco, milda kiel la balanciĝanta Pacifiko.

Babilema turdo ekvenis en la betulareton apud la vojo, kaj ĉe la nestejo ĉe la budo muŝkaptulo kantis por siaj kvar idoj. La hirundoj svingiĝis kvazaŭ malgrandaj nuboj ĉe la rivera bordkrutaĵo, kie ili havis sesdekon da nestoj en la sablo, profundaj truoj, kiuj tentis kaj la katojn kaj la bubojn de la vilaĝo.

Estis vigla vivado tiun ĉi tagon. Certe pasis longa tempo post simila somermezo, kiun li memoris. Sed oni ne postulu, ke ĉiam estu bele ĝuste tiam. Tion oni ne devas. Sed oni prefere volas, ke ĝuste tiu tago, la plej longa de la jaro, estu klara kaj belega. Supozeble oni deziras tion ĝuste ĉar ĝi estas tiel longa. Longa kaj lumriĉa kaj kvietaj kaj varma ĝi devas esti.

Certe pasis longa tempo post simila somermeza tago, kiun li memoris. Longe, antaŭ tre longe. Deknaŭjara li estis, nur deknaŭjara. Sinjoro Dio, tio estas tutaj kvindek jaroj, kaj plue du. La tempo forpasas rapide.

Kvazaŭ monta rivereto ĝi forpasas, petole, senbride, sovaĝe. Tion oni ne atentis antaŭ ol oni jam maljuniĝas. Eble estas feliĉe, ke estas tiel. Tamen — tutaj kvindek du

jaroj — kaj tamen kvazaŭ hieraŭ. Tuta mallonga eterno, kaj tamen kvazaŭ hieraŭ. Ankaŭ tiam estis simile kvietata, dolĉa, agrabla tago. Sed tiam li ne sidis tiel meditante. Li estis ja juna. Oni ne meditas, kiam oni estas deknaŭjara. Tiam oni nur vivas.

Certe li memoris ĉion. Precize ĉion. Ok junbetulojn li hakis en la arbareto, trenis ilin hejmen, ornamis la enirejon, purbalais la korton, manipulis en la hejtlignejo kaj festmaniere hakfirmigis la hakilon en la ŝtipbloko. La gemaljunuloj volis havi ordon kaj agrablon en tia tago; ĉi ĉion li volis aranĝi, kvankam ili ne diris ion pri tio. Li mem foriris, iris la vojon preter Rōndomo — nun estas nova barilo tie, la malnova ne aspektis bele — la suno brilis, la birdoj trilis, la tero ridetis. Li iris la vojon antaŭen al Heja — ili interkonsentis tion — ŝi venis sur la vojeto sur Hen — li aŭdis, kiel ŝi kantsonas sur la arbaraj sablogrundoj — Grandmoreno respondis per longtirata reva eĥo — poste la kantsono profundigis en la ebenaĵojn oriente, kaj fariĝis tutsilente — jen ŝi — li vidis ŝin de longa interspaco — vidis kiel ŝi ridetas — neniu havis tiel serenajn blujajn okulojn kiel ŝi — neniu havis tiel helajn ondantajn harojn kiel ŝi — neniu havis tiel harmonian iron kiel ŝi — neniu, neniu — ”vi venis,” ŝi diris — li ĉirkaŭbrakis ŝin — brakpremis ŝin — kisis ŝin. Poste ili vidis kaj aŭdis nur kiel belege la suno brilas, kiel belege la birdoj trilas, kiel rave la tero ridetas. Ili diris

nenion, eĉ ne unu vorton. Sed ardis io interne en ili, kio diris pli multe ol povas vortoj. Tio estis kvazaŭ rebrilo de ĉio, kion ili vidas kaj aŭdas. Estis pli multe ol ĝojo. Kaj tio, kio estas pli multe ol ĝojo, havas tre silentan nomon. *Amo* estas tiu nomo.

Per la dekstra mano Jannes forviŝis ian malsekaĵon, kiu ŝtelis sin malsupren al la tufa barbo. Sidi tiamaniere sonĝante ne estas bone. La okuloj suferas pro tio.

La pipo dormiĝis. Ĝi daŭris dormi. La maljuna Jannes ne atentis tion.

Tiam estis bela somermezo — simila al la hodiaŭa. Sed fariĝis severa aŭtuno poste, estis severa aŭtuno poste.

Jannes lasis la kapon malleviĝi en la manojn. Tio estas kvietiga. — Fariĝis severa aŭtuno poste — li estis atendinta tion, devus esti kompreninta tion. Li neniam ĝuste plaĉis al la Rön-mastro. Li devus esti kompreninta, ke okazos tiel. Li ne konvenis por domo de riĉulo, estis certe, certe. — Ne, diris la Rön-mastro, en mian domon li venos neniam. Fariĝis tiel, tio estis certe. — Nun li estas mortinta, la Rön-mastro, kaj ankaŭ la Rön-mastrino. Kerstin vivas, sed ŝi forvojaĝis. La Rön-mastro forsendis ŝin. Homoj diris, ke ŝi vivas, sed neniu scias kie. Ŝi estis en la hejmo kiam la Rön-mastrino mortis, sed forvojaĝis ree. La Rön-mastro mortis antaŭ nur unu monato, estis persistema materio en tiu maljunulo. Ne estas

multaj, kiuj povas atingi naŭdek kvin jarojn. Tiam oni ne aŭdis pri ŝi, Kerstin. Sed florgirlandon ŝi sendis. Do ŝi vivas. Kelkaj diris, ke ŝi estas en fremdlando. Kelkaj diris, ke ŝi fariĝis monaĥino. Plej multaj diris, ke ŝi neniam revenos hejmen.

Kvindek jaroj kaj ankoraŭ du — kaj tamen kvazaŭ hieraŭ — ĉe la gruzaltaĵo ili renkontiĝis — ŝi venis la vojeton sur Hen — li aŭdis, kiel ŝi sonkantas sur la marĉoj — Grandmoreno respondis per longtirata reva eĥo — poste la melodio profundiĝis en la ebenaĵojn oriente, kaj fariĝis tutsilente — li vidis ŝin de longa interspaco — vidis kiel ŝi ridetas — neniu havis okulojn tiel serenajn kiel ŝi — neniu havis tiajn helajn ondantajn harojn kiel ŝi — neniu havis tiel harmonian iron kiel ŝi — neniu, neniu — ”vi venis,” ŝi diris — li kaptis ŝin per ĉirkaŭbrako — brakpremis ŝin — kisis ŝin. Poste ili vidis kaj aŭdis nur kiel rave la suno lumas, kiel rave la birdoj trilas, kiel rave la tero ridetas. Ili diris nenion, eĉ ne solan vorton. Sed interne en ili ardis io, kio diris pli multe ol povas vortoj. Estis kvazaŭ rebrilo de ĉio, kion ili vidas kaj aŭdas. Estis pli multe ol ĝojo. Kaj tio, kio estas pli multe ol ĝojo, havas tre silentan nomon. Tiu nomo estas ...

Maljuna griziĝinta virino venis sur la vojeto de apud la rivero. Ŝi estis iom kliniĝinta, sed iris per viglaj paŝoj al la malalta griza dometo. Ŝi havis ion malmolan kaj severan en la trajtoj, sed vidante la maljunan Jannes ŝi

ridetis — ŝi havis mirinde serenajn blujajn okulojn ŝi havis — ho — li rekonis ŝin — li rekonis ŝin.

—Nun mi venas, Jannes, ŝi diris. Nun venas Kerstin. Maljuna Jannes ŝirmis antaŭ la okuloj. Ĉu tiu ĉi somermezo ne estis laŭdinda? Vi diru tion!

—Vi venis! li diris, stariĝis kaj etendis la manojn.

—Jes, mi venis, ŝi diris mallaŭte kaj prenis liajn manojn.

—Kerstin!

—Estis jam antaŭ longe, Jannes, ŝi diris, kiam ili estis sidiĝintaj. Ankaŭ tiam estis tia belega somermeza tago.

—Jes, estis tiel.

—Ĉu vi memoras, kiel belege la suno lumis tiun tagon, Jannes? Kiel la birdoj trilis, kiel la tuta tero ridetis?

—Jes, mi memoras tion. Jannes forviŝis iun malsekaĵon, kiu ŝtelis sin malsupren al la tufa barbo. Ne estas bone, ke oni sidas revante. La okuloj ne toleras tion.

—Estis tre simile al ĉio hodiaŭ, Jannes, tre simile. Post tiu diro ŝi eksilentis. Ŝi rigardis lin. Estas nur ni — nur ni — kiuj estingiĝas!

Varma vento de malproksime moviĝis preter la dometo apud Idlago. El Hejan ĝi venis, serĉis la kurban vojejon ĉe Hen kaj malaperis super la bluaj montoj kontraŭ la eterna matenlumo.

Paul Lundh

El "La izola popolo"

La senpaculoj

Bienulo, murdinte monaĥon, forkuris en arbaron, kaj estis senpacigita*. En la sovaĝejo li trovis antaŭ si alian senpaculon, fiŝkaptiston el la plej ekstrema parto de la insularo, kulpigitan je ŝtelo de haringreto. Ili ambaŭ kolegiĝis, loĝis en terkaverno, faris retojn, ligis pin-tojn sur sagtrunkojn, bakis panon sur plata ŝtono, kaj gardis unu al la alia la vivon. La bienulo neniam lasis la arbaron, sed la fiŝkaptisto, ne farinte same abomenindan krimon, iam metis al la ŝultro portaĵon el mortigitaj bestoj, kaj iris sekrete inter homojn. Tiam li ricevis lakton kaj buteron, sagpintojn kaj vestaĵojn kiel pagon por nigraj urogaloj kaj blue brilantaj tetroj, por graci-membraj kapreoloj kaj longorelaj leporoj. La senpaculoj tiel povis konservi la vivojn.

* Ĉe la antikvaj nordanoj mortigo ĝenerale estis pardonebla per monpuno. Pli gravaj tiaspecaj krimoj tamen estis punataj per "senpaceco". Senpacigito ne plu estis ŝirmata de la leĝoj de la socio, kaj kiu ajn rajtis mortigi lin; li devis kaŝi sin en sovaĝejo kaj la arbaroj pro tio ne estis vivejo nur de sovaĝaj bestoj, sed ankaŭ de danĝeraj krimuloj. Dum mortigo estis opiniata kiel malpli granda krimo, oni tre malŝatis ŝteladon, kaj ŝteloj ĝenerale estis juĝitaj je mortpuno. — *La tradukinto*

La kaverno, kie ili loĝis, estis fosita en deklivo. Larĝaj ŝtonoj kaj dornaj arbetoj gardis la enirejon. Sur la tegmento staris branĉetriĉa abio. Apud ĝia piedo estis la fumtruo de la kaverno. La altiĝanta fumo penetris ĝian densan branĉaron kaj malaperis nerimarkeble en la aeron. Lasante aŭ revenante sian loĝejon, la viroj kutime iris en rivereto, kiu fluadis de la montdeklivo. Neniu serĉis sub la gaje plaŭdanta akvosupraĵo postsignojn de la senpaculoj.

Komence ili estis ĉasataj kvazaŭ sovaĝaj bestoj. La vilaĝanoj kolektiĝis, kiel por ĉaso al urso aŭ lupo. Arkpafistoj ĉirkaŭis la arbaron. Ponardegportantoj eniris ĝin kaj esploris ĉiun malluman fendon kaj ĉiun branĉetriĉan arbetgrupon. Dum la bruanta ĉasantaro trairis la arbaron, la senpaculoj kuŝis en sia malluma kaverno, senspire aŭskultante, spiregante pro timo. La fiŝkaptisto persistis la tutan tagon, sed la murdinto estis de netolerebla agonio pelata eksteren, kie li povos vidi la kontraŭulojn. Tiam li estis ekvidata kaj persekutata, sed tio ŝajnis al li sepfoje pli bone ol senmova kuŝado en senforta malagado. Li forkuris de siaj ĉasantoj, glitis laŭ deklivegoj, saltis trans riveretojn, suprenrampis sur vertikalajn montmurojn. La incito de la danĝero ĉiom efikigis liajn forton kaj povon alie neuzatajn. La korpo estis elasta kiel ŝtalrisorto, la piedo ne trafis erare, la mano ne malprenis firmaĵon, la okuloj kaj oreloj atentis duoble ol kiel

antaŭe. Li komprenis la sonojn de la folioj kaj la ŝtonoj avertis. Transrampinte krutaĵon, li turnis sin al la persekutantoj, mokante ilin per sarkasmaj rimoj. Li fulmrapide prenis siblantajn ponardegojn, kaj resendis ilin malsupren al la malamikoj. Laŭdkanto pri lia irado sonis en lia interno, dum li antaŭen penetris inter vipantaj branĉoj.

La nuda dorso de la monto tie staras super la arbaro, kaj nubalta pino sole staris sur ĝia krutajo. La brunruĝa trunko estis senbranĉa, sed en la branĉoplena supro svingiĝis rabobirda nesto. Tiel trokuraĝa estis la forkuranto, ke li suprenrampis tien, dum la persekutantoj serĉis lin sur la arbaraj deklivoj. Tie en la arbosupro li sidis rompante la kolojn de akcipitridoj, dum la ĉaso preterpasis profunde sub li. Akcipitro kaj akcipitrino venĝeme ĵetiĝis al la rabanto. Ili flirtis antaŭ lia vizaĝo, direktis la bekojn al liaj okuloj, batis lin per la flugiloj, kaj gratis per la ungoj sangajn striojn en lia haŭto, brunigita de la vetero. Li batalis kontraŭ ili. Starante apud la nesto, li hakis al ili per sia akra tranĉilo, kaj forgesis dum la gaja ludo la vivdanĝeron kaj la persekutantojn. Ili jam aliris alian lokon, antaŭ ol li havis tempon por atenti pri ili. Neniu pensis serĉi sur la montodorso la ĉasaĵon. Neniu rigardis alten por vidi lin aganta kiel bubo aŭ dormirulo, dum plej grava danĝero minacis lian vivon.

La viro skuiĝis, trovante sin savita. Per tremantaj manoj li prenis por apogi sin, agonie li taksis la altecon, kien li estis rampinta. Ĝemante pro timo je falo, timante la bordojn, timante esti vidota, timante ĉion, li malsuprenglitis laŭ la trunko. Li kuŝigis sin sur la monton por ne esti videbla, kaj rampis trans ĝiajn plataĵojn, ĝis aro da malgrandaj arboj kaŝis lin. Tie li kaŝis sin sub densajn branĉarojn de junaj abioj. Malforta kaj senpova li falis sur la muskon. Sola viro kapablas kapti lin.

La fiŝkaptisto estis nomata Tord. Li estis nur deksesjara, sed forta kaj kuraĝa. Li jam vivis unu jaron en la arbaro.

Berg estis la nomo de la bienulo, kaj oni alnomis lin Altulo. Li estis la plej altkreska kaj forta viro en la kantono, kaj cetere bela kaj bonstatura. Li estis larĝa ĉe la ŝultroj, kaj maldika ĉe la talio. Liaj manoj estis tiel graciaj, kiel se li neniam laborus laciĝe. La haroj estis brunaj, kaj la vizaĝo hela. Post kelktempa loĝado en la arbaro, lia aspekto fariĝis pli severa ol antaŭe. Liaj rigardoj akriĝis, la brovoj fariĝis pli longharaj, kaj tiuj muskoloj, kiuj sulkigis lin, estis fingrodikaj ĉe la nazsupro. Estis tuj videble, kiom la supra parto de la frunto antaŭstaras pli ol la malsupra. La lipoj estis pli kunpremitaj, ol pli frue, la tuta vizaĝo pli malgrasa kaj la grandaj

makzeloj pli videblaj. La korpo fariĝis pli malgrasa, sed ĝiaj muskoloj fortikaj kiel fero. La hararo rapide griziĝis.

Juna Tord ne povis satiĝe vidi tiun ĉi viron. Ion samgrade belegan aŭ grandiozan li ne vidis pli frue. Laŭ lia imago tiu- ĉi staris alta kiel la arbaro, forta kiel la ŝaŭma ondaĵo de la marbordo.

Li servis al li, kiel al majstro, kaj adoris lin, kiel ian dion. Ŝajnis evidente, ke Tord devas porti la ponardegojn, hejmentiri ĉasaĵojn, alporti akvon kaj bruligi fajron. Berg Altulo akceptis ĉiun lian servon, sed diris preskaŭ neniam afablan vorton al li. Li malestimis lin, ĉar li estis ŝtelinto.

La senpaculoj ne vivis rabistan vivon, sed nutris sin per ĉasado kaj fiŝkaptado. Se Berg Altulo ne estus mortiginta sanktan viron, la kamparanoj estus baldaŭ ĉesigintaj la persekutadon, lasante lin vivi pace en la sovaĝejo. Sed nun ili atendis grandan malprosperon al la regiono, ĉar tiu, kiu batis serviston de Dio, ankoraŭ ne estis punita. Kiam Tord kun ĉasaĵoj venis la valon, oni promesis al li grandajn posedaĵojn kaj pardonon pri lia propra krimo, se li montros al ili la vojon al la kaverno de Berg Altulo, por ke ili povu kapti lin, dum li dormas. Sed la junulo ĉiam rifuzis, kaj, se iu sekrete postsekvis lin, li trompis ruze per eraravojo, ĝis la persekutanto cedis.

Ĉe iu okazo Berg demandis, ĉu la loĝantaro ne volas instigi lin al perfido, kaj aŭdinte, kiom oni promesis, kiel salajron, li mokplene diris, ke Tord estas malsaĝa, rifuzante tian proponon.

Tord tiam ekrigardis lin tiel, ke Berg Altulo ne alitempe vidis similan rigardon. Tiel ne rigardis linbelulino en lia junaĝo, nek liaj edzino aŭ infanoj. "Vi estas mia majstro, mia elektita estro," esprimis tiu ĉi rigardo. "Vi batu kaj insultu min kiom ajn. Mi tamen restos fidela."

Post tio Berg Altulo pli multe observis la knabon, kaj trovis, ke li estas kuraĝa por faroj, sed timema por parolo. La morto ne teruris lin. Li prefere iris sur la lagojn, kiam ili ĵus glaciigis, kaj printempe sur la marĉojn, kiam ili estas plej danĝeroplennaj kaj la naĝaĵo kaŝata de riĉe florantaj erioforo kaj marĉrubusoj. Ŝajnis al li urĝe meti sin en danĝeroj, kvazaŭ kiel anstataŭo de la maraj blovegoj kaj teruroj, kiujn li ne plu trovis. Nokte li timis en la arbaro, kaj eĉ meze de tago lin povis timigi la plej mallumaj branĉaĵoj aŭ la disdirektaj radikoj de blovege faligita pino. Sed pri tio, demandite de Berg Altulo, li tiom trohontis, ke li ne povis respondi.

Tord ne kutimis dormi plej interne en la kaverno kaj en la lito preparita proksime al la fajro, kiu moliĝis per musko kaj varmiĝis per feloj, sed ĉiunokte, kiam Berg estis endormiĝinta, li rampis al la enirejo, kaj kuŝiĝis tie sur ŝtonplato. Berg atentis tion ĉi, kaj, kvankam bone

komprenante la kaŭzon, li demandis kial. Tord ne klarigis. Por eviti demandojn, li du noktojn ne dormis apud la pordo, sed poste li reprenis sur sin la gardadon.

Iun nokton, kiam la blovneĝo fumis ĉirkaŭ la arbosuproj kaj penetris en plej densajn branĉetarojn, la flirtantaj neĝeroj enpenetris ankaŭ la kavernon de la senpaculoj. Tord, kuŝante tre proksime apud la ŝtonbarita enirejo, estis kovrita de degelanta neĝamaso, kiam li vekigis matene. Post kelkaj tagoj li malsaniĝis. La pulmoj siblis, kaj vastiĝante por enspiri, ili preskaŭ tranĉe doloris. Li ne enlitiĝis dum lia forto daŭris, sed iun vesperon, klinante sin por blovi la fajron, li falis kaj restis kuŝanta.

Berg Altulo admonis lin iri en sian liton. Tord ĝemis pro doloro, sed ne kapablis stariĝi. Berg tial metis sub li la brakojn, kaj levis lin tien. Sed li sentis, kvazaŭ li estus tenanta malsekan serpenton, kaj sur la lango estis gusto, kvazaŭ li manĝus malsanktan ĉevalviandon, — tiel malagrade estis al li tuŝi tiun ĉi malestimindan ŝtelinton.

Li sternis sur lin sian propran ursofelon, kaj donis al li akvon. Li ne povis fari pli. Cetere la malsano ne fariĝis danĝera, kaj Tord baldaŭ resaniĝis. Sed pro tio, ke Berg estis devinta fari liajn agojn, kaj esti lia servanto, ili kvazaŭ proksimiĝis unu al la alia. Tord kuraĝis paroli, kiam Berg dum la vesperoj sidis en la kaverno, tranĉante sagotrunkojn.

—Vi estas el eminenta familio, Berg, — diris Tord. — La plej riĉaj en la valo estas viaj parencoj. Viaj praparencoj servis al la reĝoj, kaj batalis en iliaj gardantaroj.

—Plej ofte ili batalis en la ribelantaroj, farante al la reĝoj ĉian malhelpon, — respondis Berg Altulo.

—Viaj praparencoj aranĝis grandajn mezvintrajn festojn, kaj same faris ankaŭ vi mem, dum vi sidis en via bieno. Cento da homoj povis sidi en via granda ĉambregdomo konstruita jam antaŭ ol sankta Olof baptis tie ĉi en Viken. Vi posedis antikvajn arĝentkalikojn kaj grandajn trinkkornojn, kiuj plenaj de medo rondiris de viro al viro.

Berg Altulo ree rigardis devigite la knabon. Tiu sidis kun la piedoj pendantaj ekster la lito, kaj kun la kapo apogita sur la manoj, per kiuj li ankaŭ fortenis la malordan haramason, kiu emis fali antaŭ la okulojn. Sekve de la malsano la vizaĝo estis pala kaj nobla, kaj la febroydaŭre briligis la okulojn. Li ridetis pri la bildoj, kiujn li imagis al si: pri la ornamita ĉambrego, pri la arĝentaj kalikoj, pri la feste vestitaj gastoj, kaj pri Berg Altulo sidanta sur la mastrobenko en la ĉambrego de siaj patroj. Al la bienuro ŝajnis, ke neniu pli frue rigardis lin tiel admire, aŭ trovis lin tiel admirinda en festaj vestoj, kiel tiu ĉi junulo trovis lin en la multeuzitaj felvestoj.

Li sentis pro tio kaj korluŝon kaj koleron. Tiu ĉi malnobla ŝtelinto ne rajtis admiri lin.

—Ĉu do ne estis festoj en via hejmo? — li demandis. Tord ekridis.

—Tie, sur la rokinsuleto, ĉe patro kaj patrino! Patro ja rabas pereintajn ŝipojn, kaj patrino estas sorĉistino. Ne niu volus veni al ni.

—Ĉu via patrino estas sorĉistino?

—Jes, — respondis Tord, neniel hontante aŭ ŝancelante. — Dum blovegoj ŝi sur foko radjas renkonte al tiuj ŝipoj, kiujn la ondegaj superakvas, kaj la tiam tiuj, kiuj estas ĵetataj en la maron estos ŝia akiraĵo.

—Kial ŝi bezonas ilin?

—Ho! sorĉistino ĉiam bezonas mortintojn. Kredeble ŝi kuiras ŝmiraĵojn el ili, aŭ eble ŝi manĝas ilin. Dum lunlumaj noktoj ŝi sidas en la bordondaro, kie ĝi estas plej blanka, kaj la ŝaŭmo ŝprucas super ŝin. Oni diras, ke ŝi serĉas fingrojn kaj okulojn de pereintaj infanoj.

—Tio estas abomena, — diris Berg.

La knabo respondis kun senlima konvinko:

—Tio estas abomena al aliaj, sed ne al sorĉistinoj. Ili nepre agas tiel.

Berg Altulo trovis, ke jen estas nova maniero juĝi pri la mondo kaj la okazoj.

—Ĉu ŝtelistoj nepre devas ŝteli, kiel sorĉistinoj nepre sorĉas? — li malafable demandis.

—Jes, — respondis la knabo, — ĉiu nepre faros tion, kio estas decidita al li. — Sed plue li diris kaŝeme ride-tante: — Sed ankaŭ ekzistas ŝtelistoj neniam ŝtelintaj.

—Vi eldiru, kion vi aludas! — diris Berg.

La knabo daŭris rideli kaŝeme, fiera, ĉar li estis nesolvebla enigmo.

—Estas kvazaŭ paroli pri birdoj neniam flugantaj, kiam oni parolas pri ŝtelistoj neniam ŝtelantaj.

Berg Altulo ŝajnis sin malsaĝa por ekscii ion.

—Neniu estus ja nomata ŝtelisto, se li ne estus ŝtelinta, — li diris.

—Ne, certe ne, — diris la knabo kunpremante la lipojn, kvazaŭ por enbari la vortojn. — Sed, se ies patro ŝtelis? — li post momento supozis.

—Bienojn oni heredas, — kontraŭdiris Berg Altulo, — sed ŝtelistnomon oni mem ciam havigas.

Tord silente ridis.

—Sed, se ies patrino insiste petas, ke oni prenu sur sin la krimon de sia patro? Se oni tiam trompas la ekzekutiston, forkurante en la arbaron? Se iu estus kondamnite senpaca pro fiŝreto, kiun li neniam vidis?

Berg Altulo pugnobatis la ŝtontablon. Li estis kolera. Do la bela junulo detruis sian tutan vivadon. Nek amon, nek posedaĵojn, nek estimon de homoj li akiros post tio. La mizera zorgado pri manĝo kaj vestoj estas ĉio, kio restas al li. Kaj la malsaĝulo plue igis lin, Berg Altulo,

malestimi senkulpulon. Li riproĉis lin per severaj vortoj, sed Tord eĉ ne timis tiom, kiom malsana infano timas sian patrinon riproĉanta ĝin tial, ke ĝi malvarmumiĝis per irado en printempa rivereto.

Ĉe unu el la larĝaj, arbarkovritaj montoj estas malhela lageto. Ĝi estas kvarflanka, kun tiom rektaj bordoj kaj akraj anguloj, kvazaŭ ĝi estus fosita de homoj. Ĉe tri flankoj ĉirkaŭis ĝin krutaj montdeklivoj, kie abioj per brakodikaj radikoj firmigis sin. Malsupre, ĉe la lageto, kie la tero iom post iom estis forakvumita, la radikoj elstaris el la akvo nudaj kaj kurbaj kaj mirinde plektitaj ĉiu kun aliaj. Estis kvazaŭ nekalkulebla amaso da serpentoj, kiuj samfoje volis rampi el la lageto, sed interplektaĉiĝis restiĝante. Aŭ ĝi estis amaso da malpaliĝintaj skeletoj de dronintaj granduloj, kiujn la lageto iam volis ĵeti sur la bordon. Brakoj kaj femuroj kurbigis sin ĉiu ĉirkaŭ aliaj, la longaj fingroj fosis en la ŝtonfundon mem por trovi firmecon, la grandegaj rifoj formis arkojn, sur kiuj kreskis multaĝaj arboj. Ankaŭ okazis, ke cedis la fortikaj grandulfingroj, per kiuj la abioj sin firme tenadis, kaj forta nordblovego iam ĵetis abion el la montdorso je granda interspaco malsupren en la lageton. Kun la supro antaŭe ĝi profrunden penetris en la ŝlimfundon, kaj restis tie. Nun ĝia branĉaro estis bona rifuĝejo por la fiŝidetoj, sed la radikaro estis superla akvo, simile al

multbraka monstro, kaj ĝiaj nigraj radikbranĉoj kun-efikis igi la lageton malĉarma kaj terura.

Ĉe la kvara flanko, la montoj malaltiĝis. Ŝaŭma toren-teto tie forfluigis la akvon de la lago. Antaŭ ol tiu ĉi rivereto trovis sian sole eblan vojon, ĝi devis serĉi inter ŝtonoj kaj tufoj, kaj tiel ĝi formis tutan mondeton da insuloj, kelkaj nur tufoj, aliaj portantaj dudekon da arboj.

Tie ĉi, kie la ĉirkaŭstarantaj montoj ne ombrigis ĉiun lumon, ankaŭ estis foliarboj. Tie ĉi staris soifantaj grize-verdaj ulnoj, kaj brilfoliaj salikoj. La betulo staris tie, — kiel ĝi estas ĉie, kie la pinglarboj estas forigitaj, — kaj la sovaĝa prunujo kaj la sorpujo, la du randantoj de arbaraj herbejoj, kiujn ili plenigas je bonodoro kaj ornamas per beleco.

Tie ĉi, ĉe la elfluejo, ankaŭ estis viralta kanaro, kiu efikis, ke la sunlumo ŝajneverde trafis la akvon, kiel ĝi ŝajnas sur la musko en la efektiva arbaro. En la kanaro estis malplenaj lokoj, malgrandaj rondaj lagoj, kie naĝis nimfeoj. La altaj kanoj kun afabla seriozeco rigardis tiujn ĉi sentemajn belulinojn, kiuj malkontente ŝirmis per ledefortikaj ingoj siajn blankajn foliojn kaj flavajn pistilojn, kiam ne vidiĝis la suno.

En sunbrila tagola senpaculoj alvenis tiun ĉi lageton por fiŝkapti. Ili iris en la akvo ĝis paro da grandaj ŝtonoj en la interno de la kanejo, kaj tie ili sidadis ĵetante logi-

lojn al la grandaj verdestriaj ezokoj, kiuj dormis ĉe la akvosupraĵo.

Tiuj ĉi viroj, ĉiam vagantaj en arbaro kaj sur montoj, estis tiom venintaj sub la potencon de la naturfortoj, kiom kreskaĵoj kaj bestoj, kvankam ili mem nenion sciis pri tio. Dum sunbrilo ili estis malkaŝemaj kaj kuraĝaj, sed, vespere, kiam la suno estis malaperinta, ili silentiĝis, kaj la nokto, — kiu al ili ŝajnis multe pli granda kaj potenca ol la tago, — faris ilin timeme senpovaj. La verda lumo etendiĝanta en la kanaro, — koloriganta la akvon orstrie bruna kaj nigreverda, — nun kaŭzis al ili impreson de ia mirindaĵo. La rigardoj estis ĉiudirekte baritaj. Nerimarkebla venteto iam movis la kanojn; ili tintis, kaj la longaj rubandosimilaj folioj flirtis antaŭ la vizaĝoj de la viroj. En siaj grizaj felvestoj, ili sidis sur la grizaj ŝtonoj. La nuancoj de la feloj imitis la makulojn de la likenkovritaj kaj malglatiĝintaj ŝtonoj. Ĉiu ŝajnis al la alia kvaŭzaŭ, dum siaj silentado kaj nemovado, ŝanĝiĝinta je ŝtona statuo. Sed en la kanejo movis sin grandegaj fiŝoj kun perlamotbrilantaj dorsoj. Kiam la viroj, ĵetinte la hokojn, vidis la ondringojn multobliĝantajn en la kanejo, ŝajnis al ili, ke la movo pli kaj pli fortiĝas, ĝis ili ektrovis, ke ĝin ne kaŭzis iliaj ĵetoj. Lagloĝantino, duone homa kaj ceterparte brilanta fiŝo, dormante kuŝis en la akvosupraĵo. Ŝi kuŝis sur la dorso kun la tuta korpo kovrita de la akvo. La ondoj tiom proksimiĝis ĉirkaŭ ŝia korpo, ke la viroj ne

pli frue rimarkis ŝin. Estis ŝia spirado, kiu malhelpis la halton de la ondado. Sed ne estis mirinde, ke ŝi kuŝas tie ĉi, kaj, en la plej proksime sekvanta momento, kiam ŝi ne plu estis videbla, ili mem ne sciis, ĉu ŝi estis aŭ ne estis nur erarvidaĵo.

Tra la okuloj ĝis la cerbo penetris la verda lumo, kiel malforta ebrio. La viroj sidis, rigardante kun malfortaj pensoj, vidante inter la kanoj vidaĵojn, kiujn ili ne kuraĝis konfidi unu al la alia. La fiŝkaptado prosperis malbone. La tago estis dediĉata al songoj kaj aperaĵoj.

Aŭdiĝis remilmovoj en la kanaro, kaj ili ekskuiĝis, kvazaŭ vekĝante. En sekvinta momento vidiĝis kverk-trunka boato, primitiva, senarte kavigita, muska en ĉiuj fendetoj, kaj kies remiloj estis mallarĝaj kiel bastonoj. Remis junulino kolektinta nimfeojn. Ŝia malhelebruna hararo estis kunligita je grandaj plektoj, kaj ŝiaj okuloj estis grandaj kaj malhelaj, cetere ŝi estis rimarkinde pala. Sed ŝia paleco nuanciĝis rozkoloro, ne grize. La vangoj ne estis pli koloraj ol la cetero de la vizaĝo, eĉ preskaŭ ne la lipoj. Ŝin vestis blanka toljako kaj leda zono kun ora seruro. La jupo estis blua kun ruĝa borderaĵo. Ŝi remis proksime preter la senpaculoj, ne vidante ilin. Tiuj tenis sin senmovaj, tamen ne pro timo esti vidataj, sed por vidi ŝin, kiel eble plej bone. Kiam ŝi malaperis, ili kvazaŭ ŝanĝiĝis el ŝtonbildoj en homojn. Ridetante ili rigardis unu la alian.

—Ŝi estis blanka kiel la nimfeoj, — unu diris. — Ŝi estis malhelokula, kiel la akvo tie sub la abiradikoj.

Ili estis tiel viglaj, ke ili ridis, — ridis efektive, kiel pli frue neniam estis ridate ĉe la lageto, — tiom, ke la montmuroj tondris pro eĥoj, kaj la abiaj radikoj malprenis siajn firmajojn pro teruro.

—Ĉu vi opinias, ke ŝi estas bela? — demandis Berg Altulo.

—Ho! mi ne scias, mi vidis ŝin nur mallongtempe. Eble ŝi estas.

—Vi eble ne kuraĝis rigardi ŝin. Certe vi kredis, ke ŝi estas la laga virgulino.

Kaj ree ilin skuis la sama grandega gajeco.

Tord en sia infanaĝo unuokaze vidis dronintan viron. Li trovis la kadavron sur la marbordo en taga lumo, kaj tiam li ne timis, sed en la nokto venis al li teruraj sonĝoj. Li vidis maron, kie ĉiu ondo rulis ĝis liaj piedoj droninton. Li ankaŭ sonĝis, ke ĉiuj insuletoj kaj insuloj de la arĥipelago estas kovritaj je dronintoj, senvivaj kaj apartenantaj al la maro, kvankam ili povis paroli kaj moviĝi kaj minaci al li per velkintaj blankaj manoj.

Tiel okazis ankaŭ nun. La knabino, kiun li vidis en la kanejo, reaperis en liaj sonĝoj. Li renkontis ŝin sur la fundo de la lageto, kie la lumo estis ankoraŭ multe pli verda ol inter la kanoj, kaj la tempo sufiĉis tiom, ke li

povis vidi, ke ŝi estas bela. Li songis, ke li sidas sur la granda abiradiko tie en la malhela laĝeto, — sed la abio tiel svingiĝis kaj balanciĝis, ke li jam estis tute en akvo. Tiam ŝi aperis sur la malgrandaj insuletoj. Sub la ruĝaj sorpujoj ŝi staris, ridante al li. En la lasta songovido li tiel evoluigis la aferon, ke ŝi kisis lin. Tiam jam estis mateno; li aŭdis, ke Berg Altulo jam estis leviĝinta, sed Tord fermis la okulojn por povi daŭrigi la songon. Vekiĝante, li sentis kvazaŭ kapturton kaj senkonscion pro la okazoj de la nokto. Nun li pensis pri la jmmilino multe pli, ol la hieraŭan tagon.

Ĉe la vesperigo, li ekpensis demandi al Berg Altulo, ĉu tiu konas ŝian nomon.

Berg rigardis lin kvazaŭ esplorante.

—Eble estas plej bone, ke vi tuj scios tion, — li respondis. — Ŝi estas Un. Ni estas parencoj.

Tord sciis jam, ke Berg Altulo vagis senpace en la arbaro kaj sur la montoj pro instigo de tiu ĉi pala junulino. Li provis rememori ĉion, kion li scias pri ŝi.

Un estis filino de riĉa bienulo. Ŝia patrino estis mortinta, kaj tial ŝi mastrumis la domon de sia patro. Tio plaĉis al ŝi, ĉar ŝi volis regi, kaj ŝi neniam deziris edziniĝi.

Un kaj Berg Altulo estis gekuzoj, kaj oni longtempe rakontis, ke Berg plivole sidis kune kun Un kaj ŝiaj servantinoj, ol laboris ĉe sia bieno. Lia edzino tiam invitis al la granda mezvintra festo monaĥon el Dragsmark, vo-

lante, ke tiu riproĉu al Berg pro tio, ke li forgesas ŝin pro alia virino. Pro sia aspekto tiu monaĥo estis malamata de Berg, kiel de multaj aliaj. Li estis tre grasa kaj tute blanka. La harrondo ĉirkaŭ lia nuda verto estis blanka, — la brovoj super la senbrilaj okuloj, la vizaĝhaŭto, la manoj, kaj la mantelo, ĉio estis blanka. Multaj homoj ne povis toleri vidi lin. Ĉe la festena tablo, inter ĉiuj gastoj, tiu ĉi monaĥo diris:

—Oni kutime diras, ke la kukolo estas plej malbona el ĉiuj birdoj, ĉar ĝi ne nutras en propra nesto siajn idojn; sed tie ĉi sidas viro, kiu ne zorgas pri hejmo kaj infanoj, sed serĉas ĉarmon ĉe fremda virino. Lin mi volas nomi plej malbona viro. —Li estis kuraĝa, kaj opiniis, ke liaj vortoj pli efikos, se multaj aŭdos ilin. Un tiam stariĝis.

—Tio ĉi, Berg, estas dirita al vi kaj al mi, — ŝi diris. — Mi neniam estis same ofendita, sed mia patro ja ne estas kun mi ĉe la festeno.

Ŝi volis foriri, sed Berg postkuris ŝin.

—Vi ne moviĝu! — ŝi diris. — Mi neniam volos revidi vin.

Atinginte ŝin en la pordĉambreto, li demandis, kion li devus fari, por ke ŝi restu. Kun flamaj rigardoj ŝi respondis, ke li mem devus scii tion. Tiam Berg eniris, kaj mortigis la monaĥon.

Berg kaj Tord nun same pensis, kaj Berg post momento diris:

—Vi devus esti vidinta ŝin, Unon, kiam la blanka monaĥo estis falinta. Malbenante ŝin la mastrino kolektis ĉirkaŭ si la malgrandajn infanojn. Ŝi turnis iliajn vizaĝojn al ŝi, por ke ili eterne memoru tiun, kiu igis ilian patron murdinto. Sed Un staris trankvile kaj tiel bela, ke la viroj tremis. Ŝi dankis min pro la faro, kaj petis min tuj iri en la arbaron. Ŝi admonis min ne fariĝi rabisto, kaj ne uzi la tranĉilon, antaŭ ol mi povos fari tion por same justa afero.

—Via faro altigis ŝin, — diris Tord.

Berg Altulo ree rimarkis ion ĉe la knabo, pri kio li jam pli frue miris. Li estis kvazaŭ idolano, eĉ pli malbona ol idolano, — li neniam mallaŭdis maljustaĵojn. Li ne sentis responddevon. Tio okazas, kio devas okazi. Dion, kaj Kriston, kaj la sanktulojn li konis, sed nur laŭnome, kiel oni konas diojn de fremdaj nacioj. La fantomoj de la arĥipelago estis liaj dioj. Lia sorĉpova patrino instruis lin kredi al la animoj de la mortintoj.

Tiam Berg Altulo komencis agadon same malsagacan, kiel fari ŝnuregon por sia propra kolo. Al la rigardo de tiu ĉi nescianto, li prezentis la grandan Dion, la Sinjoro de justeco, la venĝanto de krimoj, kiu ĵetas la kulpulojn en eternan doloron. Li instruis lin ami Kriston kaj lian patrinon kaj la sanktajn geviroj, kiuj kun levitaj manoj kuŝas antaŭ la trono de Dio, por savi la kulpularon el la kolero de la granda venĝanto. Li rakontis al li ĉion, kion

la homoj faras por pacigi la koleron de Dio. Li montris al li la pilgrimarojn irantajn al sanktaj lokoj, la sinpunantajn turmentulojn, kaj la mondevitadon de la monaĥoj.

Ju pli li rakontis, des pli la knabo fervoriĝis kaj paliĝis, liaj okuloj pli malfermiĝis, kvazaŭ pro teruraj vidaĵoj. Berg Altulo volis ĉesi, sed torento da pensoj kaptis lin, kaj li daŭris paroli. La nokto ĉirkaŭis ilin, la nigra arbarnokto, en kiu la lupoj blekegas. Dio estis tiel proksime, ke ŝajnis al ili, ke lia trono kovras la stelojn, kaj la punanĝeloj malleviĝis al la arbosuproj. Sed sub ili la flamoj el la fajra tersubo atingis ĝis la tavolo de la tero, avare lekante tiun ĉi tremantan rifuĝejon de ĉagrenpremataj homgeneracioj.

Estis aŭtuno kaj forta blovo. Tord iris en la arbaron sola por observi kaptilojn, dum Berg Altulo sidis hejme por fliki siajn vestojn. La vojo de Tord kondukis lin sur la dorson de arboplena altaĵo. Tie estis larĝa vojeto.

Laŭlonge de la vojeto la velkintaj folioj estis murmurante kaj rondmoviĝe surprprenportataj de ĉiu ekblovo, kiu penetris en la densaĵon de la arboj. Fojon post fojo ŝajnis al Tord, ke iu venas post li. Li ofte rigardis malantaŭen, sed komprenis, ke estas la folioj kaj la blovo, kaj pluiris. Ree ekirante, li aŭdis, kvazaŭ iu dancus per silkaj piedoj sur la deklivo. Malgrandaj infanpiedoj venis, frapetante. Nimfo kaj driado ludis post li. Turniĝinte, li

vidis nenion, ĉiam nenion. Irante plu, li pugnigis la manon al la murmurantaj folioj.

La bruado ne silentiĝis pro tio, sed ŝanĝis tonon. Kvazaŭ siblis kaj fajfis post li. Granda vipuro alglitis. La venegutanta lango pendis el la buŝo, kaj la korpo brilis inter la velkintaj folioj. Apud la serpento paŝadis lupo, granda malgrasa grizpiedulo, pretiganta sin alpendiĝi per mordo en lia nuko, dum la vipuro rampos inter la piedojn, mordante lin en la kalkano. Jam ambaŭ silentis, kvazaŭ por alproksimiĝi nerimarkate, sed tuj ree la siblado kaj la spiregado malkaŝis ilin, kaj iam ŝajnis, ke la ungegoj de la lupo tinte frapas ŝtonon. Tord nepre plirapidis, sed la bestoj venis same post li. Kvazaŭ kredante, ke ili estas proksimaj je du paŝoj, kaj pretaj por alsalto, li turnis sin. Jen estis nenio, kaj tion li estis ja scianta dum la tuta tempo.

Li sidiĝis sur ŝtonon por ripozi. Tiam moviĝis ĉe liaj piedoj la sekaj folioj, kvazaŭ por amuzi lin. Jen estis ĉiuj folioj de la arbaro: flavaj malgrandaj betulfolioj, ruĝe makulaj sorpujfolioj, la sekaj brunenigraj folioj de la ulno, la fortiliaj brileruĝaj de la tremolo, kaj la flaveverdaj de la saliko. Aspektŝanĝitaj kaj difektitaj estis ili, kaj tre malsimilaj al la lanugmolaj, belformaj tavolotoj disetendiĝintaj el la burĝonoj antaŭ kelkaj monatoj.

—Kulpuloj, — diris la knabo, — kulpuloj, nenio estas pura antaŭ Dio. Ĉu la flamoj de Lia kolero jam trafis vin?

Rekomencante sian iradon, li vidis, ke la arbaro ondas pro la blovo kiel maro, sed sur la vojeto estis senmova trankvileco. Sed li aŭdis tion, kion li ne sentis. La arbaro estis plena de voĉoj.

Estis kvazaŭ subdiroj, kvazaŭ plendkantoj, kvazaŭ laŭtaj minacoj, kvazaŭ tondraj ĵuroj. Ridiĝis, plendiĝis, — estis kvazaŭ bruado de multaj homoj. Tio, kio instiĝis, kio murmuris kaj siblis, kio ŝajnis esti io, sed estis nenio, sovaĝiĝis liajn pensojn. Li ree sentis agonion, kiel kiam li kuŝis sur la fundo de la kaverno, dum la homĉaso preteriris tra la arbaro. Ree li aŭdis krakadon de branĉoj, multepezajn hompaŝojn, tintadon de armiloj, la tondrajn kriojn, la sangavaran bruadon, kiu tiam akompanis la homamason.

Sed la arbarblovego ne similis nur tion. Jen estis io alia, io ankoraŭ pli terura, voĉoj, kiujn li ne povis solvi, miksaĵo da voĉoj, kiuj ŝajnis paroli fremdan lingvon. Li estis aŭdinta blovegojn, pli potencajn, ol tiu ĉi, siblantajn tra ŝipaj ŝnuraroj. Sed neniam li aŭdis blovegon ludantan sur pli multkorda harpo. Ĉiu arbo posedis propran voĉon, la abio ne siblis kiel tremolo, nek la poplo kiel sorpujo. Ĉiu montfendo havis sian tonon, kaj ĉiu monta deklivo propran sonon. Kaj la plaŭdo de la riveretoj, kaj la bleko de la vulpoj kunsonis kun la monstra arbarblovego. Ĉi tion li povis solvi, sed ankaŭ aŭdiĝis aliaj, pli enigmaj sonoj. Tiuj kaŭzis, ke interne de li estis

kriado, rikanado kaj ĝemado konkurantaj kun la blovego.

Li ĉiam timis, kiam li estis sola en la arbarkrepusko. Li ŝatis senliman maron kaj nudajn rokinsulojn. Fantomoj kaj ombroj kaŝas sin inter la arboj.

Tiam li subile eksciis, kiu parolas per la blovego. Estas Dio, la granda venĝanto, la Dio de justeco. Li persekutas lin pro la krimo de la kolego. Li postulas, ke li liveru al Lia venĝo la murdinton de la monaĥo.

Tord komencis paroli tie dum la blovego. Li konfesis al Dio tion, kion li volis fari, sed ne kapablis. Li volis paroli al Berg Altulo por peti lin pacigi Dion, sed li estis tro timema. La trotimeco silentigis lin.

—Eksciinte, ke la justecamanta Dio regas la teron, — li kriis, — mi komprenis, ke li estas perdota. Dum longaj noktoj mi ploris pri mia amiko. Mi scias, ke Dio trovos lin, kiel ajn li sin kaŝas. Sed mi ne kapablis paroli, nek instrui al li komprenon. Mi estis sen vortoj, ĉar mi tiel amas lin. Ne postulu, ke mi parolu al li; ne postulu, ke la maro estu alta kiel la montoj!

Li silentiĝis, kaj en la blovego silentiĝis tiu forta voĉo, kiu al li ŝajnis esti la voĉo de Dio. En momento, ĉio ŝanĝiĝis ĝis senventeco, kun forta sunbrilo kaj plaŭdo, kiel de remiloj, kaj mallaŭta bruoj, kiel de fortikaj kanfolioj. Tiuj ĉi dolĉaj sonoj aperigis al li la bildon de Un. Senpaculo nenion povas gajni, ne bienon, ne virinon, nek esti-

mon ĉe viroj. Se li perfidos Bergon, li estos ŝirmata de la leĝo. Sed Un certe amas Bergon pro tio, kion li faris por ŝi. Ĉio tio estis embarasa.

La blovego refortigis, kaj Tord ree aŭdis paŝojn post si, kaj iam klopodan spiradon. Nun li ne kuraĝis rigardi malantaŭen, ĉar li sciis, ke tie estas la blanka monaĥo. Li venas el la festeno en la la domo de Berg Altulo, sanga, kaj kun hakilvundo sur la frunto. Kaj li subdiris: — Perfidu lin, malkaŝu lin, savu lian animon! Liveru al la fajro lian korpon, kaj lia animo ne brulos! Liveru lin al longdaŭraj suferoj sur la turmentilo, por ke lia animo havu tempon por penti!

Tord kuris. Ĉio timiga, kio efektive estis nenio, kreskis ĝis teruro, kiam ĝi influis sur la animon. Li volis esti for de tio. Komencante kuri, li ree aŭdis la tondran teruran voĉon, kiu estas la voĉo de Dio. Dio mem incitis lin, por ke li malkaŝu la mortaginton. La krimo de Berg Altulo nun ŝajnis al li pli abomena ol iam pli frue. Senarmita viro estis mortigita, unu el la viroj de Dio estis trapikita per brilanta stalo. Tio estis spito kontraŭ la sinjoro de la mondo. Kaj la murdinto kuraĝas vivi! Li ĝojas pro la brilo de la suno, kaj pro la fruktoj de la tero, kvazaŭ la brako de la Ĉiopova ne povus atingi lin.

Li haltis, pugnigis la manojn, kaj kriis laŭtan minacon. Post tio li kvazaŭ frenezulo kuris el la arbaro, el la regno de teruro, ĝis la valo.

Tord nur diris sian intencon, kaj dek viroj tuj estis pretaj akompani lin. Oni decidis, ke Tord iros al la kaverno sola, por ke Berg ne malfidu. Sed sur sian vojon li disŝutos pizojn por ĝin signi al la viroj.

La senpaculo, kudrante, sidis sur la ŝtonbenko, kiam Tord envenis la kavernon. La fajro malmulte lumis kaj ŝajnis, ke la laboro malbone progresis. La koro de la knabo ŝvelis pro kompatato. Ŝajnis al li, ke la rava Berg Altulo estas malriĉa kaj malfeliĉa. Kaj lia sola havo, la vivo, estas forprenota de li. Tord komencis plori.

—Kio estas? — demandis Berg. — Ĉu vi estas malsana. Ĉu vi timas?

Por la unua fojo Tord nun rakontis pri timo.

—Estis malvarme en la arbaro. Mi aŭdis fantomojn, kaj vidis aĉaĵojn. Mi vidis blankajn monaĥojn.

—Morto de Dio, bubo!

—Ili kantis meson al mi la tutan vojon al Larĝmonto. Mi kuris, sed ili akompanis kantante. Ĉu mi neniam estos libera el tiu sonaĉo? Kion mi havas komune kun ili? Mi pensas, ke ili povus fari meson al unu, kiu pli multe hezonas tion.

—Ĉu vi frenezas tiun ĉi vesperon, Tord?

Tord parolis, apenaŭ sciante, kiajn vortojn li uzas. Jam li neniom trohontis. La parolado fluis de liaj lipoj neniom malhelpate.

—Ili ĉiuj estis blankaj monaĥoj, blankaj, mortpalaj. Ĉies manteloj estas sangmakulitaj. Ili tiras la kapuĉojn antaŭ la fruntojn, sed la vundoj tamen brilas sub ĝi. La granda, ruĝa fendo pro la hakilo.

—La granda, ruĝa fendo pro la hakilo?

—Ĉu mi hakis ĝin? Kial mi estas devigata vidi ĝin?

—La sanktuloj sciu tion, Tord, — diris Berg Altulo, pala kaj kun terura seriozeco, — ili sciu, kion signifas, ke vi vidis hakilvundon. Mi mortigis la monaĥon per tranĉilpikoj.

Tremante, Tord staris antaŭ Berg, kaj tordante la manojn.

—Ili postulas vin de mi. Ili volas min devigi perfidi vin.

—Kiuj? La monaĥoj?

—Ili, jes, la monaĥoj. Ili montras al mi imagajn vidaĵojn. Ili montras al mi ŝin, Un. Ili montras al mi brile-tantan sunlumigatan maron. Ili montras al mi la ripozejojn de la fiŝoj; tie estas dancado kaj gajeco. Mi fermas la okulojn, sed mi vidas malgraŭ tio. Lasu min! mi diras. Mia amiko murdis, sed li ne estas malbonulo. Forlasu min, kaj mi parolos al li, kaj li pentos, kaj faros sinpunon. Li konfesos sian kulpon, kaj iros al la tombo de Kristo. Ni akompanos unu la alian al lokoj tiel sanktaj, ke ĉiu proksimiĝanto estos pardonata pro ĉia kulpo.

—Kion respondas la monaĥoj pri tio? — demandis Berg. — Ili ne penas por savi mian animon. Ili volas vidi min sur turmentilo kaj en fajro.

—Ĉu mi perfidu mian plej karan amikon? — mi demandis al ili. — Tord daŭrigis. — Li estas al mi ĉio sur la tero. Li savis min de la urso, kies piedego kuŝis sur mia kolo. Ni kune suferis malvarmon kaj ĉian mizeron. Sian propran ursfelon li sternis sur min, kiam mi estis malsana. Mi portis por li brulaĵon kaj akvon; mi gardis lian dormon; mi trompis liajn malamikojn. Kial ili kredas, ke mi estas tia, ke mi perfidus amikon? Mia amiko libervole iros al la pastro por konfesi, kaj poste ni kune iros al la lando de paciĝo.

Berg serioze aŭskultis, per la rigardoj esplorante la vizaĝon de Tord.

—Vi mem iros al la pastro, kaj diros al li la veron, — li diris. — Vi ree devas esti inter homoj ...

—Ĉu estus helpo al mi, se mi irus sola? Pro via kulpo persekutas min la murdito kaj ĉiuj ombroj. Ĉu vi ne vidas, kiom mi abomenas vin? Vi levis la manon kontraŭ Dio mem. Neniu krimo estas pli malbona, ol via. Mi pensas, ke mi devos ĝoji, vidante vin sur la ekzekutilaro. Feliĉa estas tiu, kiu estas punata en tiu ĉi mondo, kaj do liberiĝos el la estonta kolero. Kial vi rakontis al mi pri la justa Dio? Vi igis min perfidi vin. Helpu al mi eviti tiun kulpon! Iru al la pastro!

Kaj li genufleksis antaŭ Berg.

La murdinto metis la manon sur lian kapon, kaj rigardis lin. Li komparis sian kulpon kun la timego de la kolego, kaj ĝi alperis granda kaj terura al lia animo. Li vidis sin mem batalantan kontraŭ la mondreganta volo. La pento eniris lian koron.

—Ve, ke mi agis tiel! — li diris. — Tio, kio atendas min, estas tro maldolĉa por renkonti libervole. Se mi liveros min al la pastroj, ili turmentos min per longdaŭraj suferoj. Ili rostos min ĉe malforta fajro. Ĉu tiu ĉi mizera vivo, kiun ni pasigas en embarasego kaj mankoj, ne estas sufiĉa puno? Ĉu mi ne vivas for de amikoj kaj ĉio, kio ĝojigas viron? Kio estus postulata plue?

Kiam li parolis tiel, Tord restariĝis fervore, kvazaŭ freneza pro teruro.

—Ĉu vi pentas? — li kriis. — Ĉu miaj vortoj povas tuŝi vian koron? Venu tuj! Kiel mi estus kredinta tion ĉi! Venu kun mi por forkuri! Ankoraŭ estas tempo.

Berg Altulo ankaŭ suprenĵetiĝis.

—Vi do faris tion?

—Jes, jes, jes. Mi perfidis vin, sed venu tuj. Venu, ĉar vi povas penti! Ili preterlasos nin. Ni evitos ilin!

La murdinto kliniĝis ĝis la fundo, kie kuŝas lia batallakilo heredita post la patro.

—Vi, filo de ŝtelisto! — li diris sibilante. — Vin mi fidis kaj amis.

Vidante, ke li kliniĝas al la hakilo, Tord sciis, ke lia propra vivo estas en danĝero. Li do ekprenis el la zono sian propran hakilon, kaj batis Bergon, antaŭ ol tiu relieviĝis. La akro fajfis en la aero, kaj enpenetris la klinitan kapon. Berg Altulo ĵetiĝis sur la fundo, kun la kapo unue. Sango kaj cerbo elŝprucis; la hakilo falis el la vundo. En la malorda hararo Tord vidis grandan ruĝan fendon pro hakilo.

Jen enkuris la vilaĝanoj. Ili ĝojiĝis, kaj laŭdis la faron.
—Nun via afero statas bone, — ili diris al Tord.

Tord rigardis siajn manojn, kvazaŭ vidante katenojn, per kiuj li estis igata mortigi tiun, kiun li amis. Ili estis, kiel tiuj de Fenrislupo¹ forgitaj el nenio. El la verda taglumo de la kanaro, en la ludado de la arbaraj ombroj, el la kanto de la blovego, el la brueto de folioj, el ĉarmo de songoj ili estis faritaj. Kaj laŭte li diris:

—Dio estas granda.

Sed ree lin okupis la antaŭaj pensoj. Li genustariĝis apud la mortinto, kaj ŝovis brakon sub lian kapon.

—Faru al li nenion! — li diris. — Li pentas; li volas iri al la sanktaj tomboj. Li ne estas mortinta; tamen ne kateni lin. Ni ĵus estis pretaj por ekmigri, kiam li falis. La blanka monaĥo kredeble ne volis, ke li pentu, sed Dio, Dio de la justeco, amas la pentadon.

1 Fenrislupo estis monstro en la norda mitologio.

Li restis kuŝanta apud la mortinto, parolis al li kaj petis lin vekigi. La vilaĝanoj faris portilon el kelkaj ponardegoj. Ili volis porti la restaĵon de la bienulo al lia domo. Ili respektis la mortinton, kaj parolis mallaŭte en lia proksimeco. Kiam ili levis lin sur la portilon, Tord stariĝis, skuis la harojn for de la vizaĝo, kaj diris per voĉo tremanta pro singultoj:

—Do diru al Un, kiu igis Berg Altulon esti murdanto, ke lin murdis Tord, la fiŝkaptisto, kies patro rabas pereintajn ŝipojn, kaj kies patrino estas sorĉistino, ĉar li instruis lin, ke justeco estas la fundamento de la mondo.

Selma Lagerlöf

El la rakontaro "Nevideblaj ligiloj"

La gigantino

Oni aranĝis geedziĝan feston, trioblan geedziĝon, kaj pri geedziĝo kaj ree pri geedziĝo oni parolis en la tuta smolanda vilaĝo. Kiam la paŝtistoknabo venis kun siaj kaproj, la virinoj diris: "Innaro, vi konas vojojn en la arbaro. Iru al la montmastrino kaj prunteprenu ŝiajn novedzinornaĵojn!"

Innaro tiam reiris for en la arbaron kaj kantis kaj kriis en sia betulŝela korno. Kiam li venis supren en la montfendo, Grimmo, la filino de la montmastrino, staris tie kombante siajn kvazaŭ haregoj malmolajn harojn.

"Panjo ne pruntedonos siajn novedzinornaĵojn antaŭ ol mi mem edziniĝos," ŝi diris kaj ekploris. "Sed se vi volas, vi certe povos rigardi ilin". Ŝi iom levis rokplataĵon, kaj sub ĝi ekbrilis sitelo, plena je plej pura arĝento.

Innaro iĝis pripensanta kaj staris balancanta sur piedo. "Ne ploru, Grimmo," li diris, "sed renkontu min ĉe la preĝeja pordego la geedziĝan tagon, kaj ni estos kvar paroj precize!" Tion ĉi aŭdis la montmastrino, kiu estis foririnta, sed ĝuste revenis al la hejmo kaj iris kun sia junipera bastonego tuŝante tiel, ke rokoj ruliĝis. "Mi povas aserti, ke ŝi estas bela, mia Grimmo," ŝi diris. "Mal-

mola kiel arboŝelo ŝi estas sur vangoj kaj oreloj, ĝuste tiel, kiel konvenas al juna gigantino. Sed io por io. Se ŝi estos via, vi devas promesi al mi, ke vi kiel edziĝan donacon donos al ŝi la sonorileton, kiu pendas sub la kolo de la ruĝa bovido tie malsupre. Ĝi sonas tiel forte, ke ĝi dum multaj jaroj malkvietigis mian dormon.”

Ŝi manmontris al la preĝeja altaĵo, kie sonorilejo staris kun konsekrita sonorilo sub la traboj. Innaro ektimis kaj kuris for malsupren de la monto.

Sed baldaŭ okazis la decidita edziĝotago, kaj kun kandeloj kaj regionaj muzikantoj la tri junaj paroj iris al la preĝejo. Ankaŭ Grimmo venis tiam el la arbaro kun sia tuta ornamaĵo. Nudpieda ŝi estis, kaj brunhaŭta, sed la vestaĵoj svingiĝis tiel kovritaj per arĝentaĵoj, ke ili tintadis kvazaŭ kiraso. Ŝi rektigis sin kaj ŝajnis tre feliĉa, kaj Innaro opiniis, ke ŝi aspektas tre impona. Ŝi etendis al li la grandegan manon, kaj li ne atentis reteni sian propran post la dorso, sed ili akompanis unu la alian kiel kvara paro en la preĝejon.

Kiam ŝi sidiĝis apud la aliaj sur la fianĉina benko, ĝi tuj rompiĝis je pecetoj. Tiam li enrulis grandan ŝtonon por la giganta fianĉino. Sed ŝi pezis tiom, ke restis postsignoj en la ŝtono, kiam ŝi restariĝis.

Ĉe la vesperiĝo, kiam Innaro kondukis ŝin al sia domo, ŝi malsatis. Ŝi kunpremis kvin panojn kiel unu solan kaj ŝmiris sur ĝi funton da butero. ”Tiu ĉi ne estos

granda buterpano,” ŝi diris, ”sed ĝi sufiĉas ja por la hodiaŭa vespero.”

La sekvintan tagon ŝi iris eksteren kaj ekkulturis kaj fosis, kaj post tiam ĉe bezono ŝi tiris kaj plugilon kaj fojnoŝarĝon. Por ĉiu manĝo ŝi manĝis kvaronbarelon da kaĉo, kaj la laktositelon ŝi malplenigis per unu gluto, sed Innaro ne bezonis havi tirbeston nek labori. Ĉe bela vetero li oportune prizorgis siajn abeluojn. Se pluvis, li iam nodis maŝon sur sia fiŝreto por pasigi tempon. Li iĝis malmilda kaj severa kontraŭ ŝi, kaj ofte batis ŝin, kvankam ŝi ĉiam estis same obeema kaj neniam plendis. Tamen iam okazis, ke liaj severaj vizaĝsulkoj forglatiĝis. Tio estis ĉe preĝeja sonorado, kio estis la plej bela, kion li sciis. Tiam li sereniĝis. Tiam la vilaĝaj infanoj ĉesis sian ludadon por aŭskulti.

Pli malserena ol alitempe li forŝovis sian fiŝreton dum la silenta semajno de pasko, kiam la sonorilo pendis silente kun pajlo volvita ĉirkaŭ la frapilo. Li estingis la fajron sur la fajrejo, kiam la suno subiris, kaj desegnigis krucon sur la pordo, ĉar en tiuj ĉi noktoj la sorĉistinoj kaŝe preteriras kaj kirlas en putoj kaj fontoj. Kaj ne estis prudente inciti la malbonulojn per sciema rigardo pri ili, kaj tial li frue enlitiĝis tirante super sin la kovrilon. Grimmo restis sola varmigante sin ĉe la cindro, ĝoja ĉar ŝi ne aŭdas la timatan sonoradon.

La montmastrino venis tiam al la pordo kaj flustris: "Filino, aŭskultu! Ĉu vi pro via amo tute forgesis rememorigi pri via edziĝa donaco? Tiun ĉi nokton vi ne renkontos iun homon sur la vojoj. Iru al la ruĝa bovido kaj prenu ĝian sonorileton! Ĵetu ĝin en la aeron kaj flugigu ĝin, sed erarigu ĝin por ke ĝi ne retrovu la vojon tien ĉi, sed lasos kvieton al ni el la gigantpopolo. En tiuj ĉi noktoj la konsekritaj sonoriletoj sopiras disŝiri siajn ligilojn kaj veni eksteren por flugi. Ĵus mi kalkulis ĝis ses aŭ sep super la nubaro."

Grimmo sidis longtempe pripensante. Fine ŝi volvis ĉirkaŭ si la mantelon, iris eksteren kaj malligis la sonorilon de la trabo. Sed antaŭ ol lasi ĝin, ŝi metis la kapon sub la malhelan kloŝrondon dirante: "Mi ricevis vin, sonorilo. Se vi volas iam trovi la vojon hejmen, ne haltu ĝis vi aŭdos mian vokon al vi!"

La sonorilo forsvingiĝis tra la aero. Ĝi svingis sub la stelarkaĵo sian pajlovolvitan frapilon kantante raŭke kaj nelaŭte: "Al Romo, al Romo, al sankta Romo!"

La paskmatenon la infanoj duonvestitaj kuris el la dometoj en ĉiuj vilaĝoj, kaj kunfrapis la manojn kriante: "Aŭskultu, nun niaj karaj sonoriloj revenis!" Ĉar la sonorado ree sonis de unu al alia paroĥo. Nur en la vilaĝo de Innaro estis silente, kaj tie la infanoj staris malsekure atendantaj.

Grimmo aŭdis, kiel sopirplene ŝia edzo plendspiris, kaj ŝi kredis ke ŝia koro rompiĝos. Baldaŭ ŝi ne plu povis toleri, sed rapidis al la glaciigita lago. Ŝi vidis tiam, ke la erarigita sonorilo jam trovis la revojon de la malproksima Romo kaj serĉante ĉirkaŭmoviĝis kvazaŭ malgranda punkto alte en la aero, preta iri por ĉiam for eĉ al Laplando.

Sen prokrasto ŝi vokis: "Sonorileto, venu, vi estas hejme!"

La sonorilo tiam falis rekte en ŝiajn manojn, batis trunon en la glacio kaj komencis profundiĝi. Innaro estis sekvinta post ŝi, kaj vidante kiel ŝi penas por teni la sonorilon super la glacitavolon, li demandis al ŝi kun ŝanĝiĝinta voĉo: "Kial vi, kiu estas tiel forta, silente akceptis tiom da batoj de mi, kiu ĉiam estis malforta?"

"Ĉu vi do ne scias," ŝi respondis, "ke oni toleras ĉion se oni iun amas? Kaj post kiam mi nun ricevis de vi afablajn vortojn, mi volonte tolerus la sonoradon. Sed nun estas tro malfrue. La sonorilo estas pli forta ol mi."

Dum ŝi parolis la glacio rompiĝis pli kaj pli, kaj la sonorilo tiris ŝin kun si malsupren al la profundo.

Tie estis poste ĉiam senglaciaĵo, kiu estis senglacia eĉ en plej malvarmega vetero. Kaj en gravaj sanktaj noktoj oni aŭdis, kiel la sonorilo ankoraŭ sonoras tie malsupre sub la laga akvo. Sed Innaro pentis sian malafablon kontraŭ la fidela Grimmo kaj funebris ŝin tiel, ke li ne plu

trovis trankvilon en la malnova hejmo. Li prenis ĉapelon kaj bastonon kaj foriris pilgrime, kaj ricevis sian tombon tre malproksime.

Verner von Heidenstam
El "La svedoj kaj iliaj ĉefoj"

La latuna sitelo de panjo

Antaŭ ol mia maljuna parenco Peĉjo en Ödgärdet elmigris al la filo en Ameriko, li faris adiaŭan viziton al mi, kaj tiam li priparolis multon pasintan al li tie hejme en la malmulte rikoltdona, sed kara Västbo. El liaj memoroj mi volas tie ĉi noti la sekvantan.

”En mil okcent sesdek ok okazis la domaĝa sekvetero. Sed tiu jaro tamen ne estis tiel malfacila kiel sesdek naŭ, ĉar tiam troviĝis nek manĝaĵo nek semaĵo. Tio estis ĝenerala, kaj malriĉaj homoj do ne povis akiri ion en la bienoj. Se oni estis havonta iom da greno aŭ da faruno, oni devis aĉeti en la urboj. Kaj kontanta pago estis ĉiam necesa — akiri ion kredite estis tute maleble. Kaj ne konvenis mortigi la brutojn por manĝi ilin. Kaj vendi ilin ne estis fareble, ĉar neniu havis monon por aĉeti ilin antaŭ la foiroj en la aŭtuno.

En mia eta hejmo ne estis pli bone ol aliloke. Oni devis preni rumeksosemojn kaj tilifoliojn por kuiri kaj enmiksi kaj en kaĉon kaj en panon. Sed iom da grenajlo tamen necesis kiel almiksaĵo.

Sed en la somerdaŭro elĉerpiĝis ankaŭ la rumeksaj semoj. Kaj okazis en vespero, ke ni devis enlitiĝi ne ves-

permanĝinte. — Estis ja tolereble al ni plenaĝuloj, Anna-Greta kaj mi. Sed plej malagrabla estis aŭskulti la knabon, kiu nur demandis pri manĝo kaj ne povis kompreni, kial ni ne donus al li almenaŭ pecon da pano.

La tutan nokton mi kuŝis sendorme, pripensante kion mi povus fari. Kaj Anna-Greta ankaŭ estis sendorma kaj plendspiris ĉiufoje, kiam ŝi turnis sin.

Sed en la mateno mi elpensis rimedon kaj prenis la solan objekton, kiu laŭ mia konjekto estus ŝanĝebla por mono, kaj ĝi estis malnova latuna sitelo, kiun panjo donis al mi ĉe nia geedziĝo. Ŝi ricevis ĝin de sia patrino, kaj ŝi diris deziron, ke tiu sitelo ne foriĝu el nia domo. Sed, ĉu mi povus fari ion alian? — Mia horloĝo kaj ĉio plia, kio havis iom da valoro, estis de longe jam donita garantie por faruno. Mi ellitiĝis en la matenkrepusko, intencante iri tra Fegen al Sotanäs kaj meti la sitelon garantie por funto da faruno.

Mi kunprenis la trenhokon por provi kapti iom da fiŝoj, ĉar en malsatjaroj la fiŝoj ordinaraj ekmordas bone, kvankam en tiu somero mi ankoraŭ ne havis bonŝancon.

Tiel mi venis al mia boatejo. Estis belege kaj kviete sur la lago tiun matenon. Kaj mi forgesis ĉiujn malfacilaĵojn, kaj fervoriĝis por komenci la fiŝkaptadon.

Tuj kiam mi estis reminta de la bordo kaj metinta la trenhokon en la lagon, ekmordiĝis forte. Kaj post ne longe ezoko de dek du funtoj kuŝis sur la boatfundo.

Tio plifaciligis la humoron per almenaŭ dek du funtoj.

La trenhoko reen en la akvon, kaj mi remis iom laŭlonge de la bordo. Tiam, unu du tri! ree bonega ekmordo. Ankaŭ ĝin mi enboatigis, kaj ĝi pezis almenaŭ dek kvar funtojn.

Sekve mi faris remon ĉirkaŭen ĉirkaŭ la Göta-insuleto kaj tie mi akiris ja kvin bonajn perkojn po du aŭ tri funtoj. Do sukceso grandioza! Kaj mi sentis ĝojon kaj kontenton, kaj laŭdis mian sinjoron kaj kreinton tie en la boato.

Poste mi direktiĝis for al la bordo de Sotanäs. Certe mi akiros bone en la sako, havonte ĉiujn tiujn fiŝojn por ŝanĝi. Do mi ne bezonos liveri la latunan sitelon de panjo kiel garantiaĵon!

Ĝuste kiam mi aranĝis por albordiĝo, ekmordiĝis tiel forte, ke la hokŝnuro ektiriĝis el mia buŝo, kaj mi rapidis por kapti la volvilon por ke ĝi ne estu ektirota, ankaŭ ĝi en la lagon. Tiu ĉi ezoko estis peniga. Estis necese lasi ĝin iri eksteren kvin, ses fojojn, tiom, kiom atingis la ŝnuro, ĝis ĝi estis bone altirebla. Sed tiam ĝi kuŝis oportune apud la boato, tiel ke mi povis haki la repintaĵon en ĝin kaj levi ĝin en la boaton.

Kiam mi estis preta por ĵeti ĝin supren, ekkriiĝis ĉe la bordo:

”Estas bonega ezoko. Ĝin mi havu.”

Estis la leŭtenanto mem en Sotanäs, kiu sidis sur la bordo rigardante.

”Volonte mi liveros ĝin al la leŭtenanto. Estos bone, ke mi ne estos hontigata kvankam mi fiŝkaptas tiel proksime al via bordo,” mi diris.

”Tion vi ne riskas, ĉar trenhoko estas permesata en ĉiu akvo,” li diris.

Nu. Mi tiris la boaton sur la bordon kaj levis miajn ezokojn. Kaj la lasta pezis dudek du funtojn kaj ĝi havis tian longon, ke ĝi batis min sur la tibioj, kiam mi portis ĝin sur la dorso.

Sed kiam mi alvenis ĝis la leŭtenanto, li rigardis min dirante:

”Estis bona fiŝkapto, tiu! Sed vi tamen ne aspektas ĝoja. Ĉu eble estas malplene en la kuirejo?”

Kaj mi respondis:

”Tion mi ne neas.”

Tiam diris li:

”Tio estas prihelpota. Akompanu min!”

La latunan sitelon mi tamen kunportis — por ke ne niu tuŝu ĝin dum mi forestis.

Ni envenis do en la biendoman kuirejon, kaj la leŭtenanto diris al la kuiristino:

”Jen fiŝkaptisto, kiu estas kaj malsata kaj malĝoja, ĉar ne troviĝas io tie hejme en lia kuirejo. Donu al li grandan buterpanon kaj grandan drinkon da brando.”

Sonis bone, tio.

Poste diris la leŭtenanto:

”Vi venis oportune hodiaŭ! Mi ĝuste volis havi kelkajn ezokojn; mi kunportu ilin, ĉar mi veturos al festeno ĉe mia bofilo. — Sed, kion vi volas havi por la fiŝoj?”

Pri tio mi respondis:

”La gesinjoroj donu, kiom ili volas, ĉar estos uzata por manĝaĵo ĉio, kion mi povos ricevi por ili.”

Tiam li diris, ke tiaokaze la sinjorino zorgu pri la pago. Kaj tion ŝi faris honorinde. Ĉar mi ricevis tiom da faruno, ke ĝi pezis sur la ŝultro, kaj beninde grandan platpanon, kaj plene da lakto en mia sitelo kaj grandan buterbulon en ĝi.

Tion mi diras, ke estis fiŝkaptinto ĝoje reminta hejmen. Kvankam la portaĵo tre pezis inter la lago kaj la farmbieneto, ĝi tamen estis la plej agrabla, kiun mi iam portis. Tion mi diru.

Mi revenis hejmen antaŭ la ellitiĝo de la knabo. La edzino ploris pro ĝojo kaj helpis al mi ĉe la ordigo. Kaj fromaĝo kaj pano kaj butero venis sur la tablon, kaj la latuna sitelo brilis tiel beninde kun la bona lakto en si tie sur la benko. Kaj, kredu, en la farunujo belege lumis kiam la sako malpleniĝis tien.

Sekve mi vekis la knabon. Kaj, ekvidante ĉi tiun bonegaĵon sur la tablo, li saltis el la lito sur la plankon kaj ekdancis en la nura ĉemizo pro ĝojo.

Mi ne scias, ĉu pli granda ĝojo en nia domo iam okazis pro la diaj donaĵoj. Estis prospero kun la malnova latuna sitelo de panjo. Ĝi ne volis veni for el la domo — kaj ĝi restos tie tiom longe kiom mi vivos.”

August Bondesson
El "Miaj ordinaraj spicoj"

Transdono de saluto

La tramo ekhaltis kaj la konduktoro malfermis la pordon kaj enmetis la kapon.

—Salikstrato, li diris al pasaĝero en la maldekstra angulo, tie ĉi vi eliros, sinjoro.

Altstatura, malgrasa viro kun okulvitroj, mallonge tondita bruna lipbarbo kaj malmolaj trajtoj stariĝis kaj eliris el la tramo.

Maldecide li haltis sur Flemingstrato, rigardante post la malrapide malaperanta tramo. La subita konfuzo en sinteno kaj moviĝoj kontrastis videble kontraŭ la aspekto de la viro, kaj ŝajnis kvazaŭ li mem scias tion kaj sentas embarason. Ia fremdeco troviĝas en liaj maniero kaj vesto, eĉ la irado ŝajnis fremdlanda. Sperta okulo atentis tuj, ke ĉapelo, vestaĵoj kaj ŝuoj estas laŭ moderna, angluja fasono. Li bruligis cigaron kaj komencis iri sur Salikstrato.

En la pensoj li ripetis la refreŝigan vojaĝon, kiun li faris de sia agadkampo en Ameriko: la grandajn urbojn, kiujn li vizitis kaj rigardis, la agrablajn kaj utilajn interkonatiĝojn, kiujn li sukcesis ligi. Jes, ĉio okazis tre bone laŭ prudente projektita plano kaj dank'al abunda vojaĝ-

kaso. Sed restas kelkaj aferoj, kiuj estas malsaĝaĵoj, ĉar ili estas nebezonataj kaj absolute ne utilaj al li kaj efektive nek al iu alia. Nu, unu el ili povus ja esti farinda — li intencis viziti sian maljunan vartistinon, kiu laŭ lia scio translokiĝs al Stockholm kaj edziniĝis, eĉ bonege edziniĝis. Tiu vizito ne povus esti malagrabla; en New York li aĉetis sinjorinan horloĝon kun duobla kovrilo kaj malgranda surmuntita diamanto, ĝi flatos al ŝi kaj samtempe ĝi montros, kia viro fariĝis la antaŭa bubo. Li havis la skatoleton en sia poŝo — cetere povos esti amuze babilo pri malnovaj memoroj el la infanaĝo, ŝi estas la sola, kiu ankoraŭ vivas el tiuj, kiujn li konis el la knabtempo, kaj dudek kvin jaroj pasis post kiam li vidis ŝin. Sed unue li vizitu tute fremdajn homojn ĉi tie por prezenti senditan saluton.

Tiu saluto tamen — ĝi estas malsaĝaĵo kaj malagrabla afero. Li abomenas ĉian sentimentalecon, la vivo kondukis severmane kontraŭ li, kaj li kutimiĝis pagi per sampeca mono. Apud io milda kaj senprudenta li fariĝis nefirma, povas apenaŭ trovi vortojn, kaj agas sen pripenso. Devis esti momento de vera malforto, kiam li prenis sur sin ĉi tiun komision. Veni kun saluto de mortinto — kaj de iu kiu mortis en tia mizero, kiel la dekadenco kaj alkoholdetruita Georg. Eĉ kiam li alvenis tien transen li estis neriparebla, kaj la instigo, pri kiu ili supozeble esperis tie ĉi hejme, ĝi okazis neniam. Kia estis

la afero: li ja projektis fariĝi kuracisto, kaj la patro, kiu estas oficeja servisto aŭ io tiaspeca, eĉ ne havis la ĝojon vidi lin kiel veterinaron — li ja ŝanĝis al tio sian karieron. Sed ankaŭ tion li ne povis atingi — kiaj aferoj okupis lin ĉi tie, li fariĝis malebla en Svedujo kaj sekve oni skrap-kolektis la lastajn monerojn kaj sendis lin al Ameriko, kompreneble. Ja ja, ne sukcesos se estas pasinta tro longe.

Helpis la mizerulon tie transe, tion faris kaj li kaj aliaj. Ekzemple kiam Georg venis al la negoĉejo, kie li estas partohavanto, li sukcesis akiri, ke Georg ekhavis la zorgadon pri la ĉevaloj, esti iaspeca intendanto por la transportfako. Estis sendanke — ĉe la unua salajropago li tute simple malaperis, estis ebria dum du semajnoj. Kaj poste li la tutan tempon estis vagantaĉo — balais drinkejojn por kelke da drinkoj kaj havis dum la vintro permeson en la noktoj kuŝi malantaŭ la kameno de la drinkeja ĉambrego. Staris fanfaronante al la elmigrantaj vilaĝanoj, babilis latine, kantaĉis studentkantojn kaj estis regalata de la societo kompanse por tio, ke ili povu nomi lin kamarado kaj frato. Kompatinda Georg — ĉar evidente li estis afabla kaj bonkora, sed ekstreme malforta sendordemulo — fine malsaniĝis. Tiam, kiam li sentis, ke la fino venas, li el la malsanulejo sendis vokon al li. Li aŭdis, ke li vojaĝos hejmen. Ĉu tiel?

—Jes, tion li ne neis.

—Do faru al mi la komplezon viziti patron kaj panjon, — tiam li sidiĝis en la lito, — kaj transdonu saluton, promesu al mi ĉi tion, sciigu, ke mi ĝis plej laste pensis pri ili, kiam mi mortis. Jes, salutu precipe al panjo, ŝi suferis pro mi — ho, kia porko mi estis! Eĉ ne unu fojon mi skribis leteron hejmen dum la kvin jaroj, kiujn mi travivis tie ĉi transe — ho, ho, kion mi estus skribinta! Do vi promesas saluti al panjo ...

Kaj tiam li komencis ĝemplori kaj ekhavis teruran tusatakon, kaj en la nokto Georg mortis. Sed li mem promesis viziti la gepatrojn kaj ricevis la adreson — kaj nun li iras tie ĉi antaŭ ilia pordego.

La fremdulo iris-reiris nubfumante sian cigaron. Malvarma kaj decidoplena, kiel li lernis esti tie transe en la ĉaso por prospero, li tamen en ĉi tiu kvieta medio sentis malcerton. Tiu ĉi komisio estas malagrabla al li kaj tamen li ne volas malplenumi ĝin. Se Georg almenaŭ restus vivanta — nu, li tute simple devas plenumi tion, kion li promesis, morgaŭ li ja forvojaĝos. Li ĵetis la cigaron kaj eniris rapide tra la pordego.

Estas tri ŝtuparoj supren: unu ŝtuparo — du — li iris tre malrapide. Apud fenestro li ekhaltis: asfalta korto, amaso da malgrandaj infanoj, malriĉe vestitaj, kiuj kuras kaj ludas sub kelkaj ŝnuroj, plenaj de flikitaj tolaĵoj.

La tria ŝtuparo, jen la pordo — E. Olson, oficeja servisto. Li sonoris.

Junulino, pala kaj malgrasa, malfermis. Ŝajnis al li, ke ŝi aspektas kvazaŭ ŝi longe ne dormis.

—Mi venas el Ameriko.

La junulino kunfrapis la manojn kaj kuris internen. Li aŭdis, ke ŝi vokas :

—Paĉjo, sinjoro el Ameriko, li havas salutojn de Georĉjo!

La vojaĝanto eniris kaj fermis la pordon. Estis mallume en la vestiblo kaj li atentis malagrablan odoron kvazaŭ de malsanulejo aŭ de medikamentoj. Li sentis malagrablon kaj deziris, ke ĉio estu jam plenumita kaj ke li povu foriri. Plej bone estas diri ĉion mallonge, li pensis, sed per kiaj vortoj, Georg ja neniam skribis ...

Pordo malfermiĝis plej malproksime kaj malgranda senhara viro en nokta longjako aperis. Li proksimiĝis kun ripetataj kliniĝoj kaj malgrandaj ridetoj, duone favore, duone respekte, prenis la palton de la vizitanto malgraŭ protestoj, kaj pendigis la palton kaj ĉapelon kutimlerte kaj zorge sur hokon, dum li parolis duonlaŭte, kvazaŭ timante aŭskultantojn.

—Bonvolu, bonvolu, pardonu, ke mi estastiel vestita, bonvolu eniri, Georĉjo do fine sciigas pri si, jes Sinjoro Dio, komplezu, komplezu, mia edzino estas malsana, danĝere malsana, estas bedaŭrinde, estos baldaŭ fino, tie ĉi estas malordo, bonvolu pardoni, la knabino kom-

patinda, devas fari ĉion, mi devas funkcii en la oficejo kaj plue vespere en la teatro, bonvolu ...

La fremdulo sentis pli kaj pli da konfuzo. El la vor-tofluo li perceptis esence, ke la edzino, la patrino, estas mortanta — kiamaniere li nun povus prezenti sian komision. — Mi diros ĝin gardeme, prepare, iom post iom, li rezonis. Preta por vidi kortuŝantan malsanulejan scenon, eble mortliton, li akompanis la parolanton en la ĉambron.

Je sia sincera kontento li tamen trovis, ke la malsanulino evidente kuŝas en pli interna ĉambro, kien la por-doĵ estis bone fermitaj. Tiu ĉambro, kie oni petis, ke li sidiĝu, estis miksaĵo de saloneto kaj ĉambrego kaj bone meblita, ĝi enhavis eĉ tro multe da mebloj.

La oficejservisto evidente ne sciis, kiel li komencu siajn demandojn. Li iris al malnova klapkomodo kaj malfermis skatolon.

—Ĉu estas permesate al mi proponi glason da konjako, li diris, ĉiam ridetanta, —mi povas diri ke estas delikata varo, — li palpebrumis iom ruze, — mi ricevis ĝin de konato —Johansson ĉe la kortego.

Timante ofendi per neo kaj dankema pro ĉiu faciliganta prokrasto, la vojaĝanto permesis, ke lia gastiganto plenigu du glasojn. La junulino sammomente malfermis la dormoĉambran pordon kaj enŝteliĝis sur la piedpintoj. La oficejoservisto daŭrigis :

—Bonvolu akcepti, sinjoro ... sinjoro ..

—Pierson, kompletigis la fremdulo.

—Bonvolu akcepti, sinjoro Pierson, bonvolu — prezentu la sukerujon, Mario — sinjoro Pierson eble estas ankaŭ doktoro, mia knabo, li studis al doktoro, jes ja, ho ho, ja ja. Kiel fartas panjo, Manjo?

—Ŝi dormas, respondis la filino, kiu senĉese per grandaj, brilaj okuloj rigardis la fremdulon.

—Imagu, kiel ŝi ĝojos, kiam ŝi vekiĝos, diris la patro; estas tamen mirinde, mia edzinjo ĉiam kredis, de kiam la malsano kaptis ŝin, ke ni ricevos leteron de la knabo. Certe, Emil, ŝi kutimis diri, Georĉjo fine sukcesos kaj tiam li skribos al mi. Ja ja — ĉu ankoraŭ unu konjako, sinjoro Pierson. Kaj nun ŝi havos ĉi tiun ĝojon antaŭ la morto.

La knabino komencis ĝemplori. Sinjoro Pierson rigardis kun forta atento la malnovan klapkomodon. Li deziris, ke li estu en la kurzborso en Wall-strato aŭ alia tre bruegplena loko kie ajn, sed ne tie, kie li efektive estas. — Mi mensogu la tuton, li pense diris al si mem, kaj poste mi skribos el Ameriko. Li provis rideti kaj respondis:

—Ho, ni ja esperu la plejbonon. Ne, mi ne estas kuracisto — mi estas komercisto, negocisto. Sed Georg — li prononcis la nomon laŭ anglolingva maniero — estis malsana longtempe. Ne, ne ektimu, fraŭlino Olson, li —

li nun fartas pli bone. Jes, li estas efektive sen danĝero, jes, estas tiel. Sed en la unuaj jaroj estis malfacile al li, jes, estis tiel, kaj tial li ne volis skribi, ne, tial li kompreneble ne skribis. Sed nun lia situo estas bonega, efektive certe bonega, li estas — li estas veterinaro. Jes, certe, li gajnas monon tre bone kaj — kaj li baldaŭ skribos — kiam li estos iom pli forta. Li petis, ke mi tre multe salutu vin ĉiujn, jes, tion li faris, kaj precipe al sinjorino Olson kompreneble ...

Sinjoro Pierson turnis la vizaĝon de la klapkomodo. Li vidis la feliĉan, preskaŭ fieran mienon de la patro, la mildan, brilan de la fratino. — Dio pardonu mian faron, li senvole murmuris al si mem, stariĝante kaj metante la manon en la poŝon. Li elprenis la skatoleton kun la horloĝo kaj metis ĝin sur la tablon.

—Jen donaco, li rapide daŭrigis — de Georg. Li diris ke ... ke vi havu ĝin, fraŭlino Olson ... kaj ...

La maljuna oficejoficisto per tremantaj manoj malfermis la kovrilon. Sinjoro Pierson vidis, ke li ploras. Li ne kuraĝis rigardi la junan knabinon, sed malrapide li proksimiĝis malantaŭen al la pordo.

—Sed ne, vi ja ne intencas foriri, ekkriis la maljunulo, kiu subite atentis la intencon de la vizitanto. Bonvolu pardoni maljunan stultan patron, kia knabo! bonvolu — vi devas resti por la vespermanĝo, sinjoro Pierson. Manĝo, rapidu malsupren kaj aĉetu ...

Konvinkita, ke pli intima kunsidado kaŭzos pli detalajn demandojn, sinjoro Pierson rapidis respondi:

—Maleble, maleble, kara sinjoro Olson! Mi ... mi vojaĝos post proksimume du horoj. Certe, tute maleble ... jes, mi salutos al Georg. Ne, neniuj plua konjako ... dankon, dankon fraŭlino Olson ...

Ili akompanis lin en la vestiblon kaj sinjoro Olson helpis lin surmeti la palton:

—Tio estas mia okupo ... kia knabo! Imagu, kiam panjo vekigis, vi Manjo! Sed, ke ni ne povos prezenti pecon da manĝaĵo ...

Al la aliaj neaŭdebla sono el la ĉambro de la malsanulino kaŭzis ektirigon de la filino. Ŝi rapidis internen kaj sinjoro Pierson vidis, kiel ŝi en la ĉambrego rapide prenis la skatoleton de la tablo kaj kunportis ĝin en la dormoĉambron. Li sentis kvazaŭ kapturigo — devas esti pro la konjako, li supozis. — Sed mi skribos, tuj kiam mi venos hejmen, iom da mono estas ja ankaŭ sendebla, tiel eble ŝajnos pli kredinde ...

Sinjoro Olson premis liajn manojn, kaj li malklare aŭdis amason da dankdiroj, salutoj — Georĉjo — feliĉan vojaĝon — la knabo — Ameriko — skribi — bonvolu ...

Fine li ree staris ekster la pordo kaj komencis iri mal-supren laŭ la ŝtuparoj. Tra fenestro li vidis la malpurajn infanojn ankoraŭ ludantajn sur la korto kaj rigardis ilin mirante — ĉu dum kvin minutoj aŭ dum kvin horoj li

estis tie interne? Sento, malkvietiga kaj nova, plenigis kaj premis lin. Li ĝojis, sed estis ankaŭ maltrankvilega. Se li ne estus antaŭ longe, antaŭ tre longe malkutimiĝinta je tio, li prefere volus plori. Tiel, kiel do estis, mallaŭta fajfado inter la dentoj devis sufiĉi al li.

Henning Berger
El "Teatra kurteno"

Fraŭlino Alice

Mi estis loĝonta en la malgranda provincurbo, kaj tial mi volis esplorigardi ĝin.

Do en sunhela somermateno mi iris laŭlonge de la malgranda strato. Ĝi estis la plej granda strato de la urbo, sed efektive ĝi estis nur la granda landvojo, kiu preterkondukis tie ĉi ĉe la rivera bordo. Proksime al la akvo staris vico da florantaj kaj odorantaj akacioj. En la domvico, kiu frontis kontraŭ la bordo, la fenestroj estis fermitaj per grize aŭ verde pentritaj latkradoj, sed la pordoj kaj pordegoj estis larĝe malfermitaj.

Multaj el la pordoj kondukis en vendejojn, kaj vino kaj aliaj pli malpli alkoholaj trinkaĵoj estis aĉeteblaj ĉie. La karbvendisto vendis vinon, almenaŭ somertempe. Familio, kiu estis aĉetinta kvanton da soldatĉemizoj el amerika militista provizejo kaj tial havis ekipejon por sinjoroj, vendis vinon. La barbiro, kiu provizis al la loĝantaro gazetojn, terurajn revuojn, poŝtkartvidaĵojn kaj preskaŭ librojn, vendis ankaŭ vinon. Lia juna filino staris malantaŭ la magazena tablo ridetante, kaj la grandaj glasoj briletis orflave aŭ rubenruĝe antaŭ pramistoj kaj aliaj vagantaj klientoj, dum la paĉjo sekigis sur la pan-

talonpostaĵo la manojn, sapumis la klientojn kaj verŝis sur iliaj haroj mirinde odorantajn oleojn.

La filino de la panisto estis tiel ĉarma, ke mi apenaŭ kuraĝis rigardi ŝin — kvankam ŝiaj kruroj ne estis tre graciaj, kompreneble. En la fenestro estis elmontrataj malnova seka panbulo kaj vitra ujo kun ĉokoladaj bombonoj. La bakisto mem en ĉemizaj manikoj staris en la pordotruo inter la vendejo kaj la kuirejo — granda, dika, nigreta, terure forta kaj kun la vilaj brakoj apenaŭ purigitaj de la pasto, kiun li ĵus knedis.

Antaŭ domo kelkajn paŝojn pli malproksima staris malgranda homgrupo apud malfermita fenestro en la suba etaĝo. Ĉiuj babilis, ridis kaj ŝercis kun iu, kiu sidis interne de la fenestro. Kaj kiam mi ekrigardis tien, mi vidis ŝin.

Mezaĝa virino sidis envolvita en seĝo por malsanulo. Ŝia bele rondeta granda vizaĝo estis palega. Ŝiaj densaj haroj estis nigraj kaj pendis sur la dorso. Ŝiaj okuloj estis grandaj kaj malhelaj kaj havis maloftan lacan brileton — se oni unufoje vidis ĝin, oni ne forgesas ĝin, ĝi estas la rigardo de iu, kiu intime rilatas kun la morto. Mi haltis, salutis la homojn kaj kuraĝis iom post iom proksimiĝi al la juna sinjorino, riverencante ĝentile. Mi estis ĵus veninta al la urbo kaj bezonis trovi lavistinon, ĉu ŝi eble scius ...?

Jes, estas ĉi tie! Ŝi respondis gaje, kaj mallevis sur la genuojn la kudraĵon, kiun ŝi tenis en siaj longaj, mallargaj manoj. Kaj ŝi vokis sian panjon, la maljunulino venis, la lavado estis interkonsentita, kaj mi daŭrigis mian iron.

La somera suno brilegis, la akacifloroj pendis tute sur la arboj, la rivero bruetis briletante blua, la malgrandaj tirboatoj klakadis en nigraj tuboj, kaj la pramistoj blasfemis kun longaj stangoj en la manoj. Kaj mi iris tie meditante pri virina sorto, kiun mi vidis tra la fenestro. Ĉu febro — paralizo — serioza afero? aŭ historio aŭ imaga malsano? Certe ne, ĉar odoris febro en mia mano, post kiam mi salutis ŝin.

Veninte hejmen mi tuj faris demandon al la gemastroj de mia malgranda hotelo.

—Jes, certe vi vidis fraŭlinon Alice! mi aŭdis. Bedaŭrinda junulino! Tiel ŝi sidis nun dek unu jarojn, kaj ni ĉiuj tre kompatas ŝin. Ŝi estas tute paralizita, tiel ke la paroĥestro devas viziti ŝin, por ke ŝi faru konfesion. Sed li estas ja afabla, nia maljuna paroĥestro! ankaŭ ŝi estas tre bona — tio ĉi okazis al ŝi en la dudekjaraĝo — kaj ŝia panjo lavas efektive bonege.

—Dudekjaraĝo? Kaj paralizo dum dek unu jaroj proksimume? Ŝi do estas nur iom pli ol tridekjara?

—Certe jes! Ŝi eĉ ne povas esti tiom aĝa! Ne estas longe post kiam ŝi estis malgranda knabino, kiu kuris ludante tie ĉi.

La sekvintan matenon mi, kiel ĉiuj aliaj homoj en la vilaĝo, haltis antaŭ la larĝe malfermita fenestro ĉe fraŭlino Alice. Mi metis faskon da freŝaj akacifloroj apud ŝian manon — mi ne scias kion la aliaj kunportis.

Kaj pasis tago post tago dum la tuta somero. La tilioj antaŭ la malnova preĝejo floris, kaj ni iris tien kun ŝtupetaroj — kaj estas ĉarme rigardi belajn knabinojn pasantajn supren kaj malsupren sur ŝtupetaroj por kolekti florojn en sunlumataj arboj. Sed ĉiam, kiam mi iris preter la junulino, kiu sidis ĉe la fenestro de la lavistino, mi haltis kaj babilis. Ŝi ridetis per la tuta vizaĝo kaj brilis per la okuloj, sed la rigardo direktiĝis tre malproksimen.

Poste fariĝis aŭtuno, kaj post ĝi fariĝis vintro kaj printempo. Kaj mi vojaĝis reen por viziti miajn amikojn en la provinco.

La suno ree brilis same ore juna kaj forta, ree floris la akacioj kaj odoris, kaj ree briletis la rivero kun profunde blua kaj moviĝanta fluo, fervore rapidanta al la maro. Sed tamen io mankis. La strato estis tute senhoma — kaj subite mi atentis, ke la fenestroj de fraŭlino Alice estis larĝe malfermitaj kiel en la antaŭa jaro, sed tie ekstere

troviĝis neniu homo babilanta kaj ŝercanta kun la malsana junulino.

Strange! Kia malpleno povas okazi sur malgranda ĉiutaga strato tra vilaĝo — strato, kiu eĉ estas nur la granda landvojo, kiu hazarde kondukiĝis ĉi tien! Kaj kia silento ĉe la larĝe malfermita fenestro, kie sola malsana virino sidas rigardante la sunlumon kaj aŭskultante la ĝojon de birdoj sub vagantaj nuboj! Neniu venas tien por rakonti, ke la katino de la paroĥestro ekhavis idojn, ke la knabino de la panisto edziniĝos en la aŭtuno kun viro de la fervojo, kiu aĉetas aŭtomobilfiakron por fariĝi kondukisto en Parizo, kaj ke vidvino Durand estas dirinta ion teruran pri sinjorino Dupont, la edzino de la forĝisto. Nenio el la vivanta vivo de la tago plu troviĝas antaŭ la fenestro de fraŭlino Alice.

Mi proksimiĝis tre hezitante kaj salutis. Mi apenaŭ ricevis respondon. La tutan tempon ŝi estis forturniĝinta. Kaj mi diris, ho ne, tiun ĉi fojon mi ne bezonas lavadon, mi estas nur travojaĝanta, kaj certe mi opinias, ke la doktoro devus interkonsiliĝi kun specialisto en Parizo.

Sed la rigardo, kiun ŝi donis al mi, estis tiel plena de doloro, ke mi forrapidis. Kaj nur kiam mi promenis kelktempe, mi atentis, ke mi ankoraŭ portas en la mano la akaciajn florojn, kiujn mi intencis doni al ŝi.

Kio estis okazinta?

Mi demandis en la hotelo, kiam mi venis hejmen. Unue oni donis evitajn respondojn, sed fine la veron: fraŭlino Alice ne havas la kredon!

—Vi ja ne supozas ...? Ne, ĉu vi efektive diras, ke vi nun evitas ŝin ĉar ŝia religia ...

—Ŝi ne havas la kredon, sinjoro.

Kiel oni scias tion?

Certe, tion oni sciis. Ŝi ja sidis tie, kvankam juna knabino, dum multaj jaroj tiel paralizita. Kaj ŝia patrino laboris — oni ne povas riproĉi ŝin pri io, certe ne la patrino, ĉar tiel kiel ŝi klopodas en sia lavkuvo la tutajn tagojn — kvankam tie, kie la kredo mankas, la laboro ne povas kunporti benon, kompreneble. Sed ni estus helpontaj al la junulino por ke ŝi ree staru sur la piedoj, ĉar ni ĉiuj tre amis ŝin, kiu sidis kiel sanktulino — ĉar neniu povus ja supozi ion alian, ol ke virino, kiu tiom suferis kaj devis tiom toleri, nepre estas sanktulino. Kaj ankaŭ la paroĥestro diris tion. Do ni faris kolekton por ŝi, ni ĉiuj en la vilaĝo, por ke ŝi vojaĝu al Lourdes kaj resaniĝu en la fonto de Nia Sinjorino.

—Estis bela faro, sinjorino! mi diris.

Ŝi ektiris la ŝultrojn kaj respondis maldolĉe :

—Sed, kion efikis tio? Ni portis ŝin el la seĝo, kaj sidigis ŝin en veturilon. Kaj la paroĥestro ĉeestis — la maljuna paroĥestro! Li estis ja tiel bonkora viro! Kaj ŝia patri-

no, ankaŭ! La maljunulinjo! Ŝi tiel ĝojis, ke ŝi nur ploris, ĉar la junulino estus resaniĝonta. Sed, kion efikis tio?

—Ŝi do venis al Lourdes?

—Jes, certe! Multaj tie ĉi havis konatojn en la pilgrimantaro, kaj do ŝi estis bone prizorgata, ŝi, Alice. Kaj certe ŝi venis en la sanktan akvon — sed ŝi post tio estis same malsana! Kion efikas vojaĝo al Lourdes por karaj moneroj kaj bani sin en la sankta fonto de Nia Sinjorino — se oni ne havas la kredon? Ŝi ne havis kredon, ŝi, Alice.

—Sed mi opiniis certe, ke ŝia kredo ...

—Jes, ĉu ne vere, sinjoro! Tiel ja opiniis ni ĉiuj! Nu, tamen ŝi sukcesis reveni hejmen, kiom ajn ŝi estis malsana — aŭ ŝajnis esti. Sed mi diras, kiel la maljuna paroĥestro, ke oni kiom ajn imagu, ke oni kredas — antaŭ la vizaĝo de la Sinjoro tamen estas malkaŝite, ĉu estas vera kredo aŭ ...

—Ĉu ŝia kredo estis malvera?

—Kial ŝi do ne resaniĝis? Kvankam ni por tio sendis ŝin eĉ ĝis Lourdes?

Jes! Respondu ĉi tiun demandon, kiu tion povas! Mi ne povas — kaj ne volas ŝajni pli prudenta ol mi estas.

Martin Kock

El "Nigro sur blanko"

Trans la rozkrado

I.

Rememorigas pri Solliden¹,” diris la ĉambelano. ”Bona situo, sed estas ja facile, kiam oni havas absolute suverenan rajton elekti grundon ...”

La partoprenintoj de la tagmanĝo kolektiĝis sur la teraso, kaj staris en disaj grupoj rigardante la maron. La gastoj apartenis ĉiuj al la eminentularo de la banloko Västerö, kaj la mastro estis grandkomercisto Westerman el Göteborg, posedanto de la banloko.

La situo de vilao Rozĝarden’ estis bonega, tio ne estas neigebla. Sur la altaĵo ĝi superĉefis kilometron da marbordo; kaj la vilao mem ŝajnis kiel blanka kastelo el mirrakonto, tie kie ĝi staris ĉirkaŭata de bone tonditaj verdaj herboebenoj kaj longaj rozujvicoj. Antaŭ la ekkonstruo ĝi estis objekto de arĥitektura konkuro, kaj la ĝardeno estis planita de fama spertulo. Direktoro Westerman estis viro, kiu ĉiam obeas la postulojn de la modo, kaj sinjorino Westerman ĉiam troviĝis esti virino kun belgusto. La grasronda kontentaspakta fizionomio de la direktoro ekbriliĝis ĉe la komplimento.

1 Solliden: vilao apartenanta al la sveda reĝa familio.

”Jes, oni faras tiel bone, kiel oni kapablas, kaj ĝuste ĉi tiu loko ĉiam plaĉis al mi. Sinjoro ĉambelano ja komprenas, ke tie, kie oni en la knabjaroj ŝatis kuri — tio ne malaperas. Kaj plue estas meze en la sunbrilo. Mi opinias preskaŭ, ke pli higiena loko por loĝado dum la somero ne troviĝas. Almenaŭ oni devas serĉadi pri tia.”

”Ĉu sinjoro direktoro do loĝis ĉi tie, kiam li estis infano?” diris unu el la sinjorinoj demande.

”Oni rimarkas, ke sinjorino koloneledzino estas novulo en Västerö,” diris la ĉambelano. ”Direktoro Westerman certe povus nomi sin Westerman de Västerö. Estas direktoro Westerman, kiu estas la kreinto de ĉio jena.”

Per manmovo li montris direkte al la ventlulataj vilaaj ĝardenoj malsupre de la teraso. La vasta spaco aspektis kiel ĝi estis, eleganta banloko kun bonegaj kaj modernaj konstruaĵoj. Tenisludejo brilis kretblanka en la sunlumo meze sur granda verda herbebeno. Malproksime sur la kurba bordo somervestitaj bangastoj moviĝis intermikse kiel multkoloraj insektoj, kaj ekstere trans la ruĝaj rokoj kuŝis la maro blue kaj tutkviete.

”Krei ion tiaspecan el nenio, tio estas efektive admirinda,” diris alia el la sinjorinoj. Estis la admiraledzino. ”Ĉu antaŭe estis nur senkultura grundo ĉi tie?”

”Mi povas respondi kaj jes kaj ne pri tio. Kompreneble estis ekkulturita, io el ĉio, sur la plejmulto estis nur ordinara kampara paŝtejo. Tuta Västerö estis nur unu

malgrandbieno. Ni somerloĝadis ĉi tie kiam mi estis infano. Mi aĉetis ĝin antaŭ dudek jaroj ĉe aŭkcio. Pagis dekok mil por la tuto.” Rideto ekaperis sur la vizaĝo de la direktoro. ”Nun mi ne vendus ĝin eĉ por kvincentmil, ĉar tiom oni proponis al mi por la nura grundo.”

”Estis konsterniga negoco,” diris la ĉambelano kun iom da estimo en la voĉo. ”Devas esti ĝuste la direktoro por fari tion. Sed kelkaj havas negocsenton.”

”Ĉu tiam estis jam klare al sinjoro direktoro, ke ĝi povus fariĝi banloko?” demandis la koloneledzino.

”Tion mi primeditis dum multaj jaroj, sed la kamparano ne volis vendi. Fine li bankrotis, kaj tiam sukcesis la afero.”

”Kie li estas nun?” demandis la ĉambelano.

”Efektive estas iamaniere komike. Estas maljuna Öberg; tiu, kiu funkcias kiel pramisto.”

La rigardo de la koloneledzino, kiun ŝi fiksas sur la vizaĝon de la direktoro, ŝanĝis direkton. Ŝi rigardis foren trans la rozujvico. En la mallarĝa trapasejo de la akvo ĉe la alia insulflanko malgranda plata pramo ĝuste tiam moviĝis al la landbordo. Sur ĝi staris veturilo kun ĉevalo, kaj viro estis okupata per altiro de la ŝnurego.

”Ho, kiel interese. — Kaj nun li estas en servo de sinjoro direktoro?”

”Jes, tio signifas ke li luas la rajton havi la pramon.”

Okazis kelkmomenta silento.

”Se mi estus li, tio certe ĉagrenus min,” diris la ĉambelano. ”Komprenu min ĝuste, mi volus diri: vidi ĉion. Ĉar povus ja esti lia banloko, se li estus kompreninta tion.”

”Jes, estas ĝuste tiel.” La direktoro ekridis. ”Sed cetere li ne estus povinta fari ion el tio, ĉar li ja ne havis kapitalon. Sed mi havis.”

”Li estus ja povinta pruntepreni, se li havus prudenton?”

”Kontraŭ kio?”

”Kontraŭ la bieno.”

”Kiu estus pruntedoninta al li unu oeron por ĝi? Tiel, kiel Västerö tiam estis, neniuj homoj volus havi ĝin, kaj ankoraŭ malpli pruntedoni monon por ĝi. Kiel terkulturo ĝi ne valoris du putrintajn vakciniberojn, laŭ la kutima diro, kaj krom mi neniuj komprenis ke troviĝas aliaj ebloj.”

Dum momento estis plensilento. Estis kvazaŭ demando estus pendanta en la aero, sed ĝi ne estis elparolata. Anstataŭe la ĉambelano diris iom prokrasteme :

”Jes, certe estas la sento pri ebloj, kiu kreas ĉiun progreson — kaj la riĉaĵojn.”

”Ne, sen iniciativo oni ne prosperas,” la koloneledzino diris konsentante. ”Ŝajnas al mi stulte, ke estas ĉi tio, kion la socialistoj ne komprenas. Aŭ ili supozas, ke ĉiuj

homoj estas sufiĉe penskapablaj por iniciati, sed tiaj ili certe ne estas.”

”Al mi ŝajnas, ke ĉi tio pri la direktoro kaj maljuna Öberg klare pruvas tion,” diris la admiraledzino.

”Kelkaj homoj ne kapablas vidi ion, tio estas mia konvinko,” la direktoro diris bonhumore. ”Sed, ke mi havas negocsenton, se mi nepre devas fanfaroni, tio ne estas mia merito. Ĝi kuŝas en la sango. Ni Westermanoj estas malnova negocistgento, kaj pri tia afero oni ne estu kulpigata. Kvankam miaj patro kaj avo ne laboris dum egalaj konjunkturoj, kiel mi. Malnovtempe estis malgrandaj cirkonstancoj en la mondo kaj neniuj komunikoj. Sinjorino koloneledzino ne estus sufiĉe forta por vojaĝo antaŭ sepdek kvin jaroj de Stockholm tien ĉi al Västerö — en ĉevala veturilo.”

”Nee,” ŝi diris ridetante.

II.

Direktoro Westerman sidis en sia bonega, komforta ĝardenseĝo en la laŭbo dense interne de la rozujvico, kun la pajla ĉapelo klinita pro la varmego, dum li rigardis la diligentajn fingrojn de sia edzino, kiu estis okupata per trikado de griza sportŝtrumpo, kaj dum iom da tempo li dediĉis sin al iom malvigla meditado. Li ne havis emojn por modesto kaj senpretendeco. Efektive li ne

pensis ĝuste tiel, sed havis iaspecan konscion pri tio. Cetere, kial li estu senpretenda?

La komenco estis, ke li vidis la flagon sur la diversaj vendejo ekbrilanta pro ekvento tie malsupre en la sunlumo. Estis malgranda vendejo, kaj li plenkonvinke opiniis, ke ĝi devus prosperi bone — ĝi estas ja la sola en la loko — kaj tamen la viro venis asertante, ke li ne povos pagi la lumonon antaŭ post eble unu monato.

La direktoro sentis iaspecan malestimon; tion li ne povis eviti. Ĉi tiu Elof Andersson kompreneble ne estas energiulo, kaj do li kulpigas la homojn de la fiŝista vilaĝo. Kaŭze de la milito ili en la aŭtuno ne povis marvojaĝi por ordinara fiŝkaptado, kaj mankis al ili rimedoj por pagi — ili devis aĉeti per ŝuldiĝo. Certe; ili aĉetis per kredito, ĉar oni konsentis al ili krediton, sed neniu devigas al tio. Kaj bankoj ja troviĝas por ili kiel por aliaj. Tiel proksime al Västerö, kiel la fiŝista vilaĝo situas, ne estus malfacile prezenti hipotekon per la grundoj, sed al la viro kompreneble mankas negocsento. Plue li estas tia ulo, kiu okupas sin per abstineinca movado kaj popola klerigo. Malŝpari tempon per tiaj aferoj, kvankam oni havas malgrandan negocon, kiu devus progresi. Per tiaj aferoj oni povus amuzi sin, kiam oni jam progresis tiom, ke oni posedan ion. — La atento de la direktoro kelksekunde vagis for de la panoramo, li malnete rigardis sub la randaĵo de la pajla ĉapelo. En pensa rondiro li percep-

tis sian domon en Göteborg — la pentrajkolekton kaj la libraron — ambaŭ estis famaj kaj laŭdataj. Neniu rajtas diri, ke al li mankas kulturaj intereso — li estas fama kiel mecenato — eĉ eminenta — sed ĉio devas okazi laŭ ĝusta ordo, la negocoj unue kaj poste tiaspecaj aferoj, ĉar ili ĉiaokaze estas lukso. Kvankam estas ja tamen necese, kaj kiam oni havas konsi deratan situon ...

Sed tion oni ne akiras per blurubandismo se oni havas malgrandan vendejon, kaj cetere sur la kamparo. Al la firmao Westerman la elspezoj por reprezentado atingis en la lasta bilanco sumon de sesdek mil — inkluzive la tualetoj de Hilmo, kiujn ŝi aĉetis en Parizo, sed ĉiuokaze ...

Li etendis manon kaj lipumis iom la viskigrogon. La edzino foje kaj refoje turnis la ŝtrumpon. Iomtempe li atentis la movojn de ŝiaj rondetaĵ, bone zorgitaj manoj, sur kiuj paro da ringoj ekfulmis en la sunlumo. Estis forta varmo ĉi tie sur la teraso. Oni reale sentis kiel vaporas, sed tio certe estis treege higieno, kaj laodoro de la rozoj vere pendis en la aero, Memorigas pri Solliden, la ĉambelano estis dirinta — jes, certe estas neordinare bele. La rozoj, ili estis ideo de Hilma. Hilma havas grandiozan belguston. Solliden? Jes, estas aristokrate.

Certe, aristokrateco egalas al aristokrateco — komercista nobelaro aŭ alia nobelaro, ne estas diferenco.

La sunsatigita silento estis rompita de klako de la klin-ko de la parka barilpordo. Estis kelkaj venantoj jes, ĉu Signe?

La direktoro ŝovis la ĉapelon iom supren kaj netrigardis sub la randaĵo.

Ankaŭ la edzino ekrigardis supren de la ŝtrumpo. Ŝi havis malhele bluajn, preskaŭ nigrajn okulojn. Ili ĉiam estis atentemaj, sed ĝuste tiam ili ŝajnis iom akraj. Dum momento ili renkontis la rigardon de la direktoro.

”Ĉi tiu mirinda magistro Berg,” ŝi diris nelaŭte.

La paŝoj proksimiĝis, Evidente estis kelke da personoj. ”La magistro ja akompanos posttagmeze?” demandis junulina voĉo.

”Ne, tion mi ne intencas. Evidente mi ne havas tempon por tio — devos legi.”

”Sed la magistro nepre akompanu? Se ni petos tre bele?” La voĉnuanco estis insista kaj duone koketa. ”La magistro ne povas imagi, kiel bele estas tie ekstere. Plej bele sur tuta Västerö, Memoru, ke vi ekhavas kafon. La kuiristino faris mirindan migdaltorton.”

”Tio sonas ja tente, certe.”

”Jes, do la magistro akompanu. Vi, kandidato, helpu al ni! Vi certe havas multe pli fortan influon ol ni.”

”Miaparte mi opinias, ke migdaltorto devas decidiĝi,” diris tria voĉo iom ŝerce. Estis tiu de la kandidato.

Nek la direktoro nek la sinjorino diris ion, kie ili sidis en la laŭbo aŭdante la interparolon, kiu daŭris flirti trans la arbetaro kaj fine ĉesis. Kiam Signe malaperis en la vilaon kaj la aliaj pluiris laŭlonge trans la rozuoj la sinjorino diris iom medite:

”Kion vi diras pri ĉi tio?”

”Ho, kion mi diru? Ne estas certe, ke estas io.”

”Sed imagu, se estus? Mi ne scias, ke Signe iam antaŭe kondukis simile al iu sinjoro. Estus tre malĝojige.”

”Al li kompreneble estus bonege. Grandioza kapto.” Iomtempe estis silento. La sinjorino mordis lipon kaj disvolvis ankoraŭ iom la fadenbulon en la laborkorbo.

”Ke li ĉiam ŝajngas esti preskaŭ neakirebla, tio, mi kredas, estas plej danĝera. Estus multe pli bone, se li estus fervora — kiel ĉiuj aliaj — ĉar tio ne plaĉus al Signe.”

”Jees,” la direktoro diris mallonge.

Ree silentiĝis. La direktoro sidis kun iom sulkigitaj brovoj. Li sidis fiksrigardante la viskipladon. La akvujo estis malsekiĝinta pro la glacio, kaj la viskio briletis verdflave en la forta lumo.

”Se li almenaŭ estus medicinisto aŭ juristo — sed instruisto,” li subite diris. ”Estas io malbeninde mizera.”

”Kvankam li estas ja filozofia magistro.”

”Jes, ĉu tio estas pli bona.”

III.

La rozarbetaro etendiĝis ĉiuflanke ĉirkaŭ la teraso. Meze antaŭ la enirejo ĝi havis grandan barilpordon kun supera arko, sed ĉe la postflanko de la vilao ankaŭ troviĝis malgranda malfermaĵo, kiu kondukis malsupren al la parko. La direktoro estis irinta ĉirkaŭ la domo kaj paŝis malrapide laŭlonge de la parka vojeto al la nova krado por grimprozujoj. Ĝi estis la plej lasta ideo de Hilma, cetera bela ideo.

Senvole li pensis tion. Ĝuste tie ĉi ĝi estis bonega ideo, ĉar ĉi tie estas la plej malbela punkto de Rozĝarden', kvankam la panoramo ne estas malbona. La krado ĝuste kovris ĉion, kio ne aspektas agrabla en la deklivo, malnovan ŝtonrompejon kaj sabloprenejon. Tra la malgrandaj fenestrosimilaj kvarangulaj malfermaĵoj alte en la krado oni vidis nur tion, kio estas bela, la grundon trans la ŝtonrompejo, la bordon kaj la maron.

Ĝuste tiam estis neordinare bele. Malgraŭ sia malkontento li staris iomtempe ĉe unu el la malfermaĵoj rigardante. En la vidaĵo subite aperis junulino en blanka vestaĵo. Ŝi estis veninta de supre — jes ja, fraŭlino Bergfelt, la filino de la koloneledzino. Estis ŝi, kiu ĵus troviĝis kune kun la aliaj ĉe la barilpordo. Li ankoraŭ pli sulkiĝis la brovojn kaj sekvis per la rigardo la blankvestitan aperaĵon.

Tiu magistro Berg, estas ja —

Ĉu al tiaspeca bubo oni kolektis ĉion? La duan fojon en iom da tempo aperis al lia interna vido la domo en Göteborg — la aŭtomobilejo — la kontoro ĉe Orienta Havenstrato — kaj Vilao Rozĝarden' — Västerö — ĉio. Certe tio gustus bone al tiaspeculo — kaj Signe, kiu estas tiel blindstulte obstina, se estas io —

Li ĉiam opiniis, ke Signe, kiam ŝi edziniĝos, havu grafon,

Dum iom da tempo li staris pensante pri la konatularo hejme en Göteborg kaj la baneja societo — nur eminentularo. Signe neniam interrilatis kun aliaj ol eminentaj familioj, aŭ titoloj aŭ mono. Sed jen venas simpla instruisto, ordinara instruisto en lernejo, simpla filozofia magistro. — Nun oni kompreneble devas ordoni haltu. Tio estas ja devo.

Li staris kun la manoj en la pantalonpoŝoj rigardante eksteren al la blua akvo. Li estis tiel okupata de sia meditado, ke li ne atentis la venantojn ĝis kiam ili troviĝis ĝuste apud la malgranda truo. Estis magistro Berg kaj la kandidato.

La aero pendis varmege kaj peze sur la deklivo kun la ŝtonrompejo, sed proksime ekster la krado estis longa ŝtonbenko. Ankaŭ ĝi estis laŭ ideo de sinjorino Westerman. Al ŝi plaĉis sidlokoj en la parko.

"Tie ĉi ni sidiĝu," diris la kandidato. "Estas terura varmego."

La magistro demetis la studentĉapon kaj sidis ventumante per ĝi. Li estis altstatura kaj malgrasa, kun hela vizaĝo kaj blondaj haroj.

”Jes,” li diris, ”sed tie ĉi estas bele. Tiu ĉi loko konvenus por poeto. Ĝi efikas iom kvazaŭ ’pli proksime, Dio, al vi’. Sed tie ĉi estas kiel pri ĉio alia en la mondo, kie poeto devus loĝi, tie loĝas grandkomercisto.”

La kandidato klinis la kapon.

”Sed oni devas konsenti, ke ili havas bonguston, tiuj ĉi Westermanoj.”

”Jes, ion ili ja devas havi.”

Estis silento iomtempe sur la benko. La kandidato sidis rigardante la maron. Velboato aperis tre malproksime tie ekstere.

”Sed la knabino estas bela,” li diris subite. ”Ĉu vi ne opinias tion?”

”Jes, tre.”

”Ŝi estas ja havinda.”

”Ĉu ŝajnas al vi?” La respondo sonis indiferenta. ”Jes. Se vi ne estus tiel granda stultulo, vi komprenus tion.”

”Kiel?”

”Vi estas kontraŭnature sensenta. Se tiel bela junulino estus ravita pri mi ...”

La magistro ruĝiĝis iom.

”Ŝajnas al mi, ke vere estas domaĝo pri ŝi,” daŭrigis la kandidato. ”Eĉ se vi mortbatus min, mi ne komprenas

ke vi havas tian rezistpovon. Serioze dirite, kian difekton ŝi havas? Komence mi supozis, ke vi trovas ŝin ĉarma.”

”Ĉu vi supozis? Tiam vi supozis erare. Mi neniam enamiĝus al tia junulino, kia estas fraŭlino Westerman.”

”Kial tiel?”

”Ĉar mi havas respekton por la vivo kaj la leĝoj de la naturo.”

”Kia estas via senco?”

”Ŝajnas al mi, ke mi trovis, ke estas io, kion oni nomas specon kaj rason. Negro ne naskas blankulon, kaj blankulo ne naskan negron.”

La kandidato aspektis iom demanda. La magistro sidis fuŝdesegnante en la sablo antaŭ la benko.

”Tio rilatas al la kaŭzo. kial mi elektis mian profesion. Mi kredas ke mi estas naskita por esti blanka, kaj se mi edziĝos, mi volos havi blankan junulinon.”

”Estas mirinda metafiziko.”

”Do mi provos paroli pli klare. Troviĝas du manieroj por vivi, unu estas pensi nur pri sia palpebla profito kaj alia estas vivi por io alia. Tion oni havas de la komenco. Kelkaj estas naskitaj kun negocemo kaj ĝi vidas ĝis la muro, sed tie ĝi haltas. Kelkaj vidas tra la muro, kaj la vivo komenciĝas nur ekstere de la muro, tiu vivo kiu valoras, mi volas diri.”

”Vi aludas la spiritan?”

”Ĝuste. La pensaro, la ideo, tio, kio liberigas de ĉiuj akcesoraĵoj. Kaj homo tia — ni povas ja nomi ĉi tiun Westerman kiel ekzemplon — ĉu vi kredas, ke li havas komprenon, ke troviĝas io pli grava ol mono?”

”Sed ili ja ne devas nepre esti tiaj amfibioj!”

”Mi opinias, ke ili estas tiaj. Ĉu vi kredas, ke homo povus al profesia subpremo de la plejbono en si dediĉi la solan vivon, kiun li havas ĉi tie sur la tero, kaj tamen esti vera homo?”

”Subpremo? Vi estas ja tro malica.”

”Ne, mi nur provas diri la veron. Troviĝas io, kio nomiĝas virtoj. Estas unu el la plej unuaj eltrovoj, kiuj estas faritaj, ĉu ne? Ĉu vi nun kredas, ke per virtoj, ekzemple respektemo kaj konsideroj pri rajto de aliaj kaj per ĉiama diro de vero, Westerman kolektis siajn milionojn? Aŭ, ĉu per pereigo de konkurantoj kaj atento pri okazoj kaj uzado de la ungoj?”

”Per la ungoj, tio estas ja evidenta.”

”Jes, supozeble estas tiel. Ĉu oni povas imagi al si negocon bazitan sur virto? Ne, ĉar tio certe ne donus profiton. Sed nun mi opinias, ke dupiedulo sen homaj virtoj ne estas reala homo. Kaj iu, kiu ne estas reala homo, ne povos havi realajn infanojn. Neniam mi kuraĝus edziĝi kun tia junulino, kia estas fraŭlino Westerman.”

”Kuraĝus?”

”Ne. Mi konstante timus, ke mi iun tagon vidos la heredajn ecojn aperantajn en ŝi. Kaj vi havu konvinkon, ke tio okazos. Neniu povas liberiĝi de sia speco. Nun ŝi estas kaj bela kaj bona, sed ŝi havas nur dek naŭ jarojn. Atendu ĝis ŝi estos pli aĝa, aŭ ĝis kiam ŝi volos hava ion — tiam okazos ...”

”Mi kredas, ke ŝi volas havi vin.”

”Tio supozeble estas imago, sed ŝajnas al mi bedaŭrinde, ĉar mi ne volas veni en la Westermanan medion. Same volonte mi povus eniri leonneston, provante forkutimiĝi je homa parolo.”

”Vi estas silike malmola idealisto,” diris la kandidato post iom da tempo. ”Mi pensdemandas, kion estus diranta tia kiel Westerman, se li aŭdus vin.”

”Li ne dirus eĉ ion, ĉar li ne komprenus tion. Vi havu konvinkon, ke li opinias ke li estas bonega, konsiderata kiel homo. Ulo kiel mi, kiu libervole elektas profesion, per kiu oni neniam atingos ĝis dekmil poĵare, al li certe ŝajnas sentaŭga. Li povas ja nenion scii pri mondo, kiun li ne povas vidi — kompatindulo, cetere.”

La direktoro staris rigardante post la du junaj viroj, kiuj grimpis malsupren de la deklivo en la sunvarmego. La koloro de lia grasa vizaĝo jen fortiĝis jen paliĝis, kaj la esprimo en liaj bluaj okuloj estis tre demanda. Ne, li efektive ne komprenis — tio signifas: ke magistro Berg ne volas havi Signen, tion li komprenis. Kaj tio devus ja

esti al li faciliĝo, kvankam estis nekompreneble arogante ...

Sed, mirinde, ne estis tiel — ne ĝuste tiel, kiel devus esti. Dum li iris la parkan vojeton al la teraso, li havis tre kuriozan senton. Li ne povis ĝuste klarigi ĝin al si. Estis kvazaŭ li iamaniere starus antaŭ fermita pordo.

”Signe ricevos perlĉenon,” li subite diris duonlaŭte, kaj estis kvazaŭ io neperceptebla, embarasa, preskaŭ senhelpa interne de li estus esprimita per tiuj vortoj.

Fanny Alving

El "Duonhelo kaj plenlumo"

Majstra pafo

Sinjoroj el la urbo, grandkomercisto Sjögren kaj apostekisto Melin, unuokaze estis en la arbaro akompanataj de la bubo de Plot-Olĉjo. Li kondukis iliajn hundojn kaj portis la manĝaĵsaketon, kaj cetere li estos portonta tiujn leporojn, el kiuj ili eble timigus la vivojn. Estis ĉasado, vi ja komprenas.

La tempo por matenmanĝo venis sufiĉe baldaŭ. La manĝaĵoj estis bongustaj, kaj manĝemon ili ankaŭ havis. Estis ĉarmege. La bubo ricevis longan drinkon da brando kaj amason da longaj buterpanoj, kaj pro tio li estis gaja pli ol ordinare. La grandkomercisto ŝercis, kaj diris multajn spritaĵojn al la bubo. Ankaŭ la bubo provis malfermi la buŝon, fanfaronante kiom li povis. Li ankoraŭ ne ĉeestis la komunilernadon, sed tamen li ĵuris, ke en la tuta kristanujo oni ne povas trovi pafilon egalan al la pafilo de lia avo. Per tiu pafilo lia avo iuokaze trafis tetrinon nekredeble malproksiman. Plie li rakontis pri la interspaco inter la avo kaj la tetrino neniu kreitaĵo pli frue aŭdis rakonton pri pli longa distanco. Estis pli longe, ol oni nun povus vidi sen tri paroj da okulvitroj. La sinjoroj kompreneble konsentis, ke ĝi estis

mirinda pafilo, tiu de la avo. — Tiam demandis la grandkomercisto, ĉu ili aŭdis pri tiu okazo, kiam li trafis tetron kaj ezokon per unu pafo. Ne, la bubo ne sciis pri tio, sed li ege deziris aŭdi, kiamaniere tia faro estas ebla.

Nu. Okazis tiel, ke la grandkomercisto ĉasis. Tiam li ekvidis tetron sidantan en pinsupro sur insuleto en lago. Estis maldika glatglacio. Li paŝis sur la glacion, kaj komencis iri al la insuleto. La tetro restis, tamen la grandkomercisto certe ne povis esperi, ke li venos en pafdistanco antaŭ ol forflugos la tetro. Tamen li faris provon. Dum li iris tiel, la piedoj ekglitis kaj li sidiĝis tiel fortege, ke tio ne estas rakontebla. Estis mirinde, ke la glacio ne disiĝis, sed ĝi krakis terure. — Kaj vi povas kredi tion ĉi — sub li estis granda stelo en la glacio. Li ja perdfaligis la pafilon, kaj vi komprenas ke la pafo tiam ekbrulis. — "Tiu ĉi rakonto ne estas rimarkinde kurioza," diris la ido de Plot-Olĉjo, intencante mensogi plue pri la pafilo de la avo. Sed la grandkomercisto rapidis fini sian rakonton. La pafo, ekbrulinte ĉe lia falo, trafis la tetron, kaj tio estis ja strange. Sed plej mirige en la tuta rakonto estas ke granda ezoko meditante staris precize sub la glacia stelo, kaj pro la aerpremo ĝi senkonsciiĝis. Restis nur formeti la glacipecojn kaj levi ĝin. Estis granda ezoko, certe pli ol ordinare plenkreskinta.

La bubo silentegis. Li estis superita, kaj li ne kapablis elpensi pri la pafilo de la avo ion sufiĉe strangan.

Post duonhoro interparolis la grandkomercisto kaj la apotekisto pri aliaj aferoj — pri fervojaj akcioj kaj similaj temoj. Tiam la ido de Plot-Olĉjo komencis ree senti iom da kuraĝo. Du aŭ tri fojojn li ĝentile kraĉis — ĝentile sed decide. Poste li diris:

”Mi povas diri al vi, Sjögren, ke mi kredas kiom mi mem volas, ĉu via ezoko estis tute plenkreskinta.”

Erik Hedberg

Mazeo kaj lia ambasadoro

En ornamriĉa dormoĉambro estis lito kun baldakeno kaj angulaj plumfaskoj. Malantaŭ la duone kun-
tiritaj litkurtenoj kuŝis sesdektrijara maljunulo sub kov-
rilo sternita ĝis sub la barbo kaj kun la longaj blanki-
ĝintaj haroj dismetitaj sur la kuseno. La tutan frunton
kovris plastro. Estis Mazeo.

Sur la tapiŝo apud la lito kuŝis kelkaj latinaj kaj fran-
caj versaĵverkoj inter medikamentuoj, kaj proksime de
la pordo nelaŭte interparolis malgranda kaj malgrasa
pastro kun du verde vestitaj senditoj de caro Petro.

—Li apenaŭ komprenas viajn vortojn — flustris la pas-
tro; malĝojmiene li explore rigardis la malsanulon. —
Longajn periodojn li kuŝas mute. Kiu estus supozinta, ke
la vigla maljunulo tiel subite kuŝiĝos sur sian mortejon!

—Ivan Stefanoviĉ! — diris per plilaŭtigata voĉo unu el
la fremduloj proksimiĝante al la lito. — Nia nobla caro,
via estro, salutigas al vi. Ĉu vi memoras? Li malliberigis
kaj resendis al vi kiel amikan donacon tiujn tri el viaj
kozakoj, kiuj kaŝe iris al li por rakonti, ke vi sekrete pre-
paras ribelon kontraŭ lia supereco. Ivan Stefanoviĉ, li
fidas pri via fideleco.

La okuloj de Mazepo malfermiĝis lace, kaj la lipoj moviĝis, sed li povis aŭdigi nur nekompreneblan subdiron.

—Ni komprenas vin! — kriis la senditoj samtempe. — Ni komprenas vin! Vi benas lin, kaj dankas pro lia favoro, kaj ni diros al li, ke vi jam suferas pro aĝo, kaj ke vi turnis viajn pensojn al tio, kio ne apartenas al tiu ĉi mondo!

—Mi timas, — murmuris la pastro, — ke la fino venos baldaŭ.

La senditoj kapklinis serioze kaj iris malantaŭen el la dormoĉambro.

Post ilia eliro la pastro riglis la pordon. — Ili foriris! — li diris.

Mazepo sidiĝis, ŝiris la plastron de sia frunto kaj ĵetis ĝin malproksimen sur la tapiŝon. Estis brileto kaj ŝerco en liaj malhelaj, vaste malfermitaj okuloj. Sur la vangoj fortiĝis kaj repaliĝis la ruĝo, kaj sub la belkurba nazo la dentoj brilis, blankaj kaj sanaj kvazaŭ ĉe junulo. Li forpuŝis la kovrilon, kaj plene vestita en surtuto kaj botoj kun spronoj li saltis el la lito kaj pinĉis ŝerce la pastron en la flanko.

—Vi pastraĉo, vi vagabondo! Nun ni agis ne malbone. En Moskvo oni kredos, ke maljuna Mazepo kuŝas senforta kaj nedanĝera. Dio estu favora al lia pia animo! Hahaha! Vi pastraĉo! Vi arĥiafektulo!

La pastro ridis seke. Li estis eksigita episkopo el Bulgarujo, kaj lia ronda kapo kun la mallonga nazo kaj profunde sidantaj okuloj ŝajnis kvazaŭ kranio.

Mazepo ankoraŭ pli petoliĝis.

—Mazepo mortanta! Jes, demandu liajn amatinojn! Demandu! Ne, vi granda moskva caro, nun mi volas vivi kaj fariĝi libera de vi.

—La caro suspektas vin, sinjoro, sed li volas senpoviĝi vin per favoro. Tia li povas esti.

—Kaj per tio mi estus venkita, se li ne estus batinta min sur la orelo iun nokton ĉe la tablo, kiam ni estis ebriaj. Mi konsideras mian orelon same sankta kiel lian, kaj ofendon mi pardonas neniam. Ĝi restas instiganta en la animo. Ne estante reĝo pro naskiĝo, mi estas tio laŭ inklino. Kia estas la senco, kiam li volas meti germanajn surtutojn sur miajn bravajn kozakvirojn! Nun al la afero. Rakontu viajn aventurojn, vi mensogulo!

—Jes, sinjoro. Vestita kiel almozmonaĥo mi iris la vojojn al la ĉeftendaro de la svedoj, sed mi iam sidigis la drinkejknabinon sur la genuon kaj la kruĉon sur la tabloangulon, kaj kiam mi rigardis malsupren kaj vidis ke piedfingro aperas tra truo de mia ŝuo, tiam mi medite pensis: Jen la ambasadoro de Mazepo!

—Nu, kiel ŝajnis al vi la dando?

—La dando?

—Kompreneble! La sveda majesto! Reĝo Karolo! Ĉu vi ne kredas, ke li dandas per siaj fulgaj ĉifonoj tiom, kiom franca parfumprinco per siaj silkaj ŝtrumpoj? Kaj li havas la mirindan nordlandan facilanimecon, kiu ĉiam krakas per la rajdovipo kaj krias: Bagatelo, tio signifas nenion! Neniu domaĝo! — Li neniam pli ol dum unu nokto povis malĝoji pro malprogreso. Tio estas la sekreto de lia potenco. Ve al li kaj al lia sorto, kiam li sidos sendorme nokton post nokto! Mi volas vidi lin! Mi sopiras! Sed, parolu do!

—Unue mi trovis lin kun peruko kaj kiraso sur la kapuko aŭ antaŭtuko de la drinkeja knabino, kaj sur la glaso, el kiu mi drinkis, kaj sur la sukeraĵo, kiun mi manĝis, kaj sur la tablotukoj, kaj sur kestkovriloj kaj tabakujoj kaj foiraj budoj. Neniu parolis krom pri li, kaj la infanoj ordigis sin vice, ludante svedan diservon. La vilaĝanoj nomis lin la protestanta glavpapo elektita de Dio mem, kaj levis tiam la ĉapelojn.

—Nu ja, sed kia vi mem trovis lin, kiam vi venis al la ĉeftendaro?

—Mi avertas vin. Mi antaŭdiras malprosperon. Mi vidis la fatalsignon. Mi trovis lin malmodesta kaj tro fiera kiel grandkarakterulo, kiun la mondo komencas pridubi.

—Marlborough post la aŭdienco en Saksujo lasis lian tendaron eklevante la ŝultrojn, kaj la regnestroj komen-

cas ridi pri li malantaŭ lia dorso ... Liaj propraj generaloj laciĝis.

—Li fariĝis heroo de la popolamasoj, vi opinias. Nu, kio plu! Ĝuste tian viron mi bezonas por kolekti la sovaĝajn bandojn. Se vi ne asertus, ke vi vidis lin manĝanta kaj trinkanta, mi ne kredus ke li estas vivanta homo. Tiaokaze mi dirus: La juna princo de la svedoj falis ĉe Narvo, sed lia ombro daŭras rajdi antaŭ la trupoj, neĝo falas kaj falas, tamburoj bruas kaj tondras, kaj la maldensiĝantaj batalionoj ne scias nek komprenas kien li kondukas ilin. Kiam la kontraŭuloj rekonas lin en la pulvofumo, ili superstiĉe mallevas la muskedojn kaj ne kuraĝas pafi, kaj li mem ne atentus, ke li hakmortigas virojn, kiuj pretigas sin por genufalo. Dungitaj ŝtelmurdistoj ĵetas la armilojn vidante lin, kaj denuncas sin mem — kaj li foririgas ilin nepunitaj. Ne parolu al li pri regnoj kaj konvencioj! Li ne militas kiel la homoj pri posedaĵoj; li portas la Dian glavon por venĝi kaj rekompenci. Kion li postulis kiel venksalajron ĵus ĉe la packonsento? Monon? Landon? De Aŭstrio li postulis la ĉambelanon, kiu kalumniis lin ĉe festena tablo, kaj bandon da rusaj militistoj, kiuj forkuris tien trans la landlimon ... kaj kredliberecon por la protestantoj. De Prusujo li postulis malliberigon de kolonelo, kiu donis konsilojn al la caro, kaj ekzilon de skribisto, kiu mokis liajn ordonojn kontraŭ la pietistoj ... De Saksujo li postulis Patkulon kaj ĉiujn sve-

dajn alkurintojn, sed liberecon por princo Sobieski kaj ĉiuj saksoj kiuj aliĝis al la svedoj. Reĝon Aŭguston mem li devigis paki la malnovajn polajn reĝemblemojn en veluran kofron kaj sendi ilin al reĝo Stanislaus. Eksiginte en Polujo reĝon Aŭguston, li nun volas eksigi la caron aŭ inviti lin al duelo, sed iliajn kronojn kaj regtaskojn li ne volas akcepti eĉ kiel donacojn. Post la antikva epoko pli stranga viro ne tenis glavon aŭ sceptron!

Dum Mazepo parolis, li tiel forte tenis litpalison, ke la plumfaskoj de la silkbaldakeno skuiĝis, sed la pastro levis tri fingrojn respondante:

—Mi avertis vin! Ĉion, kion li tuŝas, li inaŭguras al mizero kaj morto. Sed li estas la patrono de la aventuroloj. Li faras el aventuro persiston kaj grandiozecon. Ankaŭ vi, sinjoro, estas aventurulo, kaj mi mem estas la plej aventura el ni ĉiuj. Tial mi volas esti cedema.

Li mallevis la manon kaj proksimiĝis kun senrespekta intimeco.

—Vi, Ivan Stefanoviĉ! Ĉu vi neniam miris, ĉar mi venis ĝuste al via pordo?

—Vi estis forpelita el via episkopa sidejo pro malkredo kaj friponaĵoj.

—Tio precipe koncernis malgravan ŝteleton. Paro da smeraldoj sidis sur la ikonostaso ...

— kaj vi anstataŭigis ilin per vitropecoj, kaj vendis ilin kaŝe por vivi iom pli komforte kaj pli konvene al servisto de la eklezio.

— Ni ne parolu pli multe pri tio! Mi aŭdis la famon pri Mazepo, la estinta paĝo ĉe la kortego de Johan Kazimir, kiu kun sia pudrita peruko tiel diligente amindumis la erarigantan sekson, ke ĵaluza edzo fine ligis lin nudan sur ĉevaldorson kaj elpelis lin en la sovaĝejon. Kaj tie li fondis sian aventurulan regnon. Sankta Andreo ŝirmu vin, Mazepo! Mi bezonis malgrandan sinjoron, kiu ne arogantas forhaki bonan kapon, kaj kiu lasas al mi trankvilon por legi miajn grekojn kaj mian Makjavelon, kaj al kiu mi povas diri: Jen, mia bonulo! Ĉio estas imago, eĉ ke vi estas mastro kaj mi servisto. Tial mi iris al vi. Sed la aventurula sango ne ŝatas sidadon. Kaj ĝin ankaŭ enuigas cia akvomiksita vino, ĉar vi estas granda avarulo, Mazepo; kaj ĉar vi nun meditas pri granda monafero je muskedkugloj, mi nun akompanos vin. Kaj ĉar la sveda reĝo ne plu aŭskultas siajn generalojn, nek la petleterojn de sia avino kaj de sia popolo, kaj ĉar la plej danĝera kaj plej malebla vojo kondukas tien ĉi, tial li volas akcepti vian proponon pri konfedero. Kune kun vi kaj viaj kozakoj li volas marŝi kontraŭ via mastro. Jen estas la dokumentoj.

La pastro forskuis la mantelon, kaj staris en kozaka vesto kun pistoloj en la zono, kaj ĉe la brusto li eltiris kelkajn kunfalditajn paperojn.

Mazepo paliĝis prenante ilin, kaj tenis ilin longe premataj sur sia brusto, mallevante la frunton kaj riverencante kiel antaŭ sanktulbildo.

—Tamburoj! Tamburoj! — li balbutis emocie.

Sed kiam la pastro venis al la pordo, li haltigis lin.

—Ne; movigu la tamburojn nur morgaŭ.

Post tio li iris al simpla ligna tablo en apuda ĉambro kaj sidiĝis ĉe siaj kontlibroj. Li alvokigis siajn vogtojn kaj kalkulis kaj rekalkulis kaj ordonis pri multe da ŝparado en la laktejo. Je duono gaja rabistkavaliro, kaj je duono klera sed ŝparema bienposedanto, li observis fine la pakadon de siaj multnombraj kofroj kaj kestoĵoj. Foje li mem klinis sin por helpi. Fine li la sekvintan matenon vestis sin en malnovmoda, tre bela kozaka vesto. Senpacience kaj moviĝeme li saltleviĝis de la seĝo tuj post kiam li sidiĝis, sed antaŭ la spegulo li restis staranta certe plenan horon, jen kaj jen karesante tra la barbo per siaj graciaj malgrandaj blankaj manoj.

Nur kiam la muziko aŭdiĝis, li sidiĝis sur la selon, kaj galopigis sian ĉevalon.

*

Kiam li iom poste estis veninta al la svedoj, kaj iumate-
ne dum neĝa blovado rajdis en la akompanantaro de la
reĝo, la pastro kvazaŭ senintence lokigis sian ĉevalon al
lia flanko. Ĉirkaŭe pretermarŝis la trupoj plene malpuri-
ĝintaj de koto, kaj kun armiloj kaj kanonoj kovritaj, por
ke ili ne rustiĝu. La pakveturiloj tintbruis kun siaj ŝarĝoj
de provizsakoj kaj malsanuloj kaj iam kun kovrita ĉer-
ko. Poste kondukiĝis aroj da kolektitaj brutoj. Ebriaj za-
porogoj, kurantaj kozakoj, kaj fervore tamburantaj po-
laj valakoj rajdis kun verdaj kaj ruĝaj manteloj kaj kun
altaj flavkupraj kaskoj, sur kiuj tintis sonoriletoj. Kelkaj
svingis tufoarnamitajn pikilojn kaj pafarkojn aŭ longajn
silikhĉanajn pafilojn kun arĝentaj aŭ ostaj ornamaĵoj.
Aliaj ludis per plendsonaj fajfiloj el ligno. Estis mult-
kolora fabelmarŝo, kiu sur nepreparitaj kaj ne konataj
arbarvojoj, sur frostitaj marĉoj kaj sub neĝaj abioj direk-
tiĝis al la enigma Oriento.

—Mazepo, — la pastro ekparolis nelaŭte. — Vi prome-
sis veni kun tridek mil kozakoj al la svedoj, sed apenaŭ
kvarmil sekvis vin.

Mazepo daŭrigis galopigi sian ruĝan ĉevalon, kaj ek-
klinetis la kapon senvorte, sed la pastro ne laciĝis pri
mokado.

—Antaŭhieraŭ forkuris la duono el ili. Hieraŭ forku-
ris ankoraŭ pli multaj. Baldaŭ restos al vi nur kelkcen-
to da viroj, nur la servistoj, kiuj gardas viajn kofrojn kaj

viajn du barelojn da oro. Via ribelo fariĝis perfidita, viaj urboj estas bruligitaj, viaj malmultaj fideluloj najligitaj sur tabuloj kaj ĵetitaj en la riverojn. Baldaŭ vi nur estos belaspekta rajdanto en la akompanantaro de la sveda reĝo.

Mazepo silentis kaj la pastro daŭrigis:

—Hodiaŭ ankaŭ mi volas forlasi vin, ĉar la malforta biero de la svedoj gustas al mi acide kaj la piedfingro ree aperas tro longe eksteren tra mia ŝuo. Via ambasadoro bezonas pli riĉan mastron. Adiaŭ, Ivan Stefanoviĉ!

Mazepo respondis:

—Tiom longe, kiom restos mia kapo kaj mia filozofio, mi restos Mazepo. Kiam miaj kozakoj turnis sin kaj kuris, mi portigis antaŭ mi la hetmanan sceptron kaj batbastonegon, kaj mi rajdis al la reĝo kvazaŭ venante antaŭ la milionoj de Kserkses. Kaj li kun sia malriĉiĝinta regno, siaj malkontentaj generaloj kaj sia malleviĝanta suno akceptis min kiel la plej feliĉa el ĉiuj princoj. Ĉu embarasas lin kaj min, kiom da homoj rajdas post ni! Li estas sata pri reĝa honoro, li volas esti ankaŭ homo pro Dia favoro. Li pensas pri la historio, kiel amanto pensas pri sia amatino: li ne volas akiri per eminenta deveno ŝian favoron, sed per sia personeco. Se ni ambaŭ, li kaj mi, iutage estos la du lastvivantoj, sidantaj en terkavo sur la stepo, ni tamen daŭrigos paroli filozofion kaj konduki unu al la alia kiel ĉe kronumfestena tablo.

—Vi parolas pri lia malleviĝanta suno. Vi rimarkis la signon de la fatalo, ankaŭ vi. Li ne plu povas paroli, krom fanfaroni kiel veturigisto.

—Facile estas montri modestecon, kiam ĉiuj laŭdas.

Mazepo altigis sian blankbuklan kapon kun fiera mal-estimo, kaj galopis al la reĝo, kiu levis la ĉapelon kaj riverencis fojon post fojo sur la selo.

Ĉirkaŭe babilbruis kelkaj el la generaloj tiel laŭte kiel eble, por ke la reĝo aŭdu ilin.

—Kiam mi venos al Moskvo, — diris Anders Lagerkrona, — mi flikos per la dormoĉapo de la caro mian rajdpantalonon ĉe la sidejo.

—Hontu! — respondis Aksel Sparre. — Estas malnova antaŭdiro, ke iu Sparre fariĝos guberniestro en Krem-lino.

—Tien ĉi! — kriis junkroj. — Pafu ĉiun, kiu volas malhelpi tiel grandan kaj altan princon marŝadi kie ajn laŭ sia volo.

La reĝo ridetis kaj murmurkantetis: La rusoj kuros, la rusoj kuros! — Sed kiam la parolantoj ne plu estis aŭdataj de la reĝo, ili ŝanĝiĝis, kaj fariĝis distritaj kaj malgaj-humoraj.

—Majesto! — kriis Mazepo tiam en kraksonanta latino kaj kun brilaj okuloj. — Tiel malproksimen antaŭen-petretos la venkantaj armiloj de via moŝto, ke ni iumate ne troviĝos apenaŭ ok mejlojn de Azio.

—Pri tio la kleruloj povus diskuti, — la reĝo respondis amuzite, sed serĉante la latinajn vortojn kaj kun la rigardo fiksita sur la blankaj kaj ĉarme moviĝemaj manoj de Mazepo. — Se la limo ne estas malproksima, ni iru ankaŭ tien por povi diri, ke ni estis ankaŭ en Azio.

La voĉoj malpliaŭdiĝis kaj la pastro haltigis sian ĉevalon.

—Azio, — li murmuris, — Azio ne kuŝas meze en Eŭropo. Sed rajdu antaŭen, rajdu antaŭen, vi aventuremaj sinjoroj! Mi tiomfoje ŝanĝis nomojn kaj vestojn, ke neniu el vi svedoj povus rimarki, kiu mi estas. Sed ne forgesu, ke la ĉifonmonaĥo, la vagabondo, la ambasadoro de Mazepo, per sia ruza intertraktado metis sian blufrostitan fingron sur la sorton de vi kaj de via heroo, kaj kondukis vin al la senhoma lando. Vi estas prava, reĝo Karolo, kaj vi, Mazepo. Fine ĉio dependas nur de homoj.

Neĝis, kaj neĝis, kaj li sidis sur sia malgrasa ĉevalo, kiam la batalionoj pretermarŝis, silentaj kaj senpaciencaj. Kiam la plej malantaŭaj soldatoj turnis sin rigardante la nekonatan izolan rajdanton, kaj vidis lian malgrandan kraniokapon, ili ektimis kaj plirapidigis siajn paŝojn.

Verner von Heidenstam

El "La karolanoj"

El "Taglibro de la koro"

5 sept. 1794.

Do mi iris la arbaran vojon al la lagbordo, kie kuŝas la bieno Yxsunda inter muĝetantaj verdaj foliarbaretoj. La kverkoj de la malnova parko staris solenaj kaj grizaj, kiel tiam, kiam ni ludis en ilia ombro, kaj la lemo kreskis ankoraŭ pli dense en la trankvilaj karaslagejoj. La domo mem aspektis ruiniĝinta, kaj kun rideto mi rememoris la admiran sciemon, per kiu mi iam rigardis ĝian grizan ŝtonlongaĵon, la malnovan balustradon kun la sun-montrilo kaj la grizan groton kun ĝia malvarmeto. Nun la tuto prezentis sin falpreta kaj makuldifekta. La moŝtino, kiun mi trovis en ombra bosko kun sia brodpinglo en la mano, min akceptis tre afable. Bedaŭrinde ŝi ne estis sola. Al ŝi apudestis mezaĝa viro kun multe da pudro, grandaj ŝuseruroj, florteksita silkveŝto, kaj ia afekteco en la tuta kostumo, nekonvena al viro kun grizaj haroj ĉe la tempio.

Tiel ili parolis, kaj mi sidis silenta kaj embarasita, povante nur enmeti solajn vortojn en ilian amuzparoladon. Mi sentus min efektive malfeliĉa kaj troa, se la baronino ne

donus al mi jen kaj jen rapidan rigardeton de interkompreno, kvazaŭ ŝi volus diri: "Kiel la maljuna ridindulo tedas min". Kun rimarkinda ĉarmsento en la koro mi rigardis ŝiajn lazurbluajn okulojn, la rozan karnon kaj la ridetantan buŝon, dum ŝi sidis, kun rozo ĉe la blanka gorĝo kaj malpeza ŝtofmoda robo sur sia gracia belforma staturo. Ŝi aspektis kiel dudekelkjara, kaj ne kiel patrino de dekkvarjara filino. Ŝia voĉo karesis mian aŭdon, kiel vespera fajfeto de vento en la somertrankvilaj folioj de la lilioj; mi inspiriĝis, mi revis Julie, Lotte, Aglaya — estas kvazaŭ mi vidus fratinon de vi, malproksime en la soleco de la vespero irantan al la falinta betulo sur la abrupta roko, kie ŝia amanto, mi mem, atendas kun etenditaj brakoj. Mia rigardo atingis longe al la parko, vidis la vojeton, kie ŝi kaj mi paŝetis kaj ludis per leontodaj pilkoj kaj ranunkoloj, kaj interŝanĝis la kisojn de la senkulpa infaneco. Ĉu ŝi ankoraŭ memoras tion? Milo da dolĉaj bildoj incitis mian imagon; mi ekkontemplis, venkita de la pleneco de miaj sentoj, kaj povis nur distre respondi per la plej ordinaraj societfrazoj, kiam la parolado estis direktata al mi.

11 sept. 1794.

Feliĉaj aŭtuntagoj! Kun Nova Héloïse mi iras tra valo kaj arbaro, kaj ĉiu griza ŝtupo, kaj ĉiu muska ŝtono estas amata ripozloko por mi kaj miaj songoj. En mia animo kantas kaj sonoras la vortoj de Saint-Preux, kaj kiom da fojoj mi pense plektas florkronon por via tombo, ho! bonega Jean-Jacques — kiel la aŭtuno beliĝis pro folioj kaj floroj — dum la abiaj suproj super mia kapo fajfetas dolĉe kaj muzike, kiel la larmsalikoĵ ĉe Ermenonville, la ĉiam tremantaj!

Ĉiela Henjo — en tiu ĉi kajero, skribita de mia koro, kaj malfermata nur al ĝi, mi ja kuraĝas nomi vin per tiu nomo, kiu sur miaj lipoj karese restas el la forpasintaj jaroj de la infaneco. Ĉiela Henjo, la frapetadon de viaj paŝoj, kaj la faldbruon de viaj vestoj mi ekaŭdas ĉiam en tiu momento mia ekstazo estas plej granda, kaj mi plej sopiras pri animo partoprenanta mian propran dolĉan ebriecon, kaj vi venas kun la malforta sunbrilo de la aŭtuna arbaro sur viaj vangoj, kaj sur via brusto la blankaj floroj de la aŭtuna ĝardeno. Vi sidiĝas apud mi, kaj dum la laca falado de la folioj vi sidas freŝa kaj sana inter ĉio, kio sopiras velki kaj morti. Ni interparolas. Pri kio? Pri la malgrandaj miozotoj, kolektitaj ĉe la promontora herbejo; pri la malgrandaj ŝafidoj, kiujn la lupo prenis en la arbaro post la salikareto; pri la silentiĝinta ŝpinilo de via

feliĉega¹ patrino, kie sur la tenilo sidis la orkolora silko
por ĉapelo donacota al vi la nomtagon; pri hundo Bijou
enterigita sub la kverko de la parko, kaj vi mallaŭte kan-
tas la unuan kanteton, kiun mia feliĉega¹ patro lernigis
al vi ĉe la gitaro:

*"Estis malgranda, tre malgranda ŝip',
Ne irinta pli frue sur la mar' "*²

Tiam ni silentiĝas pro la feliĉeco de niaj sentoj, kaj
malsekaj okuloj verŝas larmojn pro nedifinebla miksaĵo
de ĝojo kaj melankolio.

Oscar Levertin
Fragmento

- 1 Feliĉega = mortinta (feliĉega en la ĉielo)
- 2 "C'était un tout petit, petit navire,
qui n'avait ja-ja-jamais navigué".

La magistroj el Österås

Estis en Österås tagmezo de marto en la jaro 1596. En la antaŭa tago degelis, kaj la tagvarmeto fluidigis la neĝon. La frostita fundo aspektis dezerta en la lumo sub la fergriza ĉielo. Penetrema nordvento kuris laŭlonge de la senhomaj stratoj en tiu malriĉa loko kun timeme amasiĝintaj lignodomoj, kiu estis Österås post ĉiuj bruloj kaj renversoj en la komenco de la jarcento. Nur sola ĉarpentita albordejo ĉe Mälaren restis de la malnova haveno kun ĝia hansakontoro kaj ĝiaj ŝipoj eĉ el Hispanujo. Detruitaj estis ĉiuj monumentkonstruaĵoj kaj gildodomoj, la monaĥejoj kaj la ĝardenoj, en kiuj bergamotoj kaj bonkretienoj estis bonkreskemaj. Nur la ĉefpreĝejo de sankta Eskil sur la katedralmonto ankoraŭ superis la urbon, nerompita kaj granda kun fortikaj turoj kaj apogiloj, kaj pri la pasinta epoko kaj ĝia bonstato atestis la tuta korto tie supre kun la tri pordegarkoj de sankta Laŭrenco, sankta Petro kaj sankta Paŭlo. Cetere la antaŭe riĉa komerc- kaj havenurbo fariĝis senluksa metiista urbo, kie oni estis kontentaj, kiam oni neĝenite malvarmis kaj malsatis.

Du junulinoj tre proksime, unu apud la alia, iris supren en la mallarĝa strateto, kiu kondukas al la fonto de sankta Eskil, nun tute senornama kaj nur sekrete vizitata.

—Märta, — diris la pli maljuna, alta ridema bruna knabino kun vulpfela ĉapo, — ĉu vi efektive intencas oferi en la fonto de sankta Eskil? Ĉu vi ne scias, ke tio estas malpermesata?

—Certe, mi scias tion, — respondis la pli juna, kies afabla vizaĝo estis rigida pro streĉita maltrankvilo sub la blua kaptuko. — Sed mia mortinta patrino oferis kaj preĝis tie en ĉiu malfacila okazo, kaj ĝuste nun la bono de mia vivo estas en danĝero. Mi oferos la arĝentan kuleron, kiun mi ricevis ĉe la bapto.

—Gardu vin de arĥiepiskopo Abraham. Li estas sperta lernejo- kaj punmajstro, kaj li ne indulgos. Se li ekscios pri tio, certe estos vergo rekte sur ...

—Ne ŝercu, Gunilo, kaj el Telje kaj el Sigtuna diskoniĝas ja, kiel malafable li kondutas. Multe mi ne esperas, ĉar laŭ la famo li ĉie trudas gefianĉojn geedziĝi. Se ili volas aŭ ne volas, ili estas kunligataj, kiel brutoj. Mia sola fido estas, ke mia baptopatro, la katedrala preposto, sukcesos rakonti pri kia senvola infano mi estis, kiam mi per trudoj estis devigata akcepti la fianĉdonacon de Rewel Larsson.

—Pli bone estas ne diri la ceteron, ke via koramiko estas la brava Jon sur Riddarnäs.

—Silentu! Ĝuste nun baptopatro estas ĉe arĥiepiskopo Abraham. Mi devus sidi hejme, preĝante. Sed mi kredas, ke pli efikos, se mi oferas en la fonton, kiel patrino faris. Sed neniuj vidu nin.

—Ne; estas manĝo, kaj malplene en la fenestroj.

Ili estis alvenintaj al la nezorgata fonto, kies akvo tamen fluis pura, kiel ĉiam. Mortpala pro maltrankvilo, Märta klinis sin malsupren al la akvo, prenis el la jupoŝo arĝentan kuleron, kies tenilo prezentis sanktan Barbaron kun la turo, faligis ĝin en la akvon, kaj murmuretis malnovan preĝon.

La tutan tagon Matias And, la preposto de Österås, staris antaŭ la arĥiepiskopo de Svea regno, Abraham Angermannus, timante kvazaŭ lernejnabo antaŭ instruisto. La famo ne trograndigis pri la severeco de la arĥiepiskopo, kiam li entreprenis sian ekzamenvojaĝon tra la lando, por fine forsarki kun radiko tiun papisman fikreskadon, kiu tiel revastiĝis dum la plendinda regado de reĝo Johano, ke ĝi minacis superi la puran grenon. Magistro And, pro milda humoro kaj natura nedecidemo, estis unu el la ŝanceliĝuloj, kiuj ŝirmis katolikan tradicion, kaj montris la cedemon de afabla maljunulo rilate al la gusto de la paroĥanoj. Nun li kun kreskanta teruro vidis, kiel la arĥiepiskopo maltoleras la malno-

vajn ekleziajn kutimojn, malpermesas al la sonoriloj la laŭdon al Maria, kaj al la oferkandeloj la bruladon sur la altaroj — kaj kiel li korektas kaj punas kun fera severeco. Pli kaj pli malgraviĝis la malgranda kaj griza preposto apud la altstatura grandbarba Angermannus. La latinaĵo de Matias And balbutiĝis kaj konfuziĝis, kaj li senespere skermis en la aero per la blankaj, maldikaj manoj. Li sentis sin kiel Danielo en la leonejo inter la severaj teologoj en la akompanantaro de la arĥiepiskopo kaj la grandaj studentoj, kiuj kun videbla plezuro funkciis kiel ekzekutistoj, vergbatante ĝis sango liajn paroĥanojn. La malgranda preposto singultis interne pli kaj pli peze, kaj vidis image la elplorintan vizaĝon de sia baptofilino. Jen ne estas helpo; la infano estos edzino de la kruda Rewel.

Sur la katedrala monto, ekster la portalo, Angermannus aranĝis sian punjuĝejon, kaj la fundo estis plena de duone mortvergitaj viroj kaj virinoj, kiuj nudigitaj ĝis la talio kuŝis senkonsciaj.

— Nun estas tempo halti por manĝo, — diris la arĥiepiskopo, en granda mustelfela pelto, sidante en seĝego sur la ŝtuparo. — Ĉu la sekretario akurate faris protokolon?

Palnaza, korpe malsimetria skribisto stariĝis riverencante, kaj legis:

”Bakisto Sven Persson, pro malĉasteco, juĝita perdi la dorshaŭton antaŭ du preĝejoj. Plie buĉistservanto Bot-

vid tridek naŭ duoblaj vergbatoj, kvin siteloj da glaciakvo, kaj estos poste metita en karceron por humiliĝi.

Sorĉistino Dorte en Ledberg, kiu kuracpreĝis kontraŭ sorĉmalsano kaj stomakkraĉo, tridek sep duoblaj vergobatoj. Se ŝi ripetos, ŝi ĵetiĝos en la lagon kun ŝtono ĉirkaŭ la kolo.

Tamburisto Lars, kiu estis ebria en la preĝejo, kaj diris, ke sankta Paŭlo malpermesis nur vinon, nenion dirante pri biero, dek duoblaj vergobatoj.

Fianĉino Märta, filino de Anders, akceptinta fianĉdonacon, edziniĝos al Rewel Larsson antaŭ pasko. Se ŝi obstinos, ŝi estu arestita.”

—Bone, bone, — interrompis la arĥiepiskopo la longan punliston. — Mi aŭdas, ke vi skribas precize. Ni iru.

La arĥiepiskopo turnis sin al la preĝejo por voki serviston, kaj tiumomente li ekvidis la bildon de sankta Eskil, kiun li ne vidis antaŭe dum la fervoro por eklezia korektado. Tiam li pugnigis la manon kaj vokis:

—Tien ĉi duo da viroj kun pioĉoj, kaj forigu ĉi tiun papisman figuron!

Matias And tre paliĝis, kaj liaj manoj tremis en la aero, kiel pafe trafitaj flugiloj.

—Sinjoro arĥiepiskopo, — li diris. — La bildo estas tiel malnova, kiel la preĝejo. La apostolo de Södermanland.

—Ne estas aliaj apostoloj, ol tiuj, kiujn nomas la nova testamento. Kaj en la Svea regno ĉesiĝos la sanktulkul-

to kaj bildadorado, sorĉbenoj kaj malĉastemo. Sinjoro preposto, danku Dion, ĉar favoro anstataŭas juron kaŭze de via aĝo. Ĉar vi devus perdi paroĥon kaj oficon. Kiam la paŝtistoj de la pura kredo suferis ekzilon kaj maldolĉecon pro la ĝusta instruado de la sankta libro, kiam mi sidis malsata en Saltvik, sur Åland, tiam vi ludis kun oranĝoj tie ĉi en Österås, pensante, ke la epoko de gaja papisma malseriozeco estas reveninta ... Sed la seriozeco venis, kaj jam estos pura aero, kristanaj kredo kaj morkorektado en la lando ... Forigu la idolon, diras mi.

Duo da grandaj servutuloj venis kun pioĉoj kaj hakiĵoj, kaj komencis forbati la ŝtonbildon tiel lerte, ke ŝajnis esti kutime al ili.

Baldaŭ ŝanceliĝis sankta Eskil, kiu estis staranta kun levita bastonego, observante sian urbon dum tiom da jarcentoj, kaj kies glorkronitan kapon okule serĉis kaj la foriranto, returninte sin sur la vojo, kaj la marvojaĝanto sur la ferdeko, kiam la urbo Österås aperis ĉe la vidlimo.

Matias And, kiu sentis, ke ĉio estas perdita, kaj ke li baldaŭ mortos, refariĝis serena por la unua fojo. Ne respondante eĉ unu vorton, li forrigardis kaj iris al la urbo. Venante al la pordego de sankta Laŭrenco li audis la rompobruon de la ŝtonbildo, kiu disrompiĝe falis de la kolono, kaj li vidis la episkopan bastonegon de sankta

Eskil, falantan kun la du levitaj fingroj sur la ŝtonan ŝtuparon, kie la piuloj klinadis profunde la vertojn je la beno de la ŝirma sanktulo.

Oscar Levertin

Fragmento el samnoma romano

Kalonymos

La ĉambrego estis tute plenigita de la paska tablo. La tuko brilis en la lumo de la brulantaj vakskandeloj de la tri arĝentaj ingoj, kaj la arĝentaj kalikoj radiis inter la flamoj.

Ĉe unu el siaj mallongflankoj la festtablo estis oferaltaro. Tie brilis du grandaj arĝentaj kalikoj — tiu de la antaŭkantanto, kaj tiu, kiun oni plenigis al la ĉiam atendata gasto de la vespero, profeto Elias.

... Sur arĝentaj pladoj kuŝis tie, envolvita en blankaj tukoj, la nefermentita pano de la mizero kaj e la dezertirado, la sala akvo simbolanta la suferojn kaj la sklavecon en Egipta lando, kaj la malmole kuirita ovo kiel simbolo pri la vivo, pri ĝiaj sangîĝo kaj pleniĝo.

Sur la altdorsan honorseĝon antaŭ tiuj ĉi vazoj sidiĝis Henok, la antaŭkantanto kaj dommastro, kun sia edzino apud si. La gemaljunuloj en siaj blankaj vestoj surtronadis kvazaŭ gereĝoj tie ĉe la tablofino. Plej proksime de ili sidis ĉiuj infanoj — bukaj nigraj knabkapoj, kaj ebenkombitaj klinitaj knabinkapoj — en longa vico, kaj

la malgrandaj manoj fervore premiĝis ĉirkaŭ la kalikoj, en kiuj la sekvinbera vino de la junulaĝo ŝaumas kvazaŭ infana rakonto.

Estis sekundo da silento en la ĉambrego. Blankaj kurtenoj kovris la duoblajn fenestrojn. Neniu sono aŭdiĝis el la strato. Malproksime de kutimaj lokoj kaj jaroj, oni estis sur palma insulo en la maro de la tempo, kaj en la akva spegulo de la vidlimo aperis la mortpalacoj de la faraonoj, la sablomontetoj de la dezerto, kaj la malproksimaj temploj en Kanan sur kanzonitaj montoj, ruĝaj pro la vesperbrilo de la ĉielo.

Kun laŭta, vivoplena voĉo Henok rompis la silenton, legante la komencpreĝon: "Jen estas la pano de la malriĉeco, kiun niaj patroj manĝis en Egipta lando. La malsatulo manĝu ĉe ni, la sopiranto festu Paskon ĉe ni — la nunan jaron tie ĉi, la sekvontan en la regno de Izraelo — la nunan en sklaveco, la sekvontan en libereco."

La vespermanĝo komenciĝis, kaj per manĝaĵoj kaj gajeco ĝi por iom da tempo ĉesigis la legadon. Odoris oleo kaj celerio, kaj estis laŭta ridado ĉirkaŭ la satiga kukaĵo. Sed Kalonymos ne povis konservi la impreson. La maljunaj vane provis meti la fremdulon en la familian rondon — li mem sin sentis ekstera. Li apartenis tien, kaj tamen ne pli tien, ol al ĉiuj miloj da aliaj hejmoj disŝutitaj en la

mondo, en kiuj oni same serioze legis samajn vortojn, kaj same ŝercis ĉirkaŭ la samaj dolĉetaĵoj kaj spiritaj manĝaĵoj.

Oscar Levertin

Fragmento

La fremdlanda vojaĝo de Mathias Waldius

El leteroj de Mathias Waldius al Erland Hjelm, sekretario en la militintendanta ĉefoficejo.

Parizo, la 1-an de oktobro 1767.

Nobla kaj estiminda sinjoro sekretario, mia honesta bona amiko!

Certe mi volus simili tiujn sinjorojn studentojn, kiujn oni renkontas meditantaj en la stratoj ĉirkaŭ la reĝa librejo, kun libro en la manoj, forgesantaj pro la legataj signoj ĉion sur stratoj kaj placoj. Sed min mem embarasas kaj logas ĉio. La bruado suprenpenetras kaj malkvietigas eĉ la silenton de tiu malgranda ĉambro en la gastejo de patro François "au Petit Colombier, rue des Colombes", kie via fidela Maĉjo loĝigis sin.

Matene, kiam mi vekiĝas, tion kaŭzas la fruktvendisto, kriante "voilà les plaisirs des messieurs, voilà les belles pêches", kaj mi ĵus dorminte vidas lian veturileton plene ŝarĝitan per fruktoj. Sed, antaŭ ol mi decidus elekti la manon kaj aĉeti, hezitante kaj mirante antaŭ tiu

ĉi trosufiĉeco, li jam estas for, kaj laodoro de la belaj kaj sukriĉaj persikoj restas, incitante la malgajan humoron.

Mia kara frato, kiu ŝatas la belan sekson, kaj estas de ĝi amata pli ol aliaj, estu plue scianta, ke la virinoj en Parizo malsimilas tiujn de aliaj lokoj. Ili havas fajron kaj spritecon, kies egalaj ne estas troveblaj aliloke ... Ilia irado estas ĉarma al la okulo, ilia voĉo estas gaje muzika, kaj niaj svedaj fraŭlinoj — kiom ajn amindaj ili povas esti — estas nur paseroj kompare kun tiuj ĉi paradizbirdoj kaj kolibroj. Miaj vizitoj en Sorbonne kaj Collège de France estas kalkuleblaj — la maladmiro pri treseriozececo estas en Parizo tre granda, kaj oni ne povas nei, ke la sciencoj — kaj spiritaĵoj kaj mondaĵoj — ĉe ni tro multe dediĉiĝas al klera kaj severa diskutado.

Nun mi devas fini tiun ĉi skribaĵon, tiom malinteresan, ke ĝi ne meritas okupi la tempon kaj la pensojn de mia kara frato, ĉar ĉe la tria mi kune kun kelkaj vojaĝantaj samlandanoj tagmanĝos ĉe Patrino Yvonne, Rue Pied de Bœuf, kiu havas eksterordinaran fritiĵon, kaj malfortan ruĝanvinon el Suresnes — kaj unue mi iros al la dancmajstro, Rue Gramont.

Vivu bone, kara amiko, tute via

MATHIAS WALDIUS.

Parizo, la 10-an de oktobro 1767.

Mia vera amiko kaj frato!

Post kiam venis Suzon, la almozo ne estas rifuzata al iu; neniuj etenditaj manoj restas sen monero, kvankam tiu estas modesta, kiel la donanto; kaj neniuj, kiuj petas konsenton, restas sen konsola vorto. La savoj knabo kun sia fluto kaj sia marmoto haltas ĉiutage sub mia fenestro; la kvoveturigisto sen murmuro ridetante levportas freŝan akvon en mian ĉambron; la bedaŭrinda invalido, kies kruro estas forpafita ĉe Malplaquet, translokiĝis de Rue St-Jacques al mia pordego.

Post kiam venis Suzon, mi komprenas la ĉarmon de la kreitaro, la dolĉon de la sunradio, la ventan moveton, kaj la murmureton de la arbofolioj, la feliĉon esti juna, vekigi kaj dormigi. Neniam antaŭe miaj lipoj tiel sincere aŭdigis la dankvorton vesperan, aŭ tiel humile eldiris la matenan preĝoferon.

Post kiam venis Suzon, Parizo estas Edeno, kaj Ĝardeno de Tuilerioj, kie ni plezurpromenas en la vesperoj, pli bela ol Cythère, kaj kiam ŝi per sia tre beleta kantvoĉo kantetas:

*Bela monato maj',
Plenas mia kor' de gaj'¹*

1 Joli mois de mai
Que tu nous rends les cœurs gais.

mi ne sentas en la aŭtunblovo la antaŭsignon de la vintro, sed kredas, ke ĝi estas la afabla Zefiro, kaj ke komenciĝas tiu sezono, kiam ĉio liberiĝas el siaj katenoj, kiam ama kaj juna kaj arda deziro plenigas la korojn de la homidoj, de la birdo sur la branĉeto, kaj de la lumbriko en la ŝlimo.

En la labortagoj Suzon iras, portante sur sia blanka brako grandan skatolon por veluro kaj punktoj, en simpla pulkolora jakto, senornama blua jupo, haroj nevestitaj, kaj tamen ĉiu piediranto turnas sin post ŝi malgraŭ la simpleco de ŝia kostumo. La malgrandaj abatoj kaj muskedistoj, la doktoro en sia kabrioletto forgesas mortlitojn kaj ĝemon, vidante ŝian radiantan okulon, kaj la markizoj klinas la kapojn al la fenestroj de la karosoj por ĝui ŝian sunbrilan rideton. Sed dimanĉe ŝi estas en rondrobo kaj ŝafistinĉapelo, kombita "à la dauphine", kun minaca muŝeto apud la dekstra okulo, kaj sunombrelo "à la chinoise". Ame kaj ĝoje mi iras kun la knabino de mia koro laŭlonge de la bulvaroj, kie ni rigardas la marionetojn de Curtin, ĝis Malgranda Gentilly aŭ la arbaro de Vincennes, en kies kamparaj boskoj la sentema simpleco de la naturo libere povas esprimiĝi per neofenda ludado kaj dolĉaj embarasaĵoj. Post la mallumiĝo ni reiras al Parizo, kaj la nebrila lumo de la olelampoj, aŭ Luno, kiam la korno de Diano estas sur la arkaĵo, montras al ni

la vojon hejmen. Al Le Petit Colombier Suzon verigas ĝian nomon, kaj malligante siajn harojn ŝi kantas:

*Rozkoloran mi prenis rozon,
Kiu pendis sur blanka rozuj’.
Belan rozkoloran rozon,
Kiu pendis sur blanka rozuj’,
La belan rozon en flor’
Suzon, Suzette, Suzon.¹*

Sed kara frato, tie ĉi sinjoro Celadon devas fini la bildon, kaj kun larmoj en la okuloj kaj plej feliĉa animo mi premas la manon de mia estimata frato kaj amiko. Ni ambaŭ estu same longe kaj dolĉe lumigataj de la bela fajro de Amoro.

MATHIAS WALDIUS.

Parizo, la 11-an de novembro 1767.

Mia propra sola amiko!

La kortuŝanta pruvo de la amikeco de mia frato bedaŭrinde ne povis helpi malfeliĉulon, kiun punis la sorto pli ol lia propra kulpo. Ĉio finiĝis. Mia Suzon estas pre-

1 J’ai cueilli la rose rose
Qui pendait au rosier blanc,
Bel le rose rose
Qui pendait au rosier blanc
Bel le rose en fleurissant
Suzon Suzette, Suzon.

nita for de mi, kaj mi per larmoj malsekigas la paperon, sur kiu mi tute sola skribas en Petit Colombier en tiu ĉambro, kiu estis la templo de nia amo, kaj kiun ŝi ĉarmigis per rozoj kaj ridetoj, kaj de kies pendolhorloĝo la nun limake malrapide pasantajn horojn ŝi faris dancantaj kaj feliĉaj. La veturiloj senkompate bruas sur la pavimo. Tie ekstere krakas la vipiloj, la fruktvendisto krias sian "Voilà les plaisirs des messieurs, voilà les belles pêches", sed tion mi aŭdas mallaŭte kvazaŭ tra nebulo, kaj min mem ĉirkaŭas kvazaŭ morta kaj senmova silento de mallibereja ĉelo.

Kvankam ŝi estas ĵus forpelita, hodiaŭ, en tiu ĉi malfeliĉa tago de novembro, en la matena lumiĝo, mi tamen sentas, kvazaŭ tio estus okazinta antaŭ semajnoj. Forpelita, kaj ŝia malfeliĉa amanto ne povis ŝirmi ŝin! Aŭdu, mia frato, aŭdu la teruran finon de la sorto de amiko senespere suferanta!

Jam dum multaj tagoj nin maltrankviligis antaŭsentoj pri malfeliĉo proksimiĝanta. Katoj kuris diagonale trans la stratojn, kiam ni iris hejmen, kaj en la kartoĵoj Suzon trovis nur malprosperon. Tiel, hodiaŭ frue — ĝuste kiam Suzon, kun palpebroj ankoraŭ iom pezaj, ordigis sian hararon antaŭ la spegulo, kiu remontris la dormeteman agrablon de ŝia vizaĝo kaj Mineton, kiu malvigle ŝpinbruetis sur ŝia genuo — oni pordfrapis ... "Eniru!" Ni supozis, ke estas la kelnerknabo, kiu alportas nian teon

kaj nian sukeran siropon, sed imagu mian teruron, kiam eniris la plej timata el miaj malnovaj instruistoj, prepos-
to kaj profesoro Ambrosius Westring, estante aŭtorita-
ta kaj rigida kiel ĉiam. "Sentaŭgulo, malvirtulo, vante-
mulo, malinda filo, malbona kaj perfidinta servisto de la
Sinjoro, ni poste interparolos", jen kiel li salutis min
svedlingve. Tiam li turnis sin al Suzon, la ĉarmulino, la
bedaŭrindulino, minacis al ŝi per la bastono, nomis ŝin
per la plej malbelaj nomoj, kaj promesis ĵeti la policon
sur ŝin. Suzon unue ridetis. "Sed, mia eta kuniklo, nun
ĵetu tiun ĉi arogantulon tra la pordo," ŝi diris trankvile,
kaj karesis Mineton, kiu levis la dorson al ŝia blanka sub-
kolo. Sed mia lango estis kvazaŭ paralizita. Mi falis sur
miaj genuoj, ne povante eĉ balbuti vorton.

Sed, kiam Suzon vidis min en tiel mizera situacio, tre-
manta kiel lerneknabo, kaj ne povanta diri ion por de-
fendi ŝin, ŝi paliĝis, ŝiaj lipoj tremis; tiam ŝi tiris al si la
pelerinon, donis al mi rigardon ne priskribeblan, rigar-
don, kiu ampleksis min kaj la tutan ĉambron en "la mal-
granda kolumbujo", kaj malaperis.

Oscar Levertin

Fragmento

La trezoro de la imperiestrino

La episkopo venigis al si patron Verneau. Koncernis laferon tre malagrablan.

Patro Verneau estis sendita por prediki en fabrikdistrikto proksime de Charleroi, sed alvenis meze de granda striko, kiam la laboristaro estis relative tre emociita kaj malkvieta. Li rakontis al la episkopo, ke tuj ĉe lia alveno al la "nigra lando" li ricevis de laboristkondukanto leteron kun enhavo, ke li rajtos libere paroli, sed ke skandalo okazos en la preĝejo, se li permesos al si nomi Dion — rekte aŭ malrekte — en la prediko. — Kaj venante sur la predikejon kaj vidante la aŭdantaron, mi ne dubis, ke ili plenumus la minacon, — diris la pastro.

Patro Verneau estis malgranda, malgrasa monaĥo. La episkopo rigardis lin kiel estajon de malsupera speco. Tia nerazita, eĉ iom malpura monaĥo kun malgrava vizaĝesprimo, evidente estas senkuraĝa. Li ja eĉ timas iom la episkopon.

—Oni ankaŭ raportis al mi, — diris la episkopo, — ke vi plenumis la deziron de la laboristoj. Sed mi certe ne bezonas atentigi... —

—Monsinjoro, — interrompis patro Verneau tre humile. — Mi supozis, ke la eklezio volas, se eble, eviti emociajn okazojn.

—Sed eklezio, kiu ne kuraĝas diri la nomon de Dio...

—Ĉu monsinjoro aŭdis mian predikon?

La episkopo iris antaŭen kaj reen en la ĉambro por trankviliĝi.

—Kompreneble vi memoras ĝin parkere? — li diris.

—Kompreneble, monsinjoro.

—Do aŭdigu al mi, kiel vi faris ĝin, patro Verneau, — laŭvorte, precize kiel vi faris ĝin!

La episkopo sidiĝis en la apogseĝon, patro Verneau restis staranta.

—Civitanoj kaj civitaninoj, — li komencis, metante la voĉon en prediktonon.

La episkopo skuiĝis. —

—Plaĉas al ili esti nomataj tiel, monsinjoro.

—Ne estas grave, patro Verneau, — diris la episkopo, — daŭrigu!

La episkopo tremetis; la du vortoj en mirinda maniero prezentis al li la situacion. Li vidis image tiun aron da geidoj de "la nigra lando", al kiuj patro Verneau paroladis. Li vidis multe da krudaj vizaĝoj, multe da ĉifonoj, multe da sovaĝa forto. Li vidis tiun popolon, por kiu oni nenion faris.

—Civitanoj kaj civitaninoj, — rekomencis patro Verneau. — En tiu ĉi lando oni trovas imperiestrinon, kies nomo estas Maria Teresia. Ŝi estas bonega regantino. Ŝi estas la plej saĝa kaj plej perfekta el ĉiuj regantoj ekzistantaj en Belgujo.

Aliaj regantoj, civitanoj, aliaj regantoj estas postsekvataj, kiam ili mortas, kaj perdas ĉian potencon super siaj popoloj. Sed ne tiel la granda imperiestrino Maria Teresia. Eble ŝi perdis la tronojn en Aŭstrio kaj Hungarlando; eble Brabanto kaj Limburgo nun obeas aliajn estrojn, sed neniel ŝia bona graflando Okcidentflandrujo. En Okcidentflandrujo, kie mi loĝis en la lastaj jaroj, oni ankoraŭ hodiaŭ ne konas alian reganton ol Maria Teresia.

Ni scias, ke reĝo Leopold loĝas en Bruselo, sed li ne koncernas nin. Maria Teresia daŭras regi tie apud la maro. Precipe en la vilaĝoj de la fiŝkaptistoj. Ju pli proksime al la maro oni venas, des pli plenpotence ŝi regas.

Nek la granda revolucio, nek la imperieco, nek la hollandanoj havis forton sufiĉan por eltronigi ŝin. Kiel ili estus povintaj tion? Ili ne faris ion por la geanoj de la maro egalan al ŝia faro.

Ho! Kion ŝi donis al la popolo sur la dunoj? Tio estas netaksebla, civitanoj!

Antaŭ proksimume cent kvindek jaroj, en la plej frua parto de sia regado, ŝi vojaĝis en Belgujo. Ŝi venis al Bru-

selo kaj Bruĝo, ŝi venis Lieĝon kaj Lovenon, kaj, vidinte sufiĉe da grandaj urboj kaj bildornamitaj urbodomoj, ŝi venis ankaŭ al la bordo por vidi la maron kaj la dunojn.

Ne ĝojigis ŝin tiu vido. Ŝi vidis la maron pli granda kaj pli potenca ol estas kontraŭbataleble per homa povo. Ŝi vidis la marbordon senhelpa kaj senŝirma. Tie kuŝis la dunoj, sed la maro pli frue supervenis ilin, kaj povos ree veni. Tie estis ankaŭ kelkaj digoĵoj, sed ili ruiniĝis kaj kunfalis.

Tie ŝi vidis havenojn plenigintajn je sablo; tie ŝi vidis marĉejojn tiel akvohavajn, ke nur kano kaj kariko emis kreski tie; tie ŝi vidis ventdifektitajn fiŝistajn dometojn konstruitajn malsupre de la dunoj, kvazaŭ disĵetitajn al la maro, kaj tie ŝi vidis malriĉajn, malnovajn preĝejojn, kiuj estis lokitaj malproksime for de la maro inter blovsablo kaj dunaveno en malfacile atingeblaj senkultur-aĵoj. Tutan tagon la granda imperiestrino sidis tie ĉe la maro. Ŝi rakontigis al si pri superakvoj kaj fornaĝintaj vilaĝoj. Ŝi montrigis al si la lokon, kie tuta landparto dronis en la maron. Ŝi remigis sin tien, kie malnova preĝejo staras en la marprofundaĵo. Kaj ŝi kalkuligis al si la homojn dronintajn kaj brutojn perditajn, kiam la maro lastfoje estis internflanke de la dunoj.

Dum la tuta tago la imperiestrino pensis: Kiel mi helpos tiun ĉi kompatindan popolon sur la dunoj? Mi ja ne povas malpermesi, ke la maro leviĝu kaj malaltiĝu. Mi

ne povas malpermesi, ke ĝi subfosu la bordon. Mi ankaŭ ne povas malliberigi la venton aŭ malebligi, ke ĝi renversu la boatojn de la fiŝistoj. Kaj mi tute ne povas konduki la fiŝojn en iliajn retojn, aŭ ŝangi al nutra tritiko la dunavenon. Neniu regnestro en la mondo estas tiel potenca, ke li povus helpi kontraŭ malfeliĉo tiun ĉi malriĉan popolon.

La sekvanta tago estis dimanĉo, kaj la imperiestrino aŭskultis la meson en Blankenberghe. La tuta loĝantaro de la bordo inter Dunkirchen kaj Sluis venis tien por vidi ŝin. Sed antaŭ la meso la imperiestrino iris inter la popolo, parolante kun ĝi.

Unue ŝi renkontis la havenestron de Nieuport.

—Kian novaĵon oni havas el via urbo? — diris la imperiestrino.

—Nenion novan, — diris la havenestro, — krom, ke la boato de Kornelis Hertsen hieraŭ nokte renversiĝis pro ekblovego, kaj li estis trovita rajdanta sur la boatkilo hodiaŭ matene antaŭ la bordo.

—Estis ja bone, ke li savis la vivon, — diris la imperiestrino.

—Oni ne povas diri, ĉu bone aŭ ne, — diris la havenestro, — ĉar li estis senprudenta, kiam oni kondukis lin sur la teron.

—Ĉu pro timo? — diris la imperiestrino.

—Jes, — diris la havenestro, — estis, ĉar ni en Nieuport ne havas ion, al kio ni povus fidi okaze de mizero. Kornelis sciis, ke lia edzino kaj la malgrandaj infanoj mortos pro malsato, se li pereos, kaj tiu scio supozeble forterurigis lian prudenton.

—Tio, kion vi bezonas tie ĉi sur la dunoj, estas do io, al kio vi povus fidi, — diris la imperiestrino.

—Estas tiel, — la havenestro diris, — la maro estas necerta, la tero estas necerta, fiŝkaptado kaj gajno estas necertaj. Io fidinda estas tio, kion ni bezonas.

La imperiestrino iris pluen, ĝis ŝi venis al la paroĥestro de Heyst.

—Kiu novaĵo el Heyst? — diris ŝi al li.

—Nenio nova, — li respondis, — krom, ke Jakob van Ravesteyn ĉesis dreni la marĉejon kaj elfosi la havenon kaj konstrui la lumsignalejon kaj je ĉiu alia utila agado okupinta lin.

—Kial okazis tio? — diris la imperiestrino.

—Li ricevis heredaĵon, — la pastro diris, — kaj nun ĝi ŝajnas al li malpli granda, ol li atendis.

—Sed li do havas ion certan, — diris la imperiestrino.

—Jes, evidente, — diris la pastro, — Sed, kiam li havas en la mano la monerojn, li ne kuraĝas entrepreni iun grandfaron, supozante, ke ili ne sufiĉos.

—Io nemezureble granda estas do nepre bezonata por helpi vin en Heyst, — diris la impenestrino.

—Estas ĝuste tiel, — diris la pastro, — tie estas senfine multe, kion oni devus fari, kaj nenio povos esti farata, antaŭ ol oni scios, ke oni disponas senfine multe.

La imperiestrino iris plu, ĝis ŝi venis al la ĉefpiloto de Middelkerke, kaj demandis pri novaĵoj el lia urbo.

—Neniun novaĵon mi povas rakonti, — diris la ĉefpiloto, — krom ke Jan van der Meer malamikiĝis kun Luka Neerwinden.

—Ĉu vere?

—Jes, ili trovis la gadejon, kiun ili ambaŭ serĉis la tutan vivon. Ili aŭdis malnovajn rakontojn pri ĝi, kaj esplorvadis sur la maro por trovi ĝin, kaj estis plej bonaj amikoj dum tiu tuta tempo, sed, trovinte ĝin, ili fariĝis malamikoj.

—Do estus pli bone, se ili neniam estus trovintaj ĝin, — la imperiestrino diris.

—Jes, — diris la ĉefpiloto, — evidente estus pli bone.

—Do tio, kio helpus vin en Middelkerke, devus esti tiel kaŝita, ke neniu povus trovi ĝin, — diris la imperiestrino.

—Ĝuste tiel, — diris la ĉefpiloto, — bone kaŝita estas necese, ĉar, se iu trovus ĝin, okazus ja malpaco kaj batalo pri ĝi, aŭ ĝi estus tuj eluzata, kaj estus do ne plu utila.

La imperiestrino plende ekspiris sentante, ke ŝi ne kapblas ion fari. Poste ŝi iris al la meso, kaj la tutan tem-

pon si genustaris, preĝante, ke ŝi tamen povu helpi la popolon. Kaj kun via permeso, civitanoj, fine de la meso ŝi komprenis, ke fari malmulte estas pli bone, ol fari nenion. Kiam la popolo venis de la meso, ŝi stariĝis sur la preĝejan ŝtuparon por paroli.

Neniu okcidentflandrano iam forgesos, kiel ŝi aspektis tiam. Ŝi estis belega, kiel imperiestrino, kaj vestita, kiel imperiestrino. Ŝi liverigis al si kronon kaj mantelon, kaj tenis en la mano la sceptron. Ŝi havis alte frizitan blankpudritan hararon, kaj ŝnuro kun grandaj malfalsaj perloj estis metita inter la bukloj. Ŝi estis vestita en ruĝa, brila silkaĵo, sed la tuta robo estis kovrita per flandraj punktoj. Ŝi havis ruĝajn altkalkanumitajn ŝuojn kun grandaj juvelseruroj sur la piedkoloj.

Ŝi aspektis, kvazaŭ ŝi ankoraŭ nun regas Okcidentflandrujon.

Do ŝi parolis al la bordanoj, dirante al ili sian volon.

Ŝi rakontis al ili, kiel ŝi pensegis pri helprimedoj. Ŝi diris, ke ili certe scias, ke ŝi ne povas kvietigi la maron aŭ firmigi la venton, ke ŝi ne povas konduki la fiŝamasojn al la bordo aŭ ŝangi la dunavenon al tritiko. Sed tio, kion ŝi, malforta homo, povos fari por ili, tio ankaŭ estas farota.

Ili ĉiuj staris surgenu dum ŝi parolis. Neniam pli frue ili sentis, ke tiel milda kaj patrina koro kompatis por ili.

La imperiestrino parolis kun ili pri ilia malfacila vivado tiel, ke ili ekploris pro sia kunsento.

Sed la imperiestrino diris nun, ke ŝi decidis restigi ĉe ili sian trezorkeston kun ĉiuj ĝiaj enhavataj trezoroj. Tio estos ŝia donaco al ili ĉiuj, loĝantoj tie sur la dunoj. Ĝi estas la sola helpo, kiun ŝi povas doni, kaj ŝi petis ilin pardoni, ke ĝi estas tiel malgranda. Kaj ankaŭ ŝi havis larmojn en la okuloj, kiam ŝi diris tion.

Ŝi demandis, ĉu ili volas promesi kaj ĵuri, ke ili ne uzos la trezoron, antaŭ ol la mizero ĉe ili estos tiel granda, ke ĝi ne povos esti pli granda. Kaj plue, ĉu ili ĵuros, ke ili lasos ĝin herede al siaj idoj, se ili mem ne bezonos ĝin. Kaj fine ŝi petis ĉiun viron ĵuri, ke li ne provos propriigi al si mem la trezoron, sed antaŭe demandos pri tio la tutan fiŝistaron.

Ĉu ili volis ĵuri? Tion volis ili ĉiuj. Kaj ili benis la imperiestrinon, plorante pro dankemo. Kaj ŝi ploris dirante al ili, ke ŝi scias, kiom ili bezonas apogon neniam ŝanĝeligeman, al kiu ili povos fidi, kaj senfinajn trezorojn kaj neatingeblan feliĉon, sed tion ŝi ne povas doni al ili. Ŝi neniam estis tiel senpova, kiel tie ĉi sur la dunoj.

Givitanoj, pro la regantsaĝeco de tiu glora virino, ŝi tamen atingis pli multe, ol ŝi intencis, kvankam ŝi ne sciis tion, kaj tial oni povas diri, ke ŝi ankoraŭ hodiaŭ regas Okcidentflandrujon.

Devas ĝojigi vin aŭdi pri tiu beninda stato, kiu devastiĝis en Okcidentflandrujo pro la donaco de la imperiestrino. Tie la popolo havas ion, al kio ĝi povas fidi, kiel ĝi tiel bezonas, kiel ni ĉiuj tiel bezonas. Kiom ajn granda la mizero estas, ĝi ne kaŭzas malesperon.

Tie oni rakontis al mi, kiel aspektas la trezorkesto de la imperiestrino. Kiel la kesto de la sankta Ursula en Bruĝo, oni diras, kaj eĉ pli belega. Ĝi estas imitaĵo de la katedralo en Vieno, kaj ĝi estas el pura oro, kaj sur la flankoj estas bilditaj el alabastro la vivokazoj de la imperiestrino. Sur la kvar flankturetoj brilas la kvar diamantoj, kiujn ŝi prenis de la krono de la turka sultano, kaj sur la frontonoj estas ŝia nomĉifro ornamita per rubenoj. Sed, se mi demandas, ĉu oni vidis la keston, oni diras, ke ŝippereintaj ŝipistoj, kiuj estas en vivdanĝero, ĉiam vidas la keston, naĝanta antaŭ ili sur la ondoj, kiel signo, ke ili ne malesperu pri edzino kaj infanoj, se ili forlasos ilin.

Sed nur tiuj vidis la trezoron; alie neniu venis al ĝi tiel proksime, ke li povis kalkuli ĝin. Kaj vi scias, civitanoj, ke la imperiestrino ne diris al ili, kiom ĝi enhavas. Sed, se vi dubas, kiom ĝi utilis kaj utilas, tiaokaze mi petas vin vojaĝi al la maro kaj rigardi. Tie estis fosado kaj konstruado de post tiam, kaj la maro nun estas venkita per digoj kaj ne plu kaŭzas domaĝon, kaj internflanke de la dunoj estas verdaj herbejoj, kaj ĉe la maro estas banejoj kaj kreskantaj urboj. Sed, pri ĉiu lumsignalejo konstruita,

pri ĉiu ŝipo, kiun oni konstruis, kaj pri ĉiu digo, kiu estas farita, oni ĉiam pensis: Se la propraj rimedoj ne sufiĉos, nia favorema imperiestrino Maria Teresia donos helpon al ni. Sed tio estis nur instigo, la propra mono ĉiam sufiĉis.

Vi scias ankaŭ, ke la imperiestrino ne diris, kie la trezoro troviĝas. Ĉu tio ne estis bona penso, civitanoj? Iu gardas ĝin, sed antaŭ ol oni decidis dispartigi ĝin, la trezorogardanto ne prezentos sin por diri, kie ĝi estas. Tial oni scias, ke nek nun nek estonte ĝi estos maljuste disdonita. Ĝi apartenas same al ĉiu. Ĉiu scias, ke la imperiestrino zorgas por li, kiom por la najbaro. Malkonsentoj kaj envio ĉe la popolo tie ne okazas kiel aliloke, ĉar la plejbono estas komuna.

La episkopo interrompis la parolon de patro Verneau.

—Estas sufiĉe, — li diris. — Kiamamere vi faris la konkludon?

—Mi diris al ili, — diris la monaĥo, — ke estas efektiva domaĝo, ke la bona imperiestrino ne venis ankaŭ al Charleroi. Mi bedaŭris ilin, ĉar ili ne posedas sian trezorkeston. Por la gravaj taskoj, kiujn ili intencas plenumi, por tiu maro, kiun ili devus kvietigi, kaj por tiu blovsablo, kiun ili devos regi, diris mi, nenio estus pli utila al ili.

—Nu? — demandis la episkopo.

—Kelkaj napoj, via respektinda moŝto, kaj kelkaj fajfoj, sed tiam jam mi estis lasinta la predikejon. Alie okazis nenio.

—Ili komprenis, — diris la episkopo, ke vi parolis pri la providenco de Dio.

La monaĥo riverencis.

—Ili komprenis, ke vi volis klarigi al ili, ke tiu potenco, kiun ili mokas, ĉar ili ne vidas ĝin, devas kaŝi sin. Ke ĝi estus malbone uzata en tiu momento, kiam ĝi aperus palpeble. Mi gratulas vin.

La monaĥo riverencante proksimiĝis al la pordo. La episkopo sekvis lin, plena de favoro.

—Sed la trezoro, ĉu oni tie ankoraŭ kredas pri ĝi?

—Ĉu ili kredas? Tre certe, monsinjoro.

—Kaj la trezoro, ĉu ĝi iam estis trezoro?

—Permesu al mi, monsinjoro. Mi ĵuris.

—Nu, al mi ... — diris la episkopo.

—La pastro en Blankenberghe konservas ĝin. Li montris ĝin al mi. Ĝi estas malgranda ligna kesto kun feraj forĝaĵoj.

—Nu?

—Kaj sur ĝia fundo kuŝas dudek Maria-Teresia-taleroj.

La episkopo ekridetis, sed rapide serioziĝis.

—Ĉu oni povas kompari la Providencon kun tia ligna kesto?

—Ĉiuj komparoj estas malĝustaj, monsinjoro. Ĉiuj homaj pensoj estas malperfektaĵo.

Pastro Verneau ree riverencis, kaj forlasis la vizitĉambron.

Selma Lagerlöf

La falĉistoj de Polhem

Unu el tiuj rakontoj, kiujn fraŭlino Lovisa precipe preferas prezenti, estas kiel la fieraj kaj avara grandbienulo de Ekolsund veturis de sia Mälärregiona bieno al la laborejoj de Polhem¹ por mendi de li mekanecajn laboristojn, kiuj kolektu liajn rikoltojn, falĉu lian grenon kaj plenumu la laboron de viro, sensalajre kaj senmanĝe.

Tiam, kiam li alvenis al Stjærnsund, Polhem sidis en sia laborejo, vestita kiel ordinara forĝisto kaj okupata de elekspérimentado de nova maŝinmodelo. Ĉe la trofiera kaj patronaĉa saluto de la grandbienulo, Polhem preferis konservi sian inkogniton. Li diris, ke Polhem mem ne troviĝas hejme, sed ke li certe povos plenumi ĉion, kion oni mendas de li, kaj je la nomo de Polhem li povas promesi, ke dekduo da mekanecaj laboristoj, kiuj povos labori sen manĝo kaj sen salajro, venos al Ekolsund, kiam la greno estos preta por rikolto la sekvontan fojon.

En Ekolsund okazis somermezo. La fojno estis preta por falĉado, sed la falĉiloj kuŝis rustaj kaj neakrigitaj, la

1 Polhem, glorfama sveda mekanisto en la unua parto de la 18-a jarcento.

popolo sidis sen laboro, sen salajro kaj sen manĝo. Kav-
okulaj kaj mirantaj ili senĉese rigardis la posedanton de
la palaco, kiu tage-post-tage staris apud sia fenestro
esplorrigardante super la vojo, kvazaŭ atendente iun.

La trifolio odoris pli forte ĉiun novan tagon, kvazaŭ ĝi
volus atentigi pri si. La timoteherbo² paliĝis de malkon-
tento pro la senzorgo de la grandbiena mastro. Sed eĉ
unu mano ne moviĝis por rikolti ĝin. Pli kaj pli maltran-
kvile kaj nerveze la posedanto de Ekolsund vagis en la
grandaj salonoj. Ŝajnis kvazaŭ li ne kuraĝus iri eksteren,
timante la malbenojn de la popolo kaj de la naturo. La
suno ardis, ĉiu kreskintaĵo komencis velki, kaj la mastro
de Ekolsund staris ĉe sia fenestro, pugnante la manojn
pro spito, kolero kaj malespero.

Tiam iun tagon li vidis nubeton en la malproksimo,
kvazaŭ ruliĝantan sur la polva landvojo. Ĝi pli kaj pli
proksimiĝis, kaj laste li povis distingi en la polvonuboj
la formojn de strangaj kaj monstraj aperoj. Estis gamboj
irantaj, brakoj svingiĝantaj, sed sur la monstraj korpoj
ne troviĝis kapoj. Malantaŭ la terura trupo ruliĝis nobel-
ula veturilo kun veturigisto kaj lakeo en livreo.

Kun sento de malagrablo miksitita kun plenumita espe-
ro la sinjoro de Ekolsund iris por akcepte renkonti ĉi
tiujn mirindajn gastojn.

2 *Phleum pratense* (kaj aliaj).

Laŭ ordono, dirita per akra voĉo, haltis la dekdunombra aro, kaj la veturilo ruliĝis pluen ĝis la perono. El ĝi paŝis sinjoro, vestita per silko kaj veluro, kun punktoj kaj krispo, kaj kun vasta longperuko sub la plumornamita ĉapelo. Kun surprizo la sinjoro de Ekolsund rekonis la nobele kaj multekoste vestitan gaston. Ne estis alia ol la forĝisto en Stjernerund. Per malmola, preskaŭ minaca voĉo Polhem diris :

“Jen la laboristoj, kiujn vi deziris de mi. Uzu ilin, kiel plaĉas al vi. Ili ne manĝas, salajron ili ne postulas, sed memoru ankaŭ, ke ili ne estas homoj. Ordonu al ili ‘iru’, kaj ili iros. Ordonu ‘staru’, kaj ili haltos”. Tiam Polhem enpaŝis reen en sia veturilo kaj malaperis en turnmoviĝanta polvonubo.

Tre maltrankvile kaj hezitante la mastro de Ekolsund iris al la respektodonaĵoj, kaj per tremanta voĉo li diris tiun vorton, kiun Polhem instruis al li.

“Iru.”

La aro levis la brakojn, kies ekstremoj konsistis el akriĝitaj falĉiloj, kaj ekmoviĝis antaŭen. Kvazaŭ tirataj de magneto ili sekvis post la Ekolsundsinjoro kie ajn li iris, kaj li kondukis siajn novajn laboristojn al la nefalĉitaj kampoj.

Rigidaj de teruro la popolo de la bieno rigardis siajn ĵus venintajn konkurantojn, vidante kiel la fojno falas en ebenaj linioj pro la rapidaj falĉilsvingoj.

La mastro de Ekolsund ĝojegis kaj laŭdis la genion de Polhem. Dum kelkaj horoj plenumiĝis tiom, kiom antaŭe dum sama nombro da tagoj. Sed samtempe li ne povis forigi senton pri teruro.

Ĉu la konscienco riproĉis lin, kiam li vidis sian malnovan laboristaron, kie la virinoj ploris premante al si siajn malsatajn kaj timigitajn infanojn, kaj la palaj viroj sekvigis minacajn rigardojn post li? Aŭ, ĉu estis la konscio ke la novaj laboristoj iras antaŭen same blinde, same senhezite kaj senindulge kiel sorto kaj morto?

La tutan tagon ili falĉis. La trifolio ne plu odoris, kaj la timoteherbo grincis, kvazaŭ per dentoj, kiam ĝi falis pro la falĉiloj de la novaj viroj. Ili ne bezonis ripozon. Intertempon ili ne prenis por tagmanĝo, nek ili sidis apud la fosaĵo ŝercante kaj babilante ĉe vespermanĝo. Sed ili laboris, antaŭen ili iris. Senhezite kaj senindulge kiel la sorto. Jam restis nur unu kampo, kiu deklivis malsupren al la lago, enkadrigita de krutaj ŝtonegoj. En longa vico, kiu etendis sin sur la tuta larĝo de la herbejo, iris la falĉistoj, kaj antaŭ ili iris la sinjoro de Ekolsund. Li estis laca de malsato, laca de sia longa, malpacienca atendo, kaj laca pro la animstreĉo de la tago. La brakoj de la falĉistoj moviĝis, sed ili havis nek kapojn nek cerbojn. Kaj la memoro de ila kondukanto malvigliĝis, la funkciado de lia pensado ĉesis.

Tiam la aro venis al la herbeja rando, kaj trans ĝi troviĝis la lago. Li volis haltigi ilin, sed li estis forgesinta la ĝustan vorton.

Li ordonis, li kriis : "Haltu!"

"Turniĝu!"

"Ne moviĝu!"

"Halton!"

Nenio efikis. Antaŭen ili iris. Senindulge, neaŭdemaj kiel la morto. Kaj antaŭ si ili pelis la sinjoron de Ekolsund kiel enrondigitan ĉasaĵon.

Malsupren en la Mälarlagon ili iris.

La falĉiloj fulmbrilis kiel flamantaj glavoj en la vespera sunlumo, kaj la akvo fermiĝis super la falĉistoj de Polhem kaj super la sinjoro de Ekolsund.

Elsbeth Funch

El "Mi konas landon"

www.omnibus.se/inko

ISBN 91-7303-175-5